


EL Popola ĈINIO

N-ro 9 SEPTEMBRO 1967



La granda kultura revolucio de Ĉinio estas printempa tondro kaj ŝtormo. Ĝi skuas la animon de centmilionoj da popolanoj. Ni sekvas la ekzemplon de la junaj ruĝgvardianoj de Ĉinio kaj ĵuras esti pioniroj de revolucio. Saluton! Maŭ Zedong, granda gvidanto de la popoloj de la mondo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo

MAŬ ZEDONG

Ĉi-sube estas la teksto de parolado farita la 27-an de februaro 1957, en la Dekunua (Plivastigita) Sesio de la Plej Alta Ŝtata Konferenco, redaktita poste de kamarado Maŭ Zedong laŭ la tiama protokolo, kun kelkaj kompletigoj, kaj publikigita en Renmin Ribao (Popola Ĵurnalo) *la 19-an de junio 1957.*

Nia ĝenerala subjekto estas pri la ĝusta traktado de kontraŭdiroj interne de la popolo. Por plifaciligi la diskutadon, ni dividu ĝin en dek du subtitolojn. Kvankam ni ankaŭ tuŝos ĉi tie la problemon de kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj, tamen ni ĉefe diskutos pri kontraŭdiroj interne de la popolo.

1. DU EN NATURO MALSAMAJ SPECOJ DE KONTRAŬDIROJ

Nuntempe nia lando estas senprecedence unuigita. La venkoj de la revolucioj de burĝa demokratio kaj socialismo kaj niaj atingoj en la socialisma konstruado rapide transformis la fizionomion de la malnova Ĉinio. Antaŭ ni kuŝas des pli bela estonteco de la patrio. La stato de malunueco kaj ĥaoso de la nacio kiun la popolo malŝatis estas jam forpasinta por ĉiam. Sub la gvido de la laborista klaso kaj la Komunista Partio, nia sescentmiliona popolo estas entreprenanta la grandan socialisman konstruadon en perfekta solidareco. La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero. Tamen, tio ne signifas ke en nia socio jam ne estas plu iaj ajn kontraŭdiroj. La penso de malesto de kontraŭdiroj estas supozo naiva, kiu ne konformas al la objektiva realeco. Antaŭ ni estas du specoj de sociaj kontraŭdiroj — la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj en la interno de la popolo. Tiuj ĉi du specoj de kontraŭdiroj estas tute malsamaj en naturo.

Por ĝuste koni tiujn ĉi du malsamajn specojn de kontraŭdiroj, oni devas unue kompreni klare kio estas "la popolo" kaj kio "la malamikoj". La koncepto de "la popolo" tenas en si malsaman enhavon en malsamaj landoj kaj en malsamaj historiaj periodoj de ĉiu aparta lando. Prenu nian landon kiel ekzemplon. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĉiuj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj kiuj kontraŭstaris la japanan agreson apartenis al la kategorio de la popolo, dum la japana imperiismo, ĉinaj naciperfiduloj kaj projapanaj elementoj ĉiuj estis la malamikoj de la popolo. Dum la periodo de la Liberiga Milito, la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, nome la klasoj de burokrat-kapitalistoj kaj bienuloj kaj la kuomintangaj reakciuloj, kiuj reprezentis tiujn ĉi du klasojn, ĉiuj estis la malamikoj de la popolo, dum ĉiuj aliaj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj kiuj kontraŭstaris tiujn ĉi malamikojn apartenis al la kategorio de la popolo. En la nuna stadio, en la periodo de socialisma konstruado, ĉiuj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj, kiuj aprobas, subtenas kaj partoprenas la aferon de la socialisma konstruado, apartenas al la kategorio de la popolo, dum ĉiuj sociaj fortoj kaj grupoj, kiuj rezistas kontraŭ la socialisma revolucio, sin tenas malamikaj al la socialisma konstruado kaj penas ĝin detrui, estas la malamikoj de la popolo.

La kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj estas antagonismaj kontraŭdiroj. Interne de la popolo, la kontraŭdiroj inter la laborantaj popolanoj estas neantagonismaj, dum tiuj inter la ekspluatata kaj ekspluatanta klasoj havas, krom la antagonisman flankon, ankaŭ la flankon neantagonisman. Kontraŭdiroj interne de la popolo ja ne ekestas nur nun, tamen ili havas en si malsaman enhavon en diversaj revoluciaj periodoj ol en la periodo de socialisma konstruado. En la kondiĉoj de hodiaŭa Ĉinio, tio kion ni nomas kontraŭdiroj interne de la popolo inkluzivas la jenon: kontraŭdiroj interne de la laborista klaso, kontraŭdiroj interne de la kamparanaro, kontraŭdiroj interne de la intelektularo, kontraŭdiroj inter la laborista kaj kamparana klasoj, kontraŭdiroj inter la laboristoj kaj kamparanoj unuflanke kaj la intelektuloj aliflanke, kontraŭdiroj inter la laborista klaso kaj la aliaj sekcioj de la laboranta popolo unuflanke kaj la nacia burĝaro aliflanke, kontraŭdiroj interne de la nacia burĝaro, k.t.p. Nia popola registaro estas registaro kiu efektive reprezentas la interesojn de la popolo kaj servas al ĝi, sed sin trovas ankaŭ certaj kontraŭdiroj inter la registaro kaj la popolamasoj. Tiuj inkluzivas la kontraŭdirojn inter la ŝtataj interesoj, kolektivaj interesoj kaj individuaj interesoj, inter demokratio kaj centralizismo, inter la gvidantoj kaj la gvidatoj, kaj inter la burokrata laborstilo de iuj el la laborantoj de la ŝtataj organoj kaj la popolamasoj. Ankaŭ ili estas kontraŭdiroj interne de la popolo. Ĝeneral-dire, la kontraŭdiroj interne de la popolo estas kontraŭdiroj sur la bazo de fundamenta identeco de la interesoj de la popolo.

En nia lando, la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro apartenas al la kategorio de kontraŭdiroj interne de la popolo. La klasbatalo inter la du klasoj estas ĝenerale klasbatalo interne de la popolo, ĉar la nacia burĝaro de nia lando havas duoblan karakteron. En la periodo de la burĝ-demokratia revolucio, ĝi havis flankon revolucieman, kaj ankaŭ flankon kompromiseman. En la periodo de socialisma revolucio, ĝi havis la flankon de ekspluatado al la laborista klaso por gajni profiton, kaj ankaŭ tiun de subtenado al la Konstitucio kaj volonteco akcepti socialisman transformadon. La nacia burĝaro diferencas de la imperiistoj, bienuloj kaj burokrat-kapitalistoj. La kontraŭdiro de ekspluatanto kaj ekspluatato, kiu ekzistas inter la nacia burĝaro kaj la laborista klaso, estas ja kontraŭdiro antagonisma. Sed en la konkretaj kondiĉoj de nia lando, la antagonisma kontraŭdiro inter la du klasoj, se bone traktate, povas esti transformita en neantagonisman kontraŭdiron kaj solvita en paca maniero. Tamen, se ĝi ne estas bone traktata, se ni ne alprenas la politikon de unuiĝo, kritikado kaj edukado en rilato kun la nacia burĝaro aŭ la nacia burĝaro ne akceptas tiun nian politikon, do la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro povas turniĝi en kontraŭdiron inter ni kaj la malamikoj.

Pro tio ke la karaktero de la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj diferencas de tiu de la kontraŭdiroj interne de la popolo, ankaŭ



Feng Fuŝeng (staranta), aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la Aera Armeo de ĈPLA parolas en kunsido por interŝanĝi sperton kaj komprenajojn en la lernado.

la manieroj por solvi ilin devas esti malsamaj. Mallonge dirite, la antaŭa estas problemo de klara distingo inter ni kaj la malamikoj, dum la lasta estas problemo de klara distingo inter pravo kaj malpravo. Kompreneble, la problemo de distingo inter ni kaj la malamikoj estas ankaŭ problemo de distingo inter pravo kaj malpravo. Ekzemple, la problemo, kiuj estas pravaj, ni aŭ la reakciuloj enlandaj kaj eksterlandaj — la imperiistoj, la feŭdistoj kaj la burokrat-kapitalistoj — estas ankaŭ problemo de pravo kaj malpravo, sed ĝi estas problemo de pravo kaj malpravo de alia kategorio kaj diferencas en naturo de tiu interne de la popolo.

Nia ŝtato estas tiu de popol-demokratia diktaturo sub la gvido de la laborista klaso surbaze de la alianco de laboristaro kaj kamparanaro. Por kio estas tiu ĉi diktaturo? Ĝia unua funkcio estas subpremi en la lando la reakciajn klasojn, reakciulojn kaj tiujn ekspluatantojn kiuj rezistas kontraŭ la socialisma revolucio, subpremi tiujn kiuj penas detrui nian socialisman konstruadon, tio estas, por solvi la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj en la lando. Ekzemple, aresti, juĝi kaj kondamni iujn kontraŭrevoluciulojn kaj senigi dum difinita periodo la elementojn de bienula kaj burokrat-kapitalista klasoj je la rajto de voĉdono kaj libereco de parolo — ĉio ĉi tio estas en la sfero de la diktaturo. Por konservi la socian ordon kaj gardi la interesojn de la vasta popolo, ni devas ankaŭ praktiki diktaturon super rabistoj, ŝtelistoj, friponoj, murdistoj, incendiistoj, kanajlaj klikoj kaj aliaj malbonaj elementoj kiuj serioze disrompas la socian ordon. La dua funkcio de tiu diktaturo estas defendi nian landon kontraŭ renversaj agadoj kaj ebla agreso fare de la eksteraj malamikoj. Se aperos tia situacio, la diktaturo prenos sur sin la taskon solvi la kontraŭdiron inter ni kaj la eksteraj malamikoj. La celo de la diktaturo estas defendi nian tutan popolon, por ke ĝi povu pace labori kaj konstrui nian landon en socialisman landon kun modernaj industrio, agrikulturo, scienco kaj kulturo. Kiu praktikas tiun diktaturon? Kom-

preneble la laborista klaso kaj la popolo sub ĝia gvido. La sistemo de diktaturo ne aplikiĝas interne de la popolo. La popolo ne povas praktiki diktaturon super si mem, nek devas unu parto de ĝi subpremi la alian. Leĝorompantaj elementoj inter la popolo estos ankaŭ punataj laŭ la leĝo, sed tio estas diferenca en principo de la uzado de diktaturo por subpremi la malamikojn de la popolo. Interne de la popolo estas aplikata demokratia centralizismo. Nia Konstitucio difinas ke civitanoj de la Ĉina Popola Respubliko ĝuas liberecon de parolo, de eldono, de kunveno, de asociado, de parado, de manifestacio, de religia kredo, k.t.p. Nia Konstitucio ankaŭ difinas ke ŝtataj organoj devas praktiki demokratian centralizismon kaj sin apogi sur la popolamasoj, kaj la laborantoj de ŝtataj organoj devas servi al la popolo. Nia socialisma demokratio estas demokratio en la plej vasta senco, kian ne povas havi iu ajn kapitalisma lando. Nia diktaturo estas nomata la popol-demokratia diktaturo gvidata de la laborista klaso surbaze de la alianco de laboristaro kaj kamparanaro. Tio montras, ke demokratio estas praktikata interne de la popolo, dum la laborista klaso, en unuiĝo kun ĉiuj popolanoj kiuj ĝuas civitanajn rajtojn, unue kun la kamparanoj, praktikas diktaturon super la reakciaj klasoj, reakciaj klikoj kaj tiuj elementoj kiuj kontraŭstaras socialisman reformadon kaj socialisman konstruadon. Per civitanaj rajtoj ni aludas politike la rajtojn de libereco kaj demokratio.

Tamen tiu ĉi libereco estas libereco kun gvidado kaj tiu ĉi demokratio estas demokratio sub la direktado de centralizo, sed ne anarkio. Anarkio ne konformas al la interesoj kaj deziroj de la popolo.

Kelkiuj en nia lando ĝojis post kiam la hungara evento okazis. Ili esperis ke io simila ankaŭ okazos en Ĉinio kaj miloj kaj miloj da homoj manifestacios surstrate kontraŭ la popola registaro. Tiaj esperoj estas kontraŭ la interesoj de la popolamasoj kaj sekve ne povas ricevi ilian subtenon. Parto de la amasoj en Hungario, trompite de enlandaj kaj eksterlandaj kontraŭrevoluciuloj, erare faris perfortajn agojn kontraŭ la popola registaro, kun la rezulto ke la ŝtato kaj la popolo ambaŭ suferis pro tio. La ekonomia damaĝo kaŭzita de kelksemajna tumulto bezonos longan tempon por ripariĝo. Kelkaj aliaj en nia lando montris ŝanceliĝon rilate al la hungara evento, ĉar ili ne konis la aktualan situacion de la mondo. Ili opiniis ke sub nia popola demokratio estas tro malmulte da libereco, ne tiom multe kiom sub la okcidenta parlamenta demokratio. Ili postulis ke ni alprenu la dupartian sistemon de la Okcidento kie unu partio estas en potenco dum la alia ne. Sed la tiel nomata dupartia sistemo estas nenio alia ol rimedo por konservi la diktaturon de la burĝaro; ĝi absolute ne povas gardi la liberecon de la laboranta popolo. Fakte en la mondo ekzistas nur konkreta libereco kaj konkreta demokratio, sed ne abstrakta libereco kaj abstrakta demokratio. En socio kun klasbatalo, kiam estas libereco por la ekspluatantaj klasoj ekspluati la laborantan popolon, tiam ne povas esti libereco por la laboranta popolo ne esti ekspluatata; kiam estas demokratio por la burĝaro, tiam ne povas esti demokratio por la proletaro kaj laboranta popolo. En kelkaj kapitalismaj landoj la komunistaj partioj estas permesitaj laŭleĝe ekzisti, sed nur ĝis la limo ke ili ne endanĝerigu la fundamentajn interesojn de la burĝaro; ekster tio ili jam ne estas permesitaj. Homoj kiuj postulas abstraktan liberecon kaj abstraktan demokration opinias ke demokratio estas celo kaj ne rekonas ke ĝi estas rimedo. Demokratio kelkfoje ŝajnas celo, sed efektive ĝi estas nur rimedo. Marksismo instruas al ni ke demokratio estas parto de la superstrukturo kaj apartenas al la kategorio de politiko. Tio estas, en analizo ĝis la fino, ĝi servas al la ekonomia bazo. Tia estas ankaŭ libereco. Demokratio kaj libereco ambaŭ estas relativaj, ne absolutaj, kaj ili estiĝas kaj disvolviĝas sub certaj historiaj cirkonstancoj. Interne de la popolo, demokratio estas korelativa al centralizismo, dum libereco al disciplino. Ili estas du kontraŭdirantaj flankoj de unueca ento, kiuj estas kaj kontraŭdiraj kaj unuecaj, kaj ni ne devas unuflankece emfazi unu flankon kaj nei la alian. Interne de la popolo, ne povas esti sen libereco, nek sen disciplino; ne povas esti sen demokratio, nek sen centralizismo. La unueco de demokratio kaj centralizismo kaj tiu de libereco kaj disciplino estas nia demokratia centralizismo. Sub tiu ĉi sistemo, la po-

polo ĝuas vastajn demokration kaj liberecon, sed samtempe ili devas sin limigi per socialisma disciplino. Ĉion ĉi tion bone komprenas la vastaj popolamasoj.

Ni pledas por libereco kun gvidado kaj demokratio sub centralizita direktado, tio neniel signifas ke devigaj metodoj povas esti uzataj por solvi problemojn ideologiajn kaj problemojn koncerne distingon de pravo kaj malpravo interne de la popolo. Ia ajn provo solvi problemojn ideologiajn aŭ problemojn koncernantajn pravon kaj malpravon per administraj ordonoj aŭ devigaj metodoj estos ne nur senefika sed eĉ malutila. Ni ne povas forigi religion per administraj ordonoj, nek devigi homojn ne kredi je ĝi. Ni ne povas devigi homojn forlasi ideismon, nek devigi ilin kredi je marksismo. Ĉiujn problemojn de ideologia naturo, ĉiujn disputeblajn problemojn interne de la popolo ni povas solvi nur per demokratiaj metodoj, per metodoj de diskuto, de kritiko, de persvado kaj eduko, sed ne per devigaj kaj subpremaj metodoj. Por entrepreni produktadon kaj lernadon efike kaj vivi sian vivon bonorde, la popolo volas ke ĝia registaro, la gvidantoj de produktado kaj de kulturaj kaj edukaj organoj publikigu diversajn konvenajn administrajn ordonojn kun deviga naturo. Estas komuna scio de ĉiuj, ke sen tiaj administraj ordonoj la konservado de socia ordo estas neebla. Administraj ordonoj kaj la metodo de persvado kaj edukado estas du flankoj, kiuj interkompletigas unu la alian por solvi la kontraŭdirojn interne de la popolo. Administraj ordonoj publikigitaj por la konservado de socia ordo ankaŭ devas esti akompanataj per persvadado kaj edukado, ĉar en multaj kazoj solaj administraj ordonoj ne efikas.

En 1942 ni konkretigis tiun ĉi demokratian metodon por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo en la formulon "unuiĝo — kritiko — unuiĝo". Por pli detale diri, ĝi signifas: starti de la deziro por unuiĝo, solvi kontraŭdirojn per kritiko aŭ batalo kaj tiamaniere atingi novan unuiĝon sur nova bazo. Nia sperto montras, ke ĝi estas ĝusta metodo por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo. En 1942 ni aplikis tiun ĉi metodon por solvi kontraŭdirojn interne de la Komunista Partio, t. e., kontraŭdirojn inter la dogmistoj kaj la vasta membraro, inter ideoj dogmismaj kaj ideoj marksismaj. Iam antaŭe la "maldekstremaj" dogmistoj uzis en la batalo interne de la Partio la metodon konatan kiel "kruelan bataladon kaj senkompatajn frapojn". Tiu ĉi estas erara metodo. Kiam ni kritikis la "maldekstreman" dogmismon, ni alprenis anstataŭ ĝi novan metodon: starti de la deziro por unuiĝo, distingi pravon kaj malpravon per kritiko aŭ batalo kaj tiamaniere atingi novan unuiĝon sur nova bazo. Tiu ĉi metodo estis uzata en la "stilĝustiga kampanjo" de 1942. Kelkajn jarojn poste en 1945 kiam la Komunista Partio de Ĉinio okazigis la Sepan Tutlandan Kongreson, unueco estis efektive atingita en la tuta Partio kaj sekve la granda venko de la popola revolucio estis gajnita. Ĉi tie, antaŭ ĉio necesas starti de la deziro por unuiĝo. Ĉar sen tiu ĉi subjektiva deziro por unuiĝo, ĉio fariĝos ĥaosa kaj ne reordigebla kiam la batalo komenciĝos, kio alia do povos fariĝi el tio krom "kruela batalado kaj senkompataj frapoj"? Ĉu tiam ankoraŭ restos ia unuiĝo partia? El tiu ĉi sperto ni trovis la formulon: "unuiĝo — kritiko — unuiĝo". Aŭ, alivorte, "lerni el la pasintaj eraroj por eviti la estontajn" kaj "kuraci la malsanon por savi la malsanulon". Ni etendis tiun ĉi metodon ekster la Partion. En la kontraŭjapanaj bazlokoj ni uzis tiun ĉi metodon en traktado de la rilatoj inter la gvidantoj kaj la amasoj, inter la armeo kaj la civiluloj, inter oficiroj kaj soldatoj, inter diversaj unuoj de la armeo kaj inter diversaj grupoj de kadroj, kaj ni akiris grandajn sukcesojn. La apliko de tiu ĉi metodo povas esti retrospurata ĝis pli frua tempo en la historio de nia partio. Ekde 1927 kiam ni starigis niajn revoluciajn armeojn kaj bazlokojn en la sudo, ni jam uzis ĝin en traktado de la rilatoj inter la Partio kaj la popolamasoj, inter la armeo kaj la civiluloj, inter oficiroj kaj soldatoj kaj de aliaj rilatoj interne de la popolo. Tamen, dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ni starigis la metodon sur pli memkonscia bazo. Post la Liberiĝo de la tuta lando, ni aplikis tiun saman metodon "unuiĝo — kritiko — unuiĝo" en niaj rilatoj kun la demokrataj partioj kaj industriaj kaj komercaj rondoj. Nia nuna tasko estas plu disvastigi kaj pli bone apliki tiun metodon interne de la tuta popolo, postulante ke ĉiuj fabrikoj, kooperativoj, firmoj, lernejoj, registaraj organoj, publikaj organizoj,

unuvorte, nia sescentmiliona popolo, uzu tiun metodon por solvi kontraŭdirojn inter si.

Sub ordinaraj cirkonstancoj, kontraŭdiroj interne de la popolo ne estas antagonismaj. Sed, se ili ne estas konvene traktataj, aŭ se ni perdas nian atentemon kaj malstreĉas nian gardemon, ankaŭ povas estiĝi antagonismo. En socialismaj landoj tiaj okazaĵoj estas ĝenerale nur fenomenoj lokaj kaj maldaŭraj. Tiel estas, ĉar en la socialismaj landoj ekspluatado de homo al homo estas forigita kaj la interesoj de la popolo estas fundamente samaj. La vastecon de la skalo de la antagonismaj agadoj montritan en la hungara evento kaŭzis tio ke en ĝi efikis enlandaj kaj eksterlandaj kontraŭrevoluciaj faktoroj. Tio estis fenomeno speciala kaj ankaŭ maldaŭra. La enlandaj reakciuloj en socialisma lando, en koluzio kun la imperiistoj, utiligas la internajn kontraŭdirojn de la popolo por inciti malunuecon kaj malakordon kaj ventumi la flamojn de malordo, intencante atingi siajn konspirajn celojn. La leciono de la hungara evento indas nian atenton.

Multaj pensas ke la propono uzi demokratiajn metodojn por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo estas nova problemo. Sed fakte ĝi ne estas tia. Marksistoj ĉiam opinias ke la afero de la proletaro povas apogi sin nur sur la popolamasoj kaj ke komunistoj devas uzi demokratiajn metodojn de persvado kaj eduko kiam ili laboras interne de la laboranta popolo kaj nenial devas preni ordonisman teniĝon aŭ devigajn metodojn. La Komunista Partio de Ĉinio fidele sekvas tiun ĉi marksismleninisman principon. Ni ĉiam asertas ke sub la popol-demokratia diktaturo, du malsamaj metodoj — diktatura kaj demokratia — devas esti prenitaj por solvi la du en naturo malsamajn specojn de kontraŭdiroj — tiuj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo. Tiu ĉi ideo estas multe priparolita en multaj dokumentoj de nia partio kaj en eldiroj de multaj niaj partiaj respondeculoj. En mia artikolo "Pri Popol-demokratia Diktaturo" skribita en 1949, mi diris: "La kombino de ĉi tiuj du flankoj, demokratio interne de la popolo kaj diktaturo al la reakciularo, estas popol-demokratia diktaturo." Mi ankaŭ montris ke por solvi problemojn interne de la popolo, "la metodo kiun ni aplikas ĉirilate estas demokratia metodo, t. e., metodo de persvado kaj ne de devigo". En la parolado farita en la Dua Sesio de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco en junio, 1950, mi diris refoje: "La popol-demokratia diktaturo uzas du metodojn. Rilate al la malamikoj ĝi uzas la metodon de diktaturo, t. e., dum daŭro de tempo necesa, ĝi malpermesas ilin partopreni en politikaj agadoj, devigas ilin obei la leĝojn de la Popola Registaro kaj devigas ilin labori kaj sin reformi en novajn homojn en la laborado. Rilate al la popolo, ĝi kontraŭe ne uzas devigajn metodojn sed demokratiajn, t. e., ĝi devas permesi la popolon partopreni en politikaj agadoj, kaj anstataŭ devigi ilin fari tion aŭ ĉi tion, apliki ĉe ili la demokratian metodon de persvado kaj eduko. Tiu eduko estas sineduko interne de la popolo, kaj kritiko kaj memkritiko estas la fundamenta metodo de sineduko." Multajn fojojn en la pasinteco ni jam parolis pri la problemo de la uzado de demokratiaj metodoj por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo, kaj cetere ni ja fundamente tiel faras en nia laboro kaj multaj kadroj kaj popolanoj komprenas tiun ĉi problemon en la praktiko. Pro kio do iuj ankoraŭ pensas nun ke ĝi estas nova problemo? La kialo estas ke en la pasinteco la lukto inter ni kaj la malamikoj estis tre akra ambaŭ enlande kaj eksterlande, sekve kontraŭdiroj interne de la popolo ankoraŭ ne estis tiel atentataj kiel hodiaŭ.

Multaj personoj ne povas klare distingi la diferencon inter la du en naturo malsamaj specoj de kontraŭdiroj — tiuj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo — kaj facile konfuzas ilin. Ni devas konfesi ke ili estas iatempe facile konfuzeblaj. En nia pasinta laboro ni ankaŭ konfuzis ilin. En la laboro de eliminado de kontraŭrevoluciuloj ni iam erare prenis bonulojn por malbonuloj. Tiaj aferoj okazis antaŭe kaj ankoraŭ okazas nun. Niaj eraroj ne estas plivastigitaj, ĉar ni difinis en nia politiko ke ni devas fari klaran distingon inter ni mem kaj niaj malamikoj kaj ĉiuj faritaj eraroj estas reĝustigotaj.

Marksisma filozofio opinias ke la leĝo de unueco de kontraŭoj estas fundamenta leĝo de la universo. Tiu ĉi leĝo ekzistas ĉie, aŭ



Kune kun la PLA-anoj, kiuj venis por helpi en milita kaj politika trejnado, la junaj revoluciuloj de la Pekina Instruista Universitato studas la brilan verkon Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo.

en la natura mondo, aŭ en la homa socio, aŭ en homa penso. Kontraŭaj flankoj en kontraŭdiro samtempe unuiĝas kaj batalas inter si, kaj tiel antaŭenpuŝas la aferojn moviĝi kaj ŝanĝiĝi. Kontraŭdiroj ekzistas ĉie, sed ili diferencas en naturo laŭ la diferenco en la naturo de diversaj aferoj. Por ĉiu ajn konkreta afero, la unueco de kontraŭoj estas kondiĉa, dumtempa, transira kaj sekve relativa, dum la batalo inter la kontraŭoj estas absoluta. Lenin faris tre klaran eksplikon pri tiu ĉi leĝo. En nia lando iom post iom plimultiĝas homoj kiuj ĝin komprenas. Tamen, por mŭltaj homoj akcepto de tiu leĝo estas unu afero kaj ĝia apliko en observado kaj traktado de problemoj estas alia afero. Multaj ne kuraĝas konfesi publike ke interne de la popolo en nia lando ankoraŭ ekzistas kontraŭdiroj, ja ĝuste tiuj kontraŭdiroj puŝas nian socion disvolviĝi antaŭen. Multaj rifuzas rekoni ke en socialisma socio ankoraŭ ekzistas kontraŭdiroj kaj rezulte de tio ili fariĝas timemaj kaj senkonsile pasivaj antaŭ sociaj kontraŭdiroj. Ili ne komprenas ke en la procezo de daŭra traktado kaj solvado de kontraŭdiroj laŭ ĝusta maniero plifirmiĝos la unueco kaj solidareco en la interno de socialisma socio. Pro tiu ĉi kaŭzo estas necese ke ni faru klarigadon al nia popolo, kaj unue al niaj kadroj, por helpi ilin koni kontraŭdirojn en socialisma socio kaj lerni alpreni ĝustan metodon por trakti tiajn kontraŭdirojn.

Kontraŭdiroj en socialisma socio diferencas radikale de tiuj en malnovaj socioj, ekzemple en kapitalisma socio. Kontraŭdiroj en kapitalisma socio manifestiĝas en akraj antagonismoj kaj konfliktoj, en akra klasbatalo, kaj tiaj kontraŭdiroj povas esti solvitaj ne per la kapitalisma sistemo mem sed nur per socialisma revolucio. Kontraŭdiroj en socialisma socio estas alia afero, ili kontraŭe ne estas antagonismaj kaj povas esti solvitaj unu post alia per la socialisma socio mem.

La fundamentaj kontraŭdiroj en socialisma socio estas ankoraŭ tiuj inter la produktaj rilatoj kaj la produktaj fortoj, inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo. La nura diferenco estas ke tiuj ĉi kontraŭdiroj en socia-

lisma socio havas radikale malsamajn karakterojn kaj cirkonstancojn ol la kontraŭdiroj inter la produktaj rilatoj kaj la produktaj fortoj, kaj inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo en la malnovaj socioj. La nuna socia sistemo de nia lando estas multe pli supera ol tiu de la malnovaj epokoj. Se ĝi ne estus tia, la malnova sistemo ne povus esti renversita kaj la nova sistemo ne povus stariĝi. Kiam ni diras ke la socialismaj produktaj rilatoj povas esti pli konvenaj al la karaktero de disvolviĝo de la produktaj fortoj ol la malnovaj produktaj rilatoj, ni volas diri ke la antaŭaj permesas rapidan disvolviĝon de la produktaj fortoj kun tia rapideco kia ne ekzistis en la malnovaj socioj, tiel ke la produktado povas senĉese pligrandiĝi kaj la konstante kreskantaj bezonoj de la popolo povas esti paŝon post paŝo kontentigataj. Sub la regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo, produktado en malnova Ĉinio disvolviĝis ĉiam tre malrapide. Dum pli ol kvindek jaroj antaŭ la Liberiĝo, Ĉinio produktis jare nur kelkdek mil tunojn da ŝtalo, sen enkalkulo de la produkto de la nordorientaj provincoj. Se ni enkalkulas tiujn provincojn, la plej alta jarprodukto estis nur iom pli ol naŭcent mil tunoj. En 1949, la tutlanda produkto de ŝtalo estis nur cent kelkdek mil tunoj. Sed nur sep jarojn post la Liberiĝo, nia ŝtala produkto jam atingis kvar milionojn kaj kelkcent milojn da tunoj. En malnova Ĉinio, apenaŭ troviĝis maŝinkonstrua industrio menciinda; tute ne ekzistis aŭtomobila kaj aeroplana industrioj; sed nun ni jam ilin starigis. Kien Ĉinio sin direktu post kiam la regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo estis renversita de la popolo? Al kapitalismo aŭ al socialismo? Al multaj estis ne klara tiu ĉi problemo. Faktoj jam donis la respondon: Nur socialismo povas savi Ĉinion. Socialisma sistemo akcelis la rapidegan disvolviĝon de la produktaj fortoj de nia lando — tiun ĉi fakton eĉ niaj malamikoj eksterlandaj ne povas ne agnoski.

Sed nia socialisma sistemo estas jus starigita; ĝi estas ankoraŭ ne plene establita nek plene firmigita. En la ŝtate-private kune funkciigataj industriaj kaj komercaj entreprenoj, kapitalistoj ankoraŭ ricevas fiksitan procenton da interezo el sia kapitalo, t.e., ekzistas ankoraŭ ekspluatado. Rilate al posedanteco, tiuj entreprenoj estas ankoraŭ ne tute socialismaj en karaktero. Parto de la agrikulturaj kaj metiaj produktaj kooperativoj estas ankoraŭ duonsocialismaj; eĉ en la tute socialismaj kooperativoj iuj unuopaj problemoj de posedanteco ankoraŭ restas solvotaj. Rilatoj en produktado kaj interŝanĝado en diversaj sektoroj de nia ekonomio estas ankoraŭ starigataj paŝon post paŝo laŭ socialismaj principoj kaj pli kaj pli konvenaj formoj estas serĉataj. En la ekonomio de tutpopola posedanteco kaj en tiu de kolektiva posedanteco kaj inter tiuj ĉi du formoj de socialisma ekonomio, la ĝusta proporcio de akumulado kaj konsumado estas komplika problemo, kiu ne povas esti facile tuj solvita tute racie. Resume, la socialismaj rilatoj de produktado estas jam starigitaj; ili konformiĝas al la disvolviĝo de la produktaj fortoj, sed ili estas en tre granda mezuro ankoraŭ ne perfektaj, kaj tiuj neperfektaj flankoj estas kontraŭdiraj al la disvolviĝo de la produktaj fortoj. Krom la kuna ekzisto de konformeco kaj kontraŭdiro inter la rilatoj de produktado kaj la disvolviĝo de la produktaj fortoj, estas ankaŭ kuna ekzisto de konformeco kaj kontraŭdiro inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo. La superstrukturo — nia ŝtata sistemo de popol-demokratia diktaturo kaj ĝiaj leĝoj, kaj la socialisma ideologio sub la gvido de marksism-leninismo — ludas aktivan rolon por la venko de socialisma reformo kaj starigo de socialisma organizo de laboro en nia lando; ĝi estas konforma al la socialisma ekonomia bazo, t. e., la socialismaj rilatoj de produktado. Sed la ekzisto de burĝa ideologio, de ia burokrata laborstilo en niaj ŝtataj organoj kaj de mankoj en iuj ĉeneroj de nia ŝtata sistemo estas ja kontraŭdiraj al la ekonomia bazo de socialismo. Ni devas daŭre solvi la supre menciitajn kontraŭdirojn laŭ konkretaj cirkonstancoj en la estonteco. Kompreneble post la solvo de tiuj ĉi kontraŭdiroj aperos ankoraŭ novaj problemoj. Kaj la novaj kontraŭdiroj denove postulos solviĝon. Ekzemple, la kontraŭdiro inter la produktado kaj la bezonoj de la socio, kiu longe restos kiel objektiva realaĵo, bezonas konstantan reĝustigadon tra ŝtataj planoj. Ĉiujare nia lando faras ekonomian planon, fiksante ĝustan proporcion inter akumulado kaj konsumado por atingi ekvilibron inter la produktado kaj

la bezonoj de la socio. Tio, kion ni nomas ekvilibro, estas provizora relativa unueco de kontraŭoj. Post la forpaso de unu jaro tia ekvilibro en la tuto estas rompita de la batalo de kontraŭoj, la unueco akirita ŝanĝiĝas, ekvilibro fariĝas malekvilibro, unueco fariĝas malunueco kaj estas necese denove ellabori ekvilibron kaj unuecon por la venonta jaro. Tio estas la supereco de nia planita ekonomio. Fakte tia ekvilibro kaj unueco estas parte rompita ĉiumonate kaj ĉiusezone kaj partaj reĝustigoj estas necesaj. Kelkfoje, ĉar niaj subjektivaj aranĝoj estas ne konformaj al la objektivaj cirkonstancoj, kontraŭdiroj aperas kaj la ekvilibro estas rompita; tion ni nomas fari eraron. Kontraŭdiroj seninterrompe aperas kaj estas seninterrompe solvataj, tio estas la dialektika leĝo de la disvolviĝo de aferoj.

Jen estas la nunaj cirkonstancoj: La grandskalaj uraganaj klasbataloj de la amasoj dum la revolucia periodo jam fundamente finiĝis, sed klasbatalo estas ankoraŭ ne tute finita. Dum la vastaj amasoj bonvenigas la novan sistemon, ili tamen ankoraŭ ne tute alkutimiĝis al ĝi. Registaraj laborantoj estas ankoraŭ ne sufiĉe spertaj kaj devas plue ekzameni kaj esplori problemojn koncerne konkretajn politikojn. Alivorte, nia socialisma sistemo ankoraŭ bezonas tempon por daŭre sin establi kaj firmigi, la popolamasoj ankoraŭ bezonas tempon por alkutimiĝi al la nova sistemo kaj la registaraj laborantoj ankoraŭ bezonas tempon por lerni kaj akiri sperton. Sekve estas ege necese ke ni elmetu en la nuna momento la problemon streki klaran linion inter la du kategorioj de kontraŭdiroj, tiuj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo, kaj la problemon ĝuste trakti la kontraŭdirojn interne de la popolo, por ke ni unuiĝu kun la popolo de ĉiuj nacioj en nia lando por entrepreni novan batalon — la batalo kontraŭ la naturo — por disvolvi niajn ekonomion kaj kulturon, ebligi al nia tuta popolo trapasi pli glate la nunan transiran periodon, plifirmigi nian novan sistemon kaj konstrui nian novan ŝtaton.

2. LA PROBLEMO DE ELIMINO DE KONTRAŬREVOLUCIULOJ

La problemo de elimino de kontraŭrevoluciuloj estas problemo de lukto en la kontraŭdiro inter ni kaj la malamikoj. Interne de la popolo iuj havas iom malsamajn opiniojn rilate al tiu ĉi problemo. Sin trovas du specoj de homoj kies opinioj diferencas de la niaj. Tiuj kiuj havas dekstreman penson faras nenian distingon inter ni kaj la malamikoj kaj erare prenas la malamikojn por homoj el ni mem. Ili rigardas kiel amikojn tiujn personojn, kiujn la vastaj popolamasoj rigardas kiel malamikojn. Tiuj kiuj havas "maldekstreman" penson tiel pligrandigas la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj ke ili erare prenas iujn kontraŭdirojn interne de la popolo por tiuj inter ni kaj la malamikoj, kaj rigardas kiel kontraŭrevoluciulojn ankaŭ tiujn personojn kiuj estas efektive ne tiaj. Ambaŭ opinioj estas eraraj. Neniu el ili ebligos nin ĝuste trakti la problemon de eliminado de kontraŭrevoluciuloj aŭ ĝuste taksi tiun ĉi laboron.

Por ĝuste taksi nian laboron en eliminado de kontraŭrevoluciuloj, estus utile rigardi kian influon la hungara evento havis al nia lando. Tiu evento kaŭzis ioman ŝanceliĝon al parto de niaj intelektuloj sed okazis nenia uragano. Kial? Ni devas diri ke unu el la kaŭzoj estis ke ni sukcesis elimini sufiĉe ĝisfunde kontraŭrevoluciulojn.

Kompreneble la firmiĝo de nia lando ne estas ĉefe pro la eliminado de kontraŭrevoluciuloj. Ĝi estas ĉefe pro la fakto ke ni havas la Komunistan Partion kaj la Liberigan Armeon harditajn tra jardekoj da revolucia luktado, kaj ke ni havas laborantan popolon same harditan. Niaj partio kaj Armeo estas enradikiĝintaj en la popolamasoj; ili estas elharditaj en la flamoj de longdaŭra revolucio; ili havas batalpovon. Anstataŭ fondiĝi tute abrupte, nia Popola Respubliko disvolviĝis paŝon post paŝo el la revoluciaj bazlokoj. Iuj demokratoj estas ankaŭ harditaj en diversaj gradoj dum la batalado kaj ili dividis kun ni la suferojn kaj zorgojn. Iuj intelektuloj estis harditaj en la bataloj kontraŭ imperiismo kaj reakciaj fortoj; post la Liberiĝo multaj travivis ideologian remuldon kiu celis klare distingi la limon inter ni kaj la malamikoj. Krome, la firmiĝo de nia lando dankas ankaŭ al la faktoj ke la ekonomiaj rimedoj de ni alprenitaj estas fundamente ĝustaj, ke la vivo de la popolo estas stabila kaj estas konstante pliboniĝanta, ke niaj poli-

tikoj kontraŭ la nacia burĝaro kaj aliaj klasoj estas ankaŭ ĝustaj, k.t.p. Tamen nia sukceso en la eliminado de kontraŭrevoluciuloj estas sendube unu el la gravaj kialoj por la firmiĝo de nia ŝtato. Dank' al ĉio ĉi tio kvankam multaj el niaj universitataj studentoj devenas de familioj aliaj ol tiuj de la laboranta popolo, ili ĉiuj kun malmultaj esceptoj estas patriotaj kaj subtenas socialismon; ili montris neniam malkvieton dum la hungara evento. Tia estis ankaŭ la nacia burĝaro, ne parolu jam pri la bazaj amasoj — la laboristaro kaj kamparanaro.

Post la Liberiĝo ni eliminis aron da kontraŭrevoluciuloj. Iuj kiuj faris gravajn krimojn estis kondamnitaj al morto. Tio estis absolute necesa; ĝi estis la postulo de la vastaj amasoj; ĝi estis farita por liberigi la vastajn amasojn kiuj estis longtempe subpremataj de kontraŭrevoluciuloj kaj ĉiuj lokaj tiranoj, alivorte, por liberigi la produktajn fortojn. Se ni ne estus tiel agintaj, la popolanoj ne estus povintaj levi la kapojn. La situacio tamen radikale ŝanĝiĝis depost 1956. Konsidere la tutan landon, la ĉefa forto de kontraŭrevoluciuloj estas jam likvidita. Nia fundamenta tasko turniĝis de liberigo de la produktaj fortoj en protektadon kaj disvolvadon de ili sub la novaj rilatoj de produktado. Iuj personoj ne komprenas ke nia nuna politiko estas taŭga por la nuna situacio kaj nia pasinta politiko estis taŭga por la pasinta situacio; ili volas utiligi la nunan politikon por renversi la pasintajn juĝdecidojn kaj nei la grandan sukceson kiun ni tiutempe atingis en la eliminado de kontraŭ*revoluciuloj. Tio estas tute erara kaj la popolo* neniam ĝin permesos.

En la laboro de eliminado de kontraŭrevoluciuloj, la ĉefa afero estas ke ni akiris sukcesojn, sed ni ankaŭ faris erarojn. Ambaŭ ekscesoj kaj preterlasoj estis faritaj. Nia politiko estas: "Kontraŭrevoluciuloj estu nepre eliminotaj kaj ĉiu eraro nepre korektota kiam ajn trovita". La linio kiun ni sekvis en tiu laboro estis tiu de eliminado de kontraŭrevoluciuloj per la amaso mem. Kompreneble, malgraŭ la alpreno de tiu amaslinio, eraroj ankoraŭ povos okazi en nia laboro, sed ili estos pli malmultaj kaj pli facile korekteblaj. La popolamasoj akiris sperton el la luktado. El tio kio estis ĝuste farita ili akiris sperton de ĝusta agado. El tio kio estis erare farita ili akiris sperton de erara agado.

Al ĉiuj trovitaj eraroj faritaj en la laboro de eliminado de kontraŭrevoluciuloj ni jam faris aŭ nun faras paŝojn reĝustigajn. Tiujn kiuj estas ankoraŭ ne trovitaj ni estas pretaj tuj korekti kiam ili estos trovitaj. Decidoj de reĝustigo devas esti publikigitaj en la sama rondo kie la eraraj decidoj estis antaŭe faritaj. Mi proponas ke tutampleksa kontrolo pri la laboro de eliminado de kontraŭrevoluciuloj estu entreprenota ĉijare aŭ venontjare por resumi sperton, kuraĝigi spiriton de justeco kaj kontraŭbatali malsanecajn tendencojn. Centrale tiun ĉi taskon traktu la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Konstanta Komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; kaj loke la provincaj kaj urbaj popolaj konsiloj kaj komitatoj de Popolaj Politikaj Interkonsiliĝaj Konferencoj. En la kontrolado de laboro, ni devas helpi la multnombrajn funkciulojn kaj aktivulojn anstataŭ verŝi malvarman akvon sur ilin. Estas malprave verŝi sur ilin malvarman akvon. Tamen maljustaĵoj devas esti tuj reĝustigitaj kiam ili estas trovitaj. Tiel sinteni devas ĉiuj organoj de publika sekureco, prokurorejoj kaj juĝejoj, malliberejoj kaj administrejoj respondecaj pri la reformo de krimuloj per laborado. Ni esperas ke kiam ajn eble la membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj la popolaj reprezentantoj, ĉiuj partoprenu en tiu ĉi kontrolado. Ĝi estos helpodona por perfektigi nian leĝan sistemon kaj ĝuste trakti kontraŭrevoluciulojn kaj aliajn krimulojn.

La nuna stato de kontraŭrevoluciuloj estas prezentebla per jenaj vortoj: Sin trovas ankoraŭ kontraŭrevoluciuloj, sed ne multaj. Antaŭ ĉio sin trovas ankoraŭ kontraŭrevoluciuloj. Iuj asertas ke jam ne plu estas kontraŭrevoluciuloj kaj ĉio estas en ordo, kaj ke ni povas alte meti niajn kapkusenojn por trankvile endormiĝi. Tio ne estas kiel la fakto statas. Fakte ankoraŭ troviĝas kontraŭrevoluciuloj (kompreneble tio ne signifas ke vi povas trovi ilin ĉie kaj en ĉiu organizo), kaj ni devas daŭrigi la bataladon kontraŭ ili. Oni devas

kompreni ke la kaŝitaj kontraŭrevoluciuloj ankoraŭ ne eliminitaj neniam akceptos la malvenkon volonte kaj nepre kaptos ĉiun ŝancon por krei malordon, kaj ke la usonaj imperiistoj kaj la Ĉiang Kajŝek-a kliko estas konstante sendantaj spionojn ĉi tien por plenumi detruajn agadojn. Eĉ kiam ĉiuj ekzistantaj kontraŭrevoluciuloj estas elradikitaj, novaj kontraŭrevoluciuloj povos ankoraŭ aperi. Se ni perdus nian viglan gardemon, ni estos ege trompitaj kaj suferos grandan damaĝon. Kie ajn troviĝas kontraŭrevoluciuloj kreantaj malkvieton, ni devas firme ekstermi ilin. Sed, parole pri la tuta lando, efektive troviĝas ne multaj kontraŭrevoluciuloj. Estus erare diri ke sin trovas ankoraŭ tre multe da kontraŭrevoluciuloj. La akcepto de tiu ĉi vidpunkto ankaŭ rezultigos konfuzon.

3. LA PROBLEMO DE AGRIKULTURA KOOPERIGO

Nia lando havas agrikulturan loĝantaron de pli ol kvin cent milionoj, tial la stato de la kamparanaro havas tre gravan rilaton al la disvolviĝo de nia ekonomio kaj la firmiĝo de nia ŝtata potenco. Laŭ mia opinio, la stato estas fundamente bona. La kooperigado jam sukcese plenumiĝis; tio solvis la grandan kontraŭdiron inter socialisma industriigo kaj individua agrikultura ekonomio en nia lando. La kooperigado plenumiĝis rapide, kaj tiel iuj timis, ĉu el tio ne rezultos iaj difektoj. Kvankam troviĝis iom da difektoj, feliĉe ili ne estis gravaj. La kooperigado estis fundamente sana. La kamparanoj laboras entuziasme, kaj lastjare, malgraŭ ke la inundoj, sekeco kaj tajfunoj estis pli seriozaj ol en la pasintaj kelkaj jaroj, la grenprodukto de la tuta lando ankoraŭ pliiĝis. Sed nun iuj personoj incitis miniaturan tajfunon, grumblante ke la kooperigado ne taŭgas kaj ke ĝi havas neniom da supereco. Ĉu la kooperigado havas superecon finfine? Inter la dokumentoj disdonitaj ĉi tie hodiaŭ estas unu pri la Vang Guofan-a Kooperativo en Zunhua-gubernio, Hebej-provinco, kiu indas tralegon. La loko kie la kooperativo situas estas montregiono, kiu estis tre malriĉa en la pasinteco kaj dependis de helpgreno tien alportita ĉiun jaron de la Popola Registaro. Kiam la kooperativo estis unue starigita en 1953, oni nomis ĝin "malriĉula kooperativo". Sed post kvar jaroj da malfacilega luktado, ĝi fariĝis ĉiam pli prospera jaron post jaro kaj nun la plejparto de la familioj de ĝiaj membroj ekhavas rezervitan grenon. Tio, kion la Vang Guofan-a Kooperativo povis fari, devas esti atingebla ankaŭ por la aliaj kooperativoj sub normalaj kondiĉoj, eventuale en iom pli longa tempo. Sekve estas videble ke senbaza estas la opinio ke la kooperigado malbonas.

El tio ankaŭ klare videblas ke kooperativoj devas esti starigataj tra malfacila luktado. Ĉiu ajn novaĵo trapasas malfacilan kaj zigzagan vojon en sia kreskado. Estus simpla fantazio supozi ke oni povas facile sukcesi en socialisma afero sub konstanta favora vento sen malfacileco, zigzago kaj grandega penado.

Kiuj estas la aktivaj subtenantoj de la kooperativoj? Ili estas la superega plimulto de la malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiuj formas pli ol 70 procentojn el la kampara loĝantaro. La plejparto de la ceteraj ankaŭ portas esperojn por la kooperativoj. Nur tre malmultaj estas reale malkontentaj. Sed multaj personoj ne analizis tiun situacion. Ili ne faris plenampleksan studadon pri la atingoj kaj mankoj de la kooperativoj kaj la kaŭzoj de tiuj mankoj; ili prenis unu parton aŭ flankon por la tuto. Pro tio ekblovis inter iuj personoj miniatura tajfuno, ke la kooperativoj ne havas superecon.

Kiom da tempo oni bezonos por ke firmiĝu la kooperativoj kaj ĉesu la argumentado ke ili ne havas superecon? Laŭ la sperto de la disvolviĝo de multaj kooperativoj verŝajne oni bezonos kvin jarojn aŭ ankoraŭ iom pli longe. Ĉar la plejparto de la kooperativoj de la lando funkcias nur de pli ol unu jaro, estas malracie atendi tro multe de ili en tiom mallonga tempo. Laŭ mia opinio, ni laboros sufiĉe bone se ni sukcesos starigi la kooperativojn dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj firmigi ilin dum la Dua.

La kooperativoj estas en procezo de iompost-ioma plifirmiĝo. Certaj kontraŭdiroj restas ankoraŭ solvotaj ĉe ili, ekzemple, tiuj inter la ŝtato kaj la kooperativoj kaj tiuj interne de kaj inter la kooperativoj mem.

Ni devas konstante doni nian atenton al la traktado de la supre menciitaj kontraŭdiroj en la problemoj de produktado kaj distribuado. En la problemo de produktado, unuflanke la kooperativa ekonomio devas submeti sin al la unuigita ekonomia plano de la ŝtato, sed samtempe konservi por si certagradan flekseblecon kaj sendependecon en agado sub la kondiĉo ne malobservi la unuigitan ŝtatan planon, nek la politikojn kaj leĝojn de la ŝtato; aliflanke, ĉiu familio partopreninta la kooperativon, krom la parcelo rezervita por privata uzado kaj aliaj ekonomiaj entreprenoj lasitaj al individua administrado, pri kiuj ĝi povas fiksi sian propran planon, devas submeti sin al la ĝeneralaj planoj de la kooperativo aŭ la produkta brigado, al kiu ĝi apartenas. En la problemo de distribuado, ni devas zorgi samtempe la interesojn de la ŝtato, de la kooperativo kaj de la individuo. Ni devas trakti konvene la triflankan rilaton inter la impostoj de la ŝtato, la akumulado de la kooperativo kaj la persona enspezo de la kamparano kaj konstante atenti la reĝustigadon de la kontraŭdiroj inter ili. Akumuladon bezonas tiel la ŝtato kiel ankaŭ la kooperativo, sed ambaŭokaze tio ne devas esti tro multa. Ni devas laŭeble ebligi al la kamparano, dum normalaj jaroj, pliigi siajn personajn enspezojn jaron post jaro surbaze de la kreskado de produktado.

Multaj personoj diras ke la vivo de la kamparanoj estas mizera. Ĉu tio estas vera? Laŭ unu senco, ĝi estas vera. Tio estas, ĉar la imperiistoj kaj iliaj agentoj subpremis kaj ekspluatis nian landon por pli ol unu jarcento, kaj nia lando fariĝis tre malriĉa, ne nur la vivnivelo de niaj kamparanoj, sed ankaŭ tiu de niaj laboristoj kaj intelektuloj estas ankoraŭ malalta. Ni bezonos kelkajn jardekojn da intensa klopodado por levi la vivnivelon de nia tuta popolo paŝon post paŝo. En tiu ĉi senco, la vorto "mizera" estas konvena. Sed el alia vidpunkto, tio ne estas prava. Ni aludas al la plendo ke dum la sep jaroj depost la Liberiĝo, nur la vivo de la laboristoj plibonigis, sed tiu de la kamparanoj ne. Fakte, kun tre malmultaj esceptoj, la vivo ĉu de la laboristoj ĉu de la kamparanoj fariĝis jam iom pli bona ol antaŭe. Depost la Liberiĝo, la kamparanoj estas liberigitaj de la ekspluatado de la bienuloj kaj ilia produkto pliiĝas jaron post jaro. Prenu grenon kiel ekzemplon. En 1949, la tutlanda produkto de greno estis nur ducent dekkelkaj miliardoj da ĝinoj. En 1956, ĝi atingis tricent sesdekkelkajn miliardojn da ĝinoj, kun kresko de preskaŭ cent kvindek miliardoj da ĝinoj. La ŝtata agrikultura imposto ne estas peza, atingante nur ĝis la sumo de iom pli ol tridek miliardoj da ĝinoj ĉiujare. La greno aĉetata laŭ normalaj prezoj inter la kamparanoj estas nur iom pli ol kvindek miliardoj da ĝinoj ĉiujare. Tiuj ĉi du kune sumiĝas je pli ol okdekkelkaj miliardoj da ĝinoj, de kiuj pli ol duono estas vendata en la vilaĝoj kaj apudaj urbetoj. El tio evidentiĝas ke oni ne povas diri ke la vivo de la kamparanoj ne pliboniĝis. Ni estas pretaj stabiligi en la venontaj kelkaj jaroj la tutan sumon de impostgreno kaj la greno aĉetota de la ŝtato ĝenerale sur la nivelo de okdekkelkaj miliardoj da ĝinoj ĉiujare, por ke disvolviĝu la agrikulturo, plisolidiĝu la kooperativoj, la malmultaj grenmankaj familioj ankoraŭ troviĝantaj en la vilaĝoj ne estu plu grenmankaj, kaj ĉiuj kamparanaj familioj, escepte de tiuj kiuj sin okupas speciale pri industriaj plantaĵoj, havu rezervitan grenon aŭ almenaŭ fariĝu memsufiĉaj, por ke en la vilaĝoj ne plu troviĝu kamparanoj en malriĉeco kaj la vivnivelo de ĉiuj kamparanoj atingu aŭ superu tiun de mezaj kamparanoj. Ne estas prave supraĵe kompari la meznombran jaran enspezon de kamparano kun tiu de laboristo kaj aserti ke unu estas malalta dum la alia alta. La produktiveco de la laboristoj estas multe pli alta ol tiu de la kamparanoj, dum la kosto de vivado por la kamparanoj estas multe malpli alta ol tiu por la laboristoj en la urboj; sekve oni ne povas diri ke la laboristoj ĝuas apartan favoron de la ŝtato. Tamen la laborpagoj de malmultaj laboristoj kaj de iuj registaraj oficistoj estas iom tro altaj, kaj pri tio la kamparanoj havas kialon por esti malkontentaj, tial estas necese fari konvenajn reĝustigojn laŭ la cirkonstancoj.

4. LA PROBLEMO DE INDUSTRIISTOJ KAJ KOMERCISTOJ

Krom la kooperigado de agrikulturo kaj metioj, la transformo de privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj en ŝtate-private kune



La vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj en la Traktora Fabriko "Ruĝa Stelo", Gujĝoŭ, kunvenas por interŝanĝi sperton pri kreivaj studo kaj apliko de la brila verko de Prezidanto Maŭ Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo.

funkciigatajn entreprenojn ankaŭ efektiviĝis en 1956 kiel parto de la transformo de nia socia sistemo. La kaŭzo kial tiu ĉi laboro estis plenumita tiel rapide kaj glate havis intiman rilaton kun la fakto ke ni traktis la kontraŭdiron inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro kiel kontraŭdiron interne de la popolo. Ĉu tiu ĉi klasa kontraŭdiro estas tute solvita? Ankoraŭ ne. Ni bezonos ankoraŭ sufiĉe longan tempon por ĝin tute solvi. Sed iuj personoj diras nun ke la kapitalistoj estas jam tiel reformitaj ke nun ili ne multe diferencas de la laboristoj kaj ke ilia plua reformado estas nenecesa. Aliaj eĉ diras ke la kapitalistoj estas eĉ iom pli kompetentaj ol la laboristoj. Ankoraŭ aliaj diras ke se reformado estas necesa, kial ne estu reformata la laborista klaso? Ĉu tiuj ĉi opinioj estas pravaj? Kompreneble ne.

Dum la konstruado de socialisma socio, ĉiuj bezonas reformadon, kiel la ekspluatantoj tiel ankaŭ la laboranta popolo. Kiu diras ke la laborista klaso ĝin ne bezonas? Kompreneble la reformado de la ekspluatantoj kaj tiu de la laboranta popolo estas du en naturo malsamaj tipoj de remuldado, kiujn oni ne devas konfuzi unu kun la alia. En la klasbatalo kaj la batalo kontraŭ naturo, la laborista klaso remuldas la tutan socion kaj samtempe reformas sin mem. Ĝi devas daŭre lerni en sia laborado kaj paŝon post paŝo venki siajn mankojn. Ĝi devas neniam ĉesi tion fari. Prenu nin kiuj estas ĉi tie kiel ekzemplon. Multaj el ni faras iom da progreso ĉiujare, t. e., ni estas remuldataj ĉiujare. Mi mem havis diversajn nemarksismajn ideojn antaŭe. Marksismon mi akceptis nur poste. Mi lernis de libroj iom da marksismo kaj faris unuapaŝan reformon de miaj ideoj, sed mi estis ĉefe remuldata dum la longtempa klasbatalo. Kaj mi devas ankoraŭ daŭre lernadi, se mi volas

fari pluan progreson, alie mi postlasiĝos. Ĉu la kapitalistoj estas tiel kompetentaj ke ili, male, ne bezonas reformadon plu?

Iuj argumentas ke la ĉina burĝaro ne plu havas du flankojn en sia karaktero sed nur unu flankon. Ĉu tio estas fakto? Ne. Unuflanke, la burĝaj elementoj jam fariĝis administrantoj en ŝtate-private kune funkciigataj entreprenoj kaj estas en procezo de transformado de ekspluatantoj en laborulojn vivantajn de sia propra laboro; aliflanke, ili ankoraŭ ricevas en tiuj entreprenoj fiksitan procenton da interezo el siaj investoj, t. e., ili ankoraŭ ne deradikiĝis de ekspluatado. Sufiĉe longa distanco en ideologio, sentimentoj kaj vivkutimoj ankoraŭ ilin disigas de la laboristaro. Kiel oni povas diri ke ili jam ne plu havas du flankojn en sia karaktero? Eĉ se ili ĉesus ricevi sian fiksitan interezon kaj senigus sin je la etikedo de "burĝo", ili ankoraŭ bezonos sufiĉe longan tempon por daŭrigi sian ideologian reformadon. Se la burĝaro, kiel iuj opinias, ne plu havus duoblan karakteron, do estus ankaŭ ne plu la tasko de lernado kaj remuldado por la kapitalistoj.

Sed ni devas diri ke tia opinio ne respondas al la efektiva stato de la industriistoj kaj komercistoj, nek al la deziro de la plejparto de ili. Dum la pasintaj kelkaj jaroj la plejparto de ili volis lerni kaj faris rimarkindan progreson. La ĝisfunda remuldado de niaj industriistoj kaj komercistoj devas esti plenumata en la laboro; ili devas labori kune kun la oficistoj kaj laboristoj en la entreprenoj kaj preni la entreprenojn kiel terenojn por sia remuldado. Sed estas grave por ili ankaŭ ŝanĝi iujn siajn malnovajn vidpunktojn per lernado. Ilia lernado devas baziĝi sur propra volo. Vizitinte studgrupojn dum dekoj da tagoj, multaj industriistoj kaj komercistoj trovas ke ili parolas pli multe en komuna lingvo kun la laboristoj kaj la ŝtataj reprezentantoj kaj pli boniĝis la kondiĉoj por kuna laborado, post kiam ili revenas al siaj entreprenoj. El sia propra sperto ili scias ke estas utile por ili la daŭrigado de lernado kaj sinremuldado. La opinio ĵus menciita ke lernado kaj remuldado ne estas necesaj ne spegulas la penson de la plejparto de industriistoj kaj komercistoj, sed estas de nur malmultaj el ili.

5. LA PROBLEMO DE INTELEKTULOJ

Kontraŭdiroj interne de la popolo en nia lando montriĝas ankaŭ inter la intelektuloj. Kelkaj milionoj da intelektuloj kiuj servis al la malnova socio en la pasinteco nun turnas sin por servi al la nova socio. Ĉi tie leviĝas nun la problemo kiel ili adaptu sin al la bezonoj de la nova socio kaj kiel ni helpu ilin en tio. Tio estas ankaŭ unu el la kontraŭdiroj interne de la popolo.

La plejparto de niaj intelektuloj faris rimarkindan progreson dum la pasintaj sep jaroj. Ili esprimas sian aprobon al la socialisma sistemo. Multaj el ili studas marksismon diligente kaj parto el ili jam fariĝis komunistoj. La nombro de tiu parto, kvankam ankoraŭ malgranda nuntempe, estas konstante kreskanta. Kompreneble inter la intelektuloj troviĝas ankoraŭ iuj kiuj restas skeptikaj al socialismo aŭ ĝin ne aprobas, sed ili estas malmultaj.

La kolosa tasko de socialisma konstruado de nia lando ja bezonas kiel eble plej multe da intelektuloj por ĝin servi. Ni devas fidi ĉiujn intelektulojn kiuj vere volas servi al la afero de socialismo, radikale plibonigi niajn rilatojn kun ili kaj helpi ilin solvi ĉiujn solvendajn problemojn, por ke ili povu aktive elvolvi siajn talentojn. Multaj el niaj kamaradoj ne scias bone starigi unuiĝon kun intelektuloj, traktas ilin en kruda maniero, ne respektas ilian laboron kaj malkonvene sintrudas en ne intervenendajn aferojn en sciencaj kaj kulturaj laboroj. Ĉiuj ĉi tiuj mankoj devas esti konkeritaj.

Kvankam la multnombraj intelektuloj faris iom da progreso, ili tamen ne devas esti memkontentaj pro tio. Por plene adapti sin al la bezonoj de la nova socio kaj por intime unuiĝi kun la laboristoj kaj kamparanoj, la intelektuloj devas daŭrigi la sintransformadon, forĵeti iom post iom la burĝan mondkoncepton kaj starigi por si proletan, komunisman mondkoncepton. La ŝanĝo de mondkoncepto estas ŝanĝo fundamenta kaj ĝis nun oni ankoraŭ ne povas diri ke la plejparto de niaj intelektuloj jam plenumis tiun ŝanĝon. Ni esperas ke ili daŭre antaŭen iros kaj, en la procezo de siaj laborado kaj lernado, iom post iom starigos mondkoncepton

komunisman, akiros pli bonan komprenon pri marksism-leninismo kaj sin identigos kun la laboristoj kaj kamparanoj, kaj ne haltos mezvoje, des pli ne retroiros, ĉar retroiro kondukos al nenia elirejo. Ĉar la socia sistemo de nia lando jam ŝanĝiĝis kaj la ekonomia bazo de burĝa ideologio estas fundamente likvidita, do troviĝas ne nur neceseco sed ankaŭ ebleco por grand-nombraj intelektuloj ŝanĝi sian mondkoncepton. Sed ĝisfunda ŝanĝo de mondkoncepto bezonas tre longan tempon, kaj ni devas labori pacience kaj ne devas esti malpaciencaj. Fakte certe troviĝos kelkiuj kiuj ideologie ne volas akcepti marksism-leninismon kaj komunismon en la tuta tempo. Al ili ni ne estu tro postulemaj. Ni devas doni al ili ŝancojn por konvena laboro, se nur ili estas pretaj submeti sin al la bezonoj de la ŝtato kaj sin okupi en normala laborado.

Inter la intelektuloj kaj junaj studentoj malfortiĝis lastatempe la ideologia kaj politika laboro kaj aperis iuj malsanecaj tendencoj. Al iuj personoj ŝajnas ke ĉu politiko, ĉu la estonteco de la patrio, ĉu la idealoj de la homaro, nenio estas prizorginda por ili. Ŝajnas ke marksismo, kiu furoris iutempe, estas nun ne tiel en modo. Kontraŭ tiu situacio ni devas plifortigi nian ideologian kaj politikan laboron. Kaj la intelektuloj kaj la junaj studentoj devas streĉi siajn fortojn por lerni. Krom lerni specialigitajn studobjektojn, ili devas lerni marksism-leninismon, lerni kurantajn aferojn kaj politikon, por progresi ideologie kaj progresi ankaŭ politike. Ne havi ĝustan politikan vidpunkton egalas ne havi animon. La pasinta ideologia remuldado estis necesa kaj akiris pozitivajn rezultatojn. Sed ĝi estis efektivigata iom krude kaj vundis la sentojn de iuj personoj—tio estis ne bona. Tiun ĉi difekton ni devas eviti en la estonteco. Ĉiuj instancoj kaj organizoj devas preni sur sin la respondecon rilate al ideologia kaj politika laboro. Ĝin devas prizorgi la Komunista Partio, la Junulara Ligo, la koncernataj registaraj departementoj kaj precipe la estroj kaj instruistoj de lernejoj. Nia orientilo de eduko devas ebligi la edukatojn disvolviĝi ĉiuflanke, morale, intelekte kaj korpe, kaj fariĝi laboruloj kun socialisma konscio kaj kulturo. Ni devas disvastigi la ideon konstrui nian landon per diligentemo kaj ŝparemo. Ni devas komprenigi al ĉiuj niaj junuloj ke nia lando estas ankoraŭ tre malriĉa kaj ne estas eble radikale ŝanĝi tiun ĉi staton dum mallonga tempo, kaj ke nur per unuigita luktado dum kelkaj jardekoj de nia juna generacio kaj la tuta popolo laborantaj per siaj propraj manoj povos esti kreita prospera kaj potenca lando. La starigo de socialisma sistemo malfermis al ni la vojon kondukantan al la ideala stato de la estonteco, kies efektiviĝo tamen dependos ankoraŭ de nia peniga kaj diligenta laborado. Iuj junuloj pensas ke kiam socialisma socio estas starigita, ĉio devas esti perfekta kaj oni povas ĝui feliĉan vivon tute pretan sen ajna penado. Tia penso estas ne realisma.

6. LA PROBLEMO DE NACIMALPLIMULTOJ

La popolo de la nacimalplimultoj en nia lando nombras pli ol tridek milionojn. Kvankam ili okupas nur ses elcentojn de la totala loĝantaro de Ĉinio, tamen la regionoj en kiuj ili loĝas entute ampleksas kvindek ĝis sesdek elcentojn de la totala areo de nia lando. Sekve la rilatoj inter la han-oj kaj la nacimalplimultoj devas esti harmoniaj. La ŝlosilo por solvi tiun ĉi problemon estas venki grandhanismon. Kie ekzistas loka naciismo inter nacimalplimultoj, ĝi devas esti samtempe venkita. Nek grandhanismo nek loka naciismo estas utila al unuiĝo de la diversaj naciecoj, kaj ili devas esti venkitaj kontraŭdiroj interne de la popolo. Tiuflanke ni jam faris iom da laboro. En la plejparto de la regionoj kie loĝas nacimalplimultoj, la rilatoj inter la naciecoj fariĝis multe pli bonaj ol antaŭe, sed restas ankoraŭ iuj problemoj solvotaj. En iuj lokoj, grandhanismo kaj loka naciismo ambaŭ ekzistas en serioza grado kaj al tio ni devas doni sufiĉan atenton. Rezulte de kelkjara klopodado de la popolo de ĉiuj naciecoj, demokratia reformado kaj socialisma transformado estas fundamente plenumitaj en la plejparto de niaj nacimalplimultaj regionoj. Ĉar la kondiĉoj en Tibeto estas ankoraŭ ne maturaj, demokratia reformado estas ankoraŭ ne efektivigita tie. Laŭ la dekseppunkta interkonsento inter la Centra Popola Registaro kaj la loka registaro de Tibeto, reformado de la la socia sistemo devas esti fine efektivigita, sed la tempo por ĝia efektivigo estos decidita nur kiam la plejparto de tibeta popolo kaj iliaj

gvidantaj publikaj personoj konsideros ĝin efektivigebla. Ni ne devas esti malpaciencaj. Nun estas decidite ke ni ne efektivigos demokratian reformadon en Tibeto dum la Dua Kvinjara Plano. Ĉu ni efektivigos ĝin en la Tria Kvinjara Plano, tion ni povos decidi nur tiam laŭ la tiutempa situacio.

7. ĈIONAMPLEKSA PLANADO, MULTFLANKA KONSIDERADO KAJ KONVENA ARANĜADO

La ĉionampleksa planado kaj multflanka konsiderado menciitaj ĉi tie aludas al la ĉionampleksa planado kaj multflanka konsiderado por la interesoj de la sescent-miliona loĝantaro de nia lando. Kiam ni skizas planojn, traktas aferojn aŭ pensas pri problemoj, ni devas ĉiam eliri el la punkto ke Ĉinio havas loĝantaron de sescent milionoj. Ĉi tion ni neniam forgesu. Kial ni elmetas tiun ĉi problemon? Ĉu troviĝus personoj kiuj ankoraŭ ne scias ke ni havas loĝantaron de sescent milionoj? Kompreneble ĉiu scias tion, sed en praktikado iuj facile forgesas ĝin kaj agas kvazaŭ pensante ke ju pli malmulte da homoj kaj ju pli malgranda la rondo estas des pli bone. Personoj kun tia penso de malgranda rondo estas kontraŭaj al la sekvanta ideo: mobilizi ĉiujn pozitivajn faktorojn, unuiĝi kun ĉiuj personoj, kun kiuj ni povas unuiĝi, kaj fari ĉion eblan por turni negativajn faktorojn en pozitivajn por ke ili servu al la grandioza afero de konstruado de socialisma socio. Mi esperas ke tiuj personoj pligrandigu sian vidkampon kaj vere rekonu la fakton ke nia lando havas sescent-milionan loĝantaron, ke ĝi estas objektiva fakto kaj ke ĝi estas nia kapitalo. Nia loĝantaro estas grandnombra. Tio estas bona afero, sed kompreneble ĝi ankaŭ havas siajn malfacilaĵojn. Nia konstruado vigle disvolviĝas sur ĉiuj frontoj kaj ni multon atingis, sed en la nuna transira periodo de granda socia ŝanĝiĝo, ankoraŭ troviĝas multaj malfacilaj problemoj. Disvolviĝo kaj malfacilaĵoj — jen estas kontraŭdiro. Tamen, ĉiu ajn kontraŭdiro ne nur devas, sed ankaŭ povas esti solvita. Nia politiko estas ĉionampleksa planado kaj multflanka konsiderado, kaj konvena aranĝado. Ĉiun problemon, ĉu tiun de nutraĵo, de naturaj katastrofoj, de labordonado, de edukado, de la intelektuloj, de la unuecfronto de ĉiuj patriotaj fortoj, de la nacimalplimultoj, aŭ iun ajn alian problemon — ni devas ĉiam trakti el la starpunkto de ĉionampleksa planado kaj multflanka konsiderado por la tuta popolo; ni devas interkonsiliĝi kun ĉiuflankaj personoj por fari diversajn konvenajn aranĝojn laŭ la realaj eblecoj en la specialaj tempo kaj loko. Ni ne devas plendi pri la tromulteco de homoj aŭ pri ilia postrestinteco, aŭ pri la ĝenaĵoj kaj malfacileco de aferoj, kaj simple forpuŝi la aferojn el la pordo. Ĉu tio signifas ke ĉiu kaj ĉio estu prizorgataj sole de la registaro? Kompreneble ne. Pri multaj homoj kaj multaj aferoj sociaj organizoj kaj la popolamasoj mem povas prizorgi, kaj ili ja povas elpensi multe da tre bonaj rimedoj. Kaj ĝuste tion ankaŭ inkluzivas la principo de "ĉionampleksa planado, multflanka konsiderado kaj konvena aranĝado". Ni devas gvidi la sociajn organizojn kaj ĉieajn popolamasojn en diversaj lokoj tiel agadi.

8. PRI "SAMTEMPA DISVOLVIĜO DE CENT FLOROJ" KAJ "KONKURA SINESPRIMO DE CENT SKOLOJ" KAJ "LONGDAŬRA KUNEKZISTADO KAJ RECIPROKA KONTROLADO"

Kiel estis elmetitaj la jenaj sloganoj: "samtempa disvolviĝo de cent floroj" kaj "konkura sinesprimo de cent skoloj" kaj "longdaŭra kunekzistado kaj reciproka kontrolado"? Ili estis elmetitaj laŭ la konkretaj kondiĉoj de Ĉinio, surbaze de la rekono de la fakto ke ekzistas ankoraŭ diversaj kontraŭdiroj en socialisma socio kaj responde al la urĝa bezono de la lando pri rapida disvolviĝo de ĝiaj ekonomio kaj kulturo. La orientilo de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj estas tiu por akceli la disvolviĝon de la artoj kaj la progreson de scienco kaj estas tiu por akceli la prosperadon de socialisma kulturo en nia lando. Malsamaj formoj kaj stiloj en arto povas libere disvolviĝi kaj malsamaj skoloj en scienco povas libere interargumenti. Ni opinias, ke deviga disvastigo de iu stilo aŭ iu skolo kaj malpermeso de alia stilo aŭ alia skolo per administraj rimedoj estas malutilaj al la disvolviĝo de arto kaj scienco.

Problemoj de praveco kaj malpraveco en la artoj kaj sciencoj devas esti solvataj per libera diskutado en artaj kaj sciencaj rondoj kaj pere de praktikado en la artoj kaj sciencoj anstataŭ per simpla metodo. Por juĝi, ĉu io estas ĝusta aŭ erara, ofte estas bezonata tempo por provado. En la historio, novaj kaj ĝustaj aferoj ofte ne ricevis la agnoskon de la plimulto de homoj en la komenco kaj devis disvolviĝi zigzage tra batalado. Ĝustajn kaj bonajn aferojn oni ofte ne rekonas en la komenco kiel aromajn florojn sed male rigardas kiel venenajn herbojn. La teorio de la suna sistemo de Koperniko kaj la teorio de evoluado de Darvino ambaŭ estis iam rigardataj kiel eraraj kaj ambaŭ trapasis malfacilegan luktadon. En la ĉina historio ankaŭ okazis multaj similaj ekzemploj. Kompare kun la malnova socio, la kondiĉoj por la kreskado de novaj aferoj en la socialisma socio estas radikale malsamaj kaj multe pli bonaj. Tamen subpremoj al nove kreskantaj fortoj kaj raciaj proponoj estas tamen ankoraŭ ofte renkonteblaj. La kreskado de novaj aferoj ankaŭ povas esti malhelpata ne de intenca subpremo, sed de erara konstato. Tial ni devas sinteni singardeme rilate al problemoj de praveco kaj malpraveco en la artoj kaj sciencoj, kuraĝigi liberan diskutadon kaj ne fari senpripensajn konkludojn facilanime. Ni opinias ke adopto de tiu ĉi sinteno povos plifaciligi la kreskadon de la artoj kaj sciencoj.

Marksismo ankaŭ disvolviĝis tra luktado. En la komenco marksismo ricevis ĉiuspecajn atakojn kaj estis rigardata kiel venena herbo. Nuntempe ĝi estas ankoraŭ atakata kaj rigardata kiel venena herbo en multaj partoj de la mondo. Tamen ĝi ĝuas malsaman pozicion en la socialismaj landoj. Sed eĉ en tiuj ĉi landoj sin trovas ankoraŭ nemarksismaj kaj kontraŭmarksismaj ideologioj. En nia lando, kvankam socialisma transformo estas fundamente plenumita koncerne posedsistemon kaj la grandaj uraganaj amasaj klasbataloj karakterizaj por la revoluciaj periodoj estas fundamente finitaj, tamen la postrestaĵoj de la renversitaj bienula kaj kompradora klasoj ankoraŭ ekzistas, la burĝaro ankoraŭ ekzistas kaj la remuldo de la etburĝaro nur ĵus komenciĝis. Klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis. La klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj. La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, kaj ankaŭ la burĝaro volas tion fari laŭ la sia. En tiu rilato, la problemo kiu venkos kaj kiu malvenkos inter socialismo kaj kapitalismo ankoraŭ ne estas vere solvita. Marksistoj restas ankoraŭ malplimulto, ĉu en la tutlanda loĝantaro ĉu en la intelektularo. Tial marksismo ankoraŭ devas disvolviĝi tra luktado. Ke marksismo povas disvolviĝi nur tra luktado, tiel estas la fakto ne nur en la estinteco kaj estanteco, sed ankaŭ en la estonteco. Kio estas ĝusta ĉiam disvolviĝas en la procezo de luktado kontraŭ kio estas erara. La vera, la bona kaj la bela ĉiam ekzistas en komparo kun la malvera, la malbona kaj la malbela kaj disvolviĝas en luktado kontraŭ ili. Kiam io erara estas ĝenerale forĵetita kaj io vera akceptita de la homaro, pli nova vero komencos lukti kontraŭ novaj eraraj ideoj. Tiaj luktoj neniam finiĝos. Ĝi estas la leĝo de disvolviĝo de vero kaj certe ankaŭ la leĝo de disvolviĝo de marksismo.

En nia lando la lukto inter socialismo kaj kapitalismo en la ideologia kampo por decidi kiu venkos kaj kiu malvenkos, ankoraŭ bezonos sufiĉe longan tempon por esti fine solvita. La kialo estas, ke la influo de la burĝaro kaj de la intelektuloj devenintaj de la malnova socio ankoraŭ restos longe en nia lando, kaj kiel klasa ideologio ĝi ankoraŭ restos longe en nia lando. Se oni havas ne sufiĉan aŭ tute nenian konon pri tiu ĉi situacio, oni faros grandegajn erarojn kaj ignoros la necesan ideologian luktadon. La luktado ideologia estas malsama ol la alispecaj luktoj. Anstataŭ kruda metodo de devigo oni povas alpreni nur delikatan metodon de rezonado. Nun socialismo ĝuas favorajn kondiĉojn en la ideologia lukto. La fundamenta potenco de la ŝtato estas en la manoj de la laboranta popolo gvidata de la proletaro. La Komunista Partio estas forta kaj ĝia prestiĝo tre alta. Kvankam estas difektoj kaj eraroj en nia laboro, tamen ĉiu justa persono povas vidi ke ni estas lojalaj al la popolo, ke ni havas firman volon kaj kapablon konstrui la patrion kune kun la popolo, kaj ke ni jam akiris grandajn atingojn kaj akiros

ankoraŭ pli grandajn atingojn. La plejparto de la burĝaro kaj la intelektuloj devenintaj de la malnova socio estas patriota. Ili volontas servi al la pli kaj pli floranta socialisma patrio kaj scias ke se ili sin turnos for de la socialisma afero kaj la laboranta popolo gvidata de la Komunista Partio, ili povos sin apogi sur neniu kaj havos nenian brilan estontecon.

Oni demandas: Ĉar marksismo estas agnoskita de la plejparto de la popolo en nia lando kiel la gvidanta ideologio, ĉu ĝi povas esti kritikata? Kompreneble jes. Marksismo estas scienca vero kiu ne timas kritikon. Se ĝi timus kritikon kaj povus esti venkita en kritikado, ĝi estus do senutila. Fakte, ĉu la ideistoj ne estas ĉiutage kritikantaj marksismon en diversaj manieroj? Ĉu tiuj kiuj tenas en si burĝajn kaj etburĝajn ideojn, ne volante ilin ŝanĝi, ne estas ankaŭ kritikantaj marksismon en diversaj manieroj? Marksistoj ne devas timi ies ajn kritikon. Kontraŭe, marksistoj bezonas hardi kaj evoluigi sin kaj plivastigi sian pozicion en alies kritikado kaj en la ŝtormo de luktado. Batalo kontraŭ eraraj ideoj similas al vakcinado. Dank' al la efiko de la vakcinado oni akiras pli grandan imunecon kontraŭ malsano. Plantaĵoj kreskigitaj en varmejoj ne povas havi grandan vivforton. La efektivigo de la politiko de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj ne malfortigos sed kontraŭe plifortigos la gvidantan pozicion de marksismo en la ideologia kampo.

Kian politikon oni devas adopti kontraŭ nemarksismaj ideoj? Kun evidentaj kontraŭrevoluciuloj kaj subfosantoj de la socialisma afero, la afero estas facila: ni simple senigu ilin je libereco de parolo. Rilate al la eraraj ideoj ekzistantaj interne de la popolo, la afero estas tute malsama. Ĉu ni povas malpermesi tiujn ideojn, donante al ili nenian ajn ŝancon por sin esprimi? Certe ne. Trakti per simplaj metodoj la ideologiajn problemojn interne de la popolo, la problemojn rilatantajn la spiritan vivon de la homo, ne nur donos nenian rezulton sed estas eĉ tre malutile. Vi povas malpermesi la esprimon de eraraj ideoj, sed ili ankoraŭ restas tie. Dume ĝustaj ideoj, se ili estas dorlotitaj el varmejoj, ne spertintaj severan veteron kaj ne imunigitaj kontraŭ malsano, ne povos venki en batalo kontraŭ eraraj ideoj. Tial nur per la metodoj de diskutado, kritikado kaj rezonado oni povas efektive disvolvi ĝustajn ideojn, venki erarajn ideojn kaj vere solvi problemojn.

Neeviteble, la burĝaro kaj etburĝaro manifestas siajn ideologiojn. Ili nepre esprimas sin obstine per diversaj rimedoj en la politikaj kaj ideologiaj problemoj. Estas neeble postuli ke ili tion ne faru. Ni ne devas uzi metodojn de subpremo por malebligi ilin sin esprimi, sed devas permesi al ili sin esprimi kaj, en la tempo kiam ili esprimas sin, argumenti kun ili kaj fari konvenajn kritikojn. Sendube, ni devas kritiki ĉiuspecajn erarajn ideojn. Ne fari kritikon, rigardante erarajn ideojn ĉien inundadi kaj lasante ilin libere okupi la merkaton, estas certe ne prave. Eraroj devas esti kritikataj kaj venenaj herboj kontraŭbatalataj, kiam ajn ili estas trovitaj. Sed tia kritiko ne devas esti dogmisma, kaj ni ne devas uzi metafizikan metodon sed peni apliki dialektikan metodon. Necesas scienca analizo kaj sufiĉe konvinkaj argumentoj. Dogmisma kritiko povas solvi neniun problemon. Ni oponas ĉiuspecajn venenajn herbojn, sed ni devas gardeme distingi kio estas vera venena herbo kaj kio estas vera aroma floro. Ni devas lerni kune kun la popolamasoj gardeme distingi aromajn florojn disde venenaj herboj kaj uzi ĝustajn metodojn por batali kontraŭ venenaj herboj.

Kiam ni kritikas dogmismon ni devas samtempe direkti nian atenton al la kritiko de reviziismo. Reviziismo, aŭ dekstrema oportunismo, estas burĝa pensfluo kiu estas pli danĝera ol dogmismo. La reviziistoj, aŭ la dekstremaj oportunistoj, havas ankaŭ marksismon sur la lipoj kaj ankaŭ atakas "dogmismon". Sed tio kion ili atakas estas ĝuste la plej fundamentaj elementoj de marksismo. Ili kontraŭstaras aŭ distordas materiismon kaj dialektikon, kontraŭstaras aŭ intencas malfortigi la popol-demokratian diktaturon kaj la gvidan rolon de la Komunista Partio, kaj kontraŭstaras aŭ intencas malfortigi socialisman transformadon kaj socialisman konstruadon. Post la fundamenta venko de la socialisma revolucio en nia lando, sin trovas en la socio ankoraŭ nombro da personoj kiuj revas pri restarigo de la kapitalisma sistemo. Ili

volas batali kontraŭ la laborista klaso sur ĉiuj frontoj, inkluzive la ideologian fronton. Kaj en tiu ĉi luktado, la reviziistoj estas iliaj plej bonaj helpantoj.

Laŭlitere, tiuj ĉi du sloganoj — samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj — ne havas klasan karakteron: ilin povas utiligi tiel la proletaro kiel la burĝaro kaj same ankaŭ aliaj homoj. Pri aromaj floroj kaj venenaj herboj, ĉiuj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj havas siajn proprajn opiniojn. Do kio estas la kriterioj hodiaŭ por distingi inter aromaj floroj kaj venenaj herboj laŭ la vidpunkto de la vastaj popolamasoj? Kiel ni devas juĝi en la politika vivo de nia popolo la pravon kaj malpravon de niaj vortoj kaj agoj? Ni pensas, ke laŭ la principoj de nia Konstitucio, la volo de la plej granda plimulto de la popolo kaj la politikaj programoj kune proklamitaj en diversaj okazoj de niaj politikaj partioj kaj grupoj, la kriterioj por praveco de vortoj kaj agoj ĝenerale povas esti determinitaj jene:

(1) Esti utilaj por unuigi sed ne por disigi nian diversnacian popolon;

(2) Esti utilaj sed ne malutilaj al socialisma transformado kaj socialisma konstruado;

(3) Esti utilaj por firmigi sed ne por detrui aŭ malfortigi la popol-demokratian diktaturon;

(4) Esti utilaj por firmigi sed ne por detrui aŭ malfortigi la demokratian centralizismon;

(5) Esti utilaj por firmigi sed ne por forskui aŭ malfortigi la gvidantecon de la Komunista Partio;

(6) Esti utilaj sed ne malutilaj al internacia socialisma solidareco kaj la internacia solidareco de la pacamaj popoloj tra la tuta mondo.

El tiuj ĉi ses kriterioj, la plej gravaj estas la socialisma vojo kaj la gvidanteco de la Partio. Tiuj ĉi kriterioj estas elmetitaj por kuraĝigi sed ne malhelpi la liberan diskutadon pri diversaj problemoj interne de la popolo. Tiuj kiuj malaprobas tiujn ĉi kriteriojn povas ankoraŭ prezenti siajn proprajn opiniojn por interargumenti. Sed kun klaraj kriterioj la plejparto de la popolo povas fari kritikon kaj memkritikon laŭ la ĝustaj linioj kaj juĝi per tiuj ĉi kriterioj, ĉu ies vortoj kaj agoj estas ĝustaj, kaj ĉu ili estas aromaj floroj aŭ venenaj herboj. Tiuj ĉi estas politikaj kriterioj. Por juĝi ĉu iuj sciencaj tezoj estas ĝustaj aŭ eraraj aŭ por taksi la estetikan nivelon de iuj artaj verkoj, nature aliaj propraj kriterioj estas ankoraŭ bezonataj respektive por ili. Sed tiuj ĉi ses politikaj kriterioj validas ankaŭ por ĉiuj ajn agadoj de la artoj kaj sciencoj. Ĉu en nia socialisma lando povus troviĝi iu utila scienca aŭ arta agado kiu estas kontraŭa al tiuj ĉi politikaj kriterioj?

Ĉiuj vidpunktoj supre menciitaj devenis de la konkretaj historiaj kondiĉoj en nia lando. Ĉar la kondiĉoj en diversaj socialismaj landoj kaj diversaj komunistaj partioj estas malsamaj, ni ne opinias ke ili devas aŭ bezonas sekvi nian agmanieron.

La slogano de "longdaŭra kunekzistado kaj reciproka kontrolado" ankaŭ estas produktaĵo de la konkretaj historiaj kondiĉoj en nia lando. Ĝi ne estas elmetita subite, sed jam trapasis plurjaran fermentadon. La ideo de longdaŭra kunekzistado jam ekzistis tre longe, sed lastan jaron kiam la socialisma sistemo estis fundamente starigita, la slogano estis klare elmetita. Kial la demokratiaj partioj de la burĝaro kaj etburĝaro devas esti permesitaj longdaŭre ekzisti kune kun la partio de la laborista klaso? La kaŭzo estas ke ni ne havas kialon por ne adopti la politikon de longdaŭra kunekzistado kun ĉiuj partioj kiuj vere sin dediĉas al la afero de unuigo de la popolo por socialismo kaj ĝuas la fidon de la popolo. Ĉe la Dua Sesio de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco en junio 1950, mi jam diris: "La popolo kaj la Popola Registaro ne havas kialon forpuŝi iun ajn aŭ ne doni al iu ajn ŝancon por vivi kaj servi, se nur li efektive volontas servi al la popolo, efektive helpis la popolon kiam ĝi estis ankoraŭ en malfacileco, faris kaj faradas konstante bonajn aferojn, kaj ne ĉesas duonvoje." Tio kion mi diris tiam estas la politika bazo por la longdaŭra kunekzistado de la diversaj partioj. Ke la Komunista Partio longdaŭre kunekzistu kun la demokratiaj partioj estas nia deziro, ankaŭ nia orientilo. Ĉu tiuj partioj povos longe ekzisti dependas ne nur de la deziro de la Komunista Partio, sed ankaŭ

de la manifestado de tiuj demokratiaj partioj mem kaj de tio ĉu ili ĝuas la fidon de la popolo. Ankaŭ reciproka kontrolado inter la diversaj partioj ekzistas kiel fakto jam de longe, t. e., ili konsilas kaj kritikas unu la alian. Reciproka kontrolado kompreneble ne estas unuflanka. La Komunista Partio povas kontroli la demokratiajn partiojn, dum la demokratiaj partioj ankaŭ povas kontroli la Komunistan Partion. Kial ni permesas la demokratiajn partiojn kontroli la Komunistan Partion? Ĉar same kiel individuo, partio ankaŭ tre bezonas aŭskulti opiniojn malsamajn ol la siajn. Ĉiuj scias ke kontroladon super la Komunista Partio ĉefe faras la laboranta popolo kaj la membraro de la Partio. Sed kun tio de la demokratiaj partioj estos al ni ankoraŭ pli utile. Kompreneble la konsiloj kaj kritikoj prezentitaj unu al la alia inter la Komunista Partio kaj la demokratiaj partioj ludos pozitivan rolon en reciproka kontrolado nur kondiĉe ke ili konformas al la ses politikaj kriterioj supre menciitaj. Tial ni esperas, ke ĉiuj demokratiaj partioj turnos sian atenton al ideologia remuldado kaj strebos al longdaŭra kunekzistado kaj reciproka kontrolado kun la Komunista Partio por sin adapti al la bezonoj de la nova socio.

9. PRI LA PROBLEMO DE TUMULTOJ KREITAJ DE MALMULTNOMBRAJ PERSONOJ

En 1956, malmultnombraj laboristoj kaj studentoj en iuj lokoj strikis. La rektaj kaŭzoj de tiuj ĉi tumultoj estis ke iuj el iliaj materiaj postuloj ne estis kontentigitaj, el kiuj unuj devus esti kaj ankaŭ povus esti kontentigitaj kaj aliaj estis ne konvenaj aŭ tro postulemaj kaj dume nekontentigeblaj. Sed pli grava faktoro tamen estis la burokratismo de la gvidantoj. Iujn el la burokratismaj eraroj devis prirespondi la superaj instancoj, kaj oni ne povas riproĉi sole la subajn. Alia kaŭzo de la tumultoj estis la manko de ideologia kaj politika edukado al la laboristoj kaj studentoj. Samjare okazis ankaŭ tumultoj de malmultnombraj membroj de agrikulturaj kooperativoj kaj la ĉefaj kaŭzoj estis ankaŭ burokratismo de la gvidantoj kaj manko de eduka laboro al la amasoj.

Ni devas konfesi ke iuj el la amaso ofte pli atentas pri proksimaj, partaj kaj personaj interesoj, sed ne komprenas aŭ ne sufiĉe komprenas longtempajn, tutlandajn kaj kolektivajn interesojn. Pro manko de sperto en politiko kaj socia vivo, ne malmulte da gejunuloj ne bone scias fari komparon inter la malnova Ĉinio kaj la nova; estas ne facile por ili plene kompreni kiajn malfacilojn la popolo de nia lando travivis en la luktado por sin liberigi de la subpremo de la imperiismo kaj la kuomintangaj reakciuloj, kaj ke kia longtempa peniga laboro estas bezonata por starigi feliĉan socialisman socion. Tial politika edukado en viveca kaj efika maniero devas esti konstante farata inter la popolamasoj. Ni devas ĉiam laŭvere klarigi al ili la malfacilojn okazantajn kaj diskuti kun ili pri la rimedo por solvi tiujn malfacilojn.

Ni ne aprobas tumultojn, ĉar kontraŭdiroj interne de la popolo povas esti solvataj laŭ la formulo "unuiĝo — kritiko — unuiĝo", dum tumultoj neeviteble kaŭzas perdojn kaj estas malutilaj al la disvolviĝo de la socialisma afero. Ni kredas ke la vastaj popolamasoj de nia lando subtenas socialismon kaj ke ili estas disciplinemaj kaj raciaj, kaj ne faros tumultojn senkaŭze. Sed tio ne signifas ke en nia lando jam ne plu troviĝas ebleco de tumultoj fare de la amasoj. Rilate al tiu ĉi problemo, ni devas atenti la jenon:

(1) Por forigi de la fundamento la kaŭzon de tumultoj, ni devas decideme venki burokratismon, bone plifortigi ideologian kaj politikan edukadon kaj ĝuste trakti ĉiujn kontraŭdirojn. Se tio estas bone plenumita, tumultoj ĝenerale ne okazos.

(2) Se tumultoj okazas kaŭze de nia malbona laboro, tiam ni devas gvidi tiujn amasojn implikitajn en la tumultoj al la ĝusta vojo, utiligi la tumultojn kiel specialan rimedon por plibonigi nian laboron kaj eduki la kadrojn kaj amasojn por solvi la problemojn kiujn ni ne solvis en ordinara tempo. En la traktado de la tumultoj, ni devas labori subtile kaj ne uzu simplajn metodojn, nek deklaru la aferon finita antaŭ ol la problemo estas plene solvita. La gvidantoj de la tumultoj ne devas esti eksigitaj de iliaj oficoj facildecide escepte de krimuloj kaj aktivaj kontraŭrevoluciuloj kiuj devas esti traktataj laŭ la leĝo. En tia granda lando kia la nia, tute ne estas alarminde se malmultaj personoj faras tumultojn; kontraŭe ili povas helpi nin forigi burokratismon.



En la granda proleta kultura revolucio, la proletaj revoluciulinoj de la 17-a Ŝtata Kotona Ŝpin-teksa Fabriko, Ŝanhajo, kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ por ĝuste distingi kaj trakti la kontraŭdirojn de du kategorioj malsamaj en naturo.

En nia socio ankaŭ troviĝas malmulte da personoj kiuj ne zorgas publikajn interesojn, rifuzas aŭskulti al racio, faras perfortaĵojn kaj rompas la leĝon. Ili eble profitas kaj distordas niajn orientilojn, intence prezentas nepravigeblajn postulojn por agiti la amasojn, aŭ intence distrumpetas kalumniojn por eksciti malkvieton kaj detrui la normalan ordon de socio. Ni ne aprobas lasi ilin agi senbride. Kontraŭe, oni devas doni al ili ĝustan leĝan punon. Puni tiajn personojn estas la postulo de la vastaj amasoj kaj ne fari tion estas kontraŭ la volo de la amasoj.

10. ĈU MALBONAJ AFEROJ POVAS FARIĜI BONAJ AFEROJ?

Kiel ni jam diris supre, en nia socio tumultoj de amasoj estas malbonaj aferoj, kiujn ni ne aprobas. Sed kiam okazas tumultoj, ili devigas nin akcepti lecionojn, venki burokratismon kaj eduki la kadrojn kaj la amasojn. En tiu ĉi senco, malbonaj aferoj povas turniĝi en bonajn aferojn. Tumultoj havas duoblan karakteron. Ni povas rigardi ĉiujn tumultojn el tiu ĉi vidpunkto.

Estas klare por ĉiuj ke la hungara evento ne estis bona afero. Sed ankaŭ ĝi havas duoblan karakteron. Ĉar niaj hungaraj kamaradoj ĝuste traktis ĝin en la procezo de ĝia disvolviĝo, fine ĝi turniĝis de malbona afero en bonan aferon. Hungario fariĝis nun pli solida ol antaŭe kaj ankaŭ ĉiuj aliaj landoj de la socialisma tendaro ricevis lecionon.

Same, la mondskala kontraŭkomunisma kaj kontraŭpopola ŝtormo okazinta en la dua duonjaro de 1956 estis kompreneble malbona afero. Sed ĝi edukis kaj hardis la Komunistajn Partiojn kaj la laboristan klason en ĉiuj landoj, kaj tiel fariĝis bona afero. Dum tiu ĉi ŝtormo,

nombro da homoj forlasis la Komunistajn Partiojn en multaj landoj. Eksiĝo de parto de la membraro malpliigas la nombron de partianoj kaj estas kompreneble malbona afero, sed ĝi havas ankaŭ sian bonan flankon. Ĉar la ŝanceliĝemaj elementoj kiuj ne plu volas esti membroj fortiriĝis, la plejparto de la firmaj partianoj povas pli bone unuigi sin kaj daŭrigi la luktadon. Ĉu tio ne estas bona afero?

Unuvorte, ni devas ellerni rigardi problemojn ĉiuflanke, ne nur la pozitivan flankon, sed ankaŭ la negativan flankon de aferoj. Sub specifaj kondiĉoj, malbona afero povas konduki al bonaj rezultoj, dum bona afero ankaŭ povas konduki al malbonaj rezultoj. Antaŭ pli ol du mil jaroj, Laŭzio jam diris: "Sur malfeliĉo sin apogas feliĉo, kaj en feliĉo sin kaŝas malfeliĉo." Kiam la japanoj milite trudis sin en Ĉinion, ili nomis tion venko. Grandaj pecoj da ĉina teritorio estis okupitaj, kaj la ĉinoj nomis tion malvenko. Sed en la malvenko de Ĉinio enteniĝis venko, dum en la venko de Japanio enteniĝis malvenko. Ĉu historio ne jam pruvis ĉi tion?

Tra la tuta mondo homoj estas nun priparolantaj, ĉu eksplodos tria mondmilito. Rilate al tiu ĉi problemo, ni devas esti mense preparitaj kaj samtempe fari analizon. Ni staras firme por paco kaj kontraŭ milito. Sed, se la imperiistoj volas nepre lanĉi militon, ni ankaŭ ne devas ĝin timi. Nia sinteno en tiu ĉi problemo estas la sama kiel nia sinteno al ĉiuj "tumultoj": unue, ni ilin kontraŭstaras; due, ni ilin ne timas. Post la Unua Mondmilito aperis Sovetunio kun loĝantaro nombranta ducent milionojn. Post la Dua Mondmilito estiĝis socialisma tendaro kun totala loĝantaro nombranta naŭcent milionojn. Se la imperiistoj nepre volas lanĉi trian mondmiliton, ni estas certaj ke aliaj pluraj centmilionoj da homoj sin turnos al socialismo; tiam postrestos al la imperiistoj jam ne multe da tereno kaj povos okazi ankaŭ plena disfalo de la imperiisma sistemo.

Kiel rezulto de sia interlukto la du kontraŭstaraj flankoj kontraŭdirantaj ĉiam turniĝas respektive en sian malon sub specifaj kondiĉoj. Ĉi tie la kondiĉoj estas gravaj. Sen specifaj kondiĉoj neniu el la du kontraŭbatalantaj flankoj povas sin transformi en sian malon. En la mondo tiuj kiuj plej volas ŝanĝi sian pozicion estas la proletoj; due estas la duonproletoj, ĉar la antaŭaj nenion posedas dum la lastaj ne multe. La nuna situacio en kiu Usono superregas la plimulton de la voĉoj en la Unuiĝintaj Nacioj kaj kontrolas tre multajn partojn de la mondo estas nur provizora kaj finfine ŝanĝiĝos. La situacio de Ĉinio kiel malriĉa lando senigita de siaj rajtoj internacie ankaŭ ŝanĝiĝos — malriĉa lando turniĝos en riĉan landon kaj stato de senrajteco turniĝos en tiun kun rajtoj — ŝanĝiĝo en direkto al la malo. Ĉi tie la decidigaj kondiĉoj estas la socialisma sistemo kaj la unuanima kunigita strebado de la popolo.

11. PRI ŜPARADO

Ĉi tie mi volas paroli iomete pri ŝparado. Ni deziras entrepreni grandskalan konstruadon, sed nia lando estas ankoraŭ tre malriĉa. Tio estas kontraŭdiro. Daŭra praktikado de ŝparemo en ĉiuj flankoj estas rimedo por solvi tiun ĉi kontraŭdiron.

Dum la movado de "tri kontraŭ-oj" en 1952, ni batalis kontraŭ koruptiĝo, malŝparemo kaj burokratismo, kun emfazo kontraŭ koruptiĝo. En 1955 ni pledis por ŝparemo, kun emfazo sur la oponado kontraŭ tro altaj normoj por neproduktaj projektoj en fundamenta konstruado, kaj sur la ŝparemo en la uzado de krudmaterialoj en industria produktado. La atingo estis sufiĉe granda. Sed tiam la orientilo de ŝparemo estis ankoraŭ ne serioze efektivigata en ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio, nek en registaraj oficejoj, armeaj unuoj, lernejoj kaj popolaj organizoj ĝenerale. Ĉijare ni postulas la praktikadon de ŝparemo kaj forigon de malŝparemo en ĉiuj flankoj tra la tuta lando. Al ni ankoraŭ mankas sperto en konstruado. Dum la pasintaj kelkaj jaroj ni havis grandan sukceson, sed samtempe ankaŭ malŝparon. Ni devas iom post iom konstrui aron da grandskalaj modernaj entreprenoj kiel la skeleton de niaj industrioj, sen kiu ni ne povos transformi nian landon en modernan industrian potencon en la daŭro de kelkdek jaroj. Sed la plejparto de niaj entreprenoj ne devas esti tiel konstruataj; ni devas starigi pli multe da malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kaj plene utiligi la industrian bazon hereditan de la malnova socio,

elspezante kompare malmulte da mono por fari pli da laboro. De kiam la orientilo praktiki rigoran ŝparadon kaj oponi malŝparemon estis pli emfaze elmetita de la Dua Plena Sesio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en novembro 1956, bonaj efikoj jam komencis montriĝi en la pasintaj monatoj. Tiu ĉi movado de ŝparado devas esti ĝisfunde kaj longdaŭre farata. Ĝuste kiel kritikado kontraŭ niaj aliaj difektoj kaj eraroj, la oponado kontraŭ malŝparemo similas al la lavado de niaj vizaĝoj. Ĉu oni ne lavas la vizaĝon ĉiutage? La Komunista Partio de Ĉinio, la demokratiaj partioj, demokratoj sen partia aparteneco, intelektuloj, industriistoj kaj komercistoj, laboristoj, kamparanoj kaj metiistoj — unuvorte, ĉiu el la sescent milionoj da homoj en nia lando — devas pliigi produktadon, praktiki ŝparadon kaj kontraŭbatali luksemon kaj malŝparemon. Tio havas grandan signifon ne nur ekonomie sed ankaŭ politike. Inter multaj el nia personaro kreskas lastatempe danĝera tendenco — malemo al divido de la ĝojo kaj sufero kun la amasoj kaj emo al zorgo pri persona famo kaj profito. Tio estas tre malbona. Unu el la metodoj por venki tiun ĉi danĝeran tendencon estas simpligi niajn organizojn kaj transigi kadrojn al pli subaj unuoj en nia kampanjo por pliigi produktadon kaj praktiki ŝparadon, por ke sufiĉe granda nombro da kadroj revenu al produkta laboro. Ni klopodu ke ĉiuj niaj kadroj kaj ĉiuj niaj popolanoj ĉiam memoru ke nia lando estas granda socialisma lando sed ankaŭ ekonomie postiĝinta malriĉa lando, kaj ke tio estas tre granda kontraŭdiro. Por ke Ĉinio riĉiĝu kaj fortiĝu, ni bezonas kelkdek jarojn da peniga strebado, en kiu inkluziviĝos la plenumo de la politiko praktiki rigoran ŝparadon kaj oponadi malŝparemon, por konstrui nian landon en diligentema kaj ŝparema maniero.

12. LA VOJO DE INDUSTRIIGO DE ĈINIO

Parolante pri la problemo de la vojo de industriigo, mi volas ĉefe ekspliki la rilatojn inter la disvolviĝo de peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo. Ke peza industrio estas la centro de la ekonomia konstruado de Ĉinio, tio devas esti certigita. Sed samtempe ni devas plene priatenti la disvolvadon de agrikulturo kaj malpeza industrio.

Ĉinio estas granda agrikultura lando, kun pli ol 80% de sia loĝantaro en la vilaĝoj. Industrio devas esti disvolvata samtempe kun agrikulturo. Nur tiam industrio havos krudajn materialojn kaj merkaton por siaj produktaĵoj kaj oni povos akumuli pli multe da fonduso por starigi potencan pezan industrion. Ĉiuj scias ke malpeza industrio havas tre intiman rilaton kun agrikulturo. Sen agrikulturo ne povas ekzisti malpeza industrio. Nuntempe oni ankoraŭ ne klare vidas ke peza industrio devas havi agrikulturon kiel sian gravan merkaton. Sed tio estos pli facile komprenebla, kiam kun la iom-post-ioma disvolviĝo de teknika plibonigado kaj modernigado de agrikulturo, plimultiĝos tagon post tago maŝinoj, sterkoj, akvoutiligaj konstruoj, elektraj stacioj, transportaj faciligoj kiuj estas por agrikultura uzado, brulaĵoj kaj konstruaj materialoj kiuj estas por kamparana konsumado k.t.p. Se dum la periodo de la Dua kaj Tria Kvinjaraj Planoj ni povos atingi pli grandan disvolviĝon en nia agrikulturo, tiel ke ni havos proporcie pli multan disvolviĝon en nia malpeza industrio, tio utilos al la tuta nacia ekonomio. Kiam agrikulturo kaj malpeza industrio estos disvolvitaj, tiam peza industrio havos sian merkaton kaj monprovizon kaj disvolviĝos pli rapide. Tiel ŝajnas ke la paŝo de industriigo estas kvazaŭ iom malrapida, sed efektive ĝi ne estas tia, kontraŭe ĝi estas eble eĉ pli rapida. Post tri kvinjaraj planoj aŭ iom pli longe, nia jara produkto de ŝtalo tamen povos kreski de la plej alta produkto antaŭ la Liberiĝo, nome de pli ol 900,000 tunoj en 1943, ĝis 20,000,000 tunoj aŭ pli multe. Tiam ĝojos la popolo ambaŭ en la urboj kaj en la vilaĝoj.

Mi ne multe parolos pri ekonomiaj problemoj hodiaŭ. Ankaŭ mankas al ni sperto en ekonomia konstruado, kiun ni entreprenis nur sep jarojn, kaj ankoraŭ bezonas akumuli pli da sperto. En la komenco ni ankaŭ ne havis sperton en revolucio kaj faris stumblojn; nur poste ni akiris sperton kaj tiam venis al ni la tutlanda venko. Ni devas akiri la sperton de ekonomia konstruado en malpli longa tempo ol ni bezonis por tiu de revolucio, kaj samtempe ne pagi tiom altan koston. Pago estas ĉiam

Prezidanto Maŭ Intervidiĝis kun Kamarado N. Sanmugathasan

KAMARADO Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj granda gvidanto de la ĉina popolo, intervidiĝis, posttagmeze de la 6-a de junio, kun kamarado N. Sanmugathasan, membro de la Politika Buroo kaj de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Cejlono.


Kamarado Maŭ Zedong havis ekstreme intiman interparolon kun kamarado N. Sanmugathasan.

La intervidiĝon ĉeestis kamarado Kang Ŝeng, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ, kaj kamarado Liu Ningji, membro de la Sekretariejo de CK de KPĈ.

---

bezonata sed ni esperas nur ke ĝi ne estu tiel alta kiel tiu pagita dum la revolucia periodo. Ni devas kompreni ke en tiu ĉi problemo sin trovas kontraŭdiro, t. e., tiu inter la objektivaj leĝoj de la disvolviĝo de socialisma ekonomio kaj nia subjektiva kono, kiun ni devas solvi en praktikado. Tiu ĉi kontraŭdiro ankaŭ manifestiĝos kiel kontraŭdiro inter homoj kaj homoj, t. e., kontraŭdiro inter tiuj kiuj relative ĝuste reflektas objektivajn leĝojn kaj tiuj kiuj relative neĝuste reflektas objektivajn leĝojn, kaj tial tio ĉi ankaŭ estas interna kontraŭdiro de la popolo. Ĉiuj kontraŭdiroj estas objektivaj realaĵoj kaj nia tasko estas speguli ilin kaj solvi ilin kiel eble plej ĝuste.

Por transformi nian landon en industrian potencon, ni devas konscience lerni la progresintan sperton de Sovetunio. Sovetunio jam konstruis socialismon por kvardek jaroj kaj ĝia sperto estas treege valora por ni. Ni rigardu, kiu projektis kaj ekipis tiom da gravaj fabrikoj por ni? Ĉu Usono? Aŭ Britlando? Ne, neniu el ili. Nur Sovetunio estis volonta tion fari, ĉar ĝi estas socialisma lando kaj nia aliancano. Krom Sovetunio, kelkaj frataj lan-



Prezidanto Maŭ akceptas kamaradon N. Sanmugathasan (la dua de maldekstre).

doj el orienta Eŭropo ankaŭ donis al ni helpon. Estas tute prave ke ni devas lerni la bonan sperton de ĉiuj landoj, ĉu socialismaj ĉu kapitalismaj, kaj tio estas ekster dubo. Sed ĉefe ni devas lerni de Sovetunio. Estas du malsamaj sintenadoj en lernado. Unu estas dogmisma sintenado: transpreni ĉion sen konsidero, ĉu ĝi taŭgas aŭ ne al la kondiĉoj de nia lando. Tio ne estas bona sintenado. La alia sintenado estas uzi niajn cerbojn dum lernado kaj lerni tiujn kiuj taŭgas al la kondiĉoj de nia lando, t. e., sorbi la al ni utilan sperton. Tiu ĉi estas la sintenado kiun ni devas alpreni.

Firmigi nian unuiĝon kun Sovetunio, firmigi nian unuiĝon kun ĉiuj socialismaj landoj — tio estas nia fundamenta orientilo kaj ĉi tie kuŝas nia fundamenta intereso. Kaj koncerne al la aziaj kaj afrikaj landoj, kaj ĉiuj pacamaj landoj kaj popoloj, ni devas firmigi kaj disvolvi la unuiĝon kun ili. Unuiĝinte kun tiuj ĉi du fortoj, ni restos ne plu izolaj. Rilate al la imperiismaj landoj, ni ankaŭ devas unuiĝi kun iliaj popoloj kaj klopodi pace kunekzisti kun tiuj landoj, komerci kun ili kaj |bremsi iun ajn eblan militon, sed ni nepre ne portu iajn nerealajn pensojn pri ili.

SUR NIA EKRANO

"Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno

—Celebro de la 17-a Datreveno de la

de la Ĉina Popola Respubliko

PREZIDANTO Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro — Celebro de la 17-a Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko estas grandtipa kolora dokumenta filmo disradianta la brilon de la penso de Maŭ Zedong, kune farita de niaj Centra Novaĵa kaj Dokumenta Filmfarejo kaj la Filmfarejo "1-a Aŭgusto", sub la fervora helpado de junaj ruĝaj gvardianoj.

La unua bildo sur la ekrano estas brilanta ruĝa suno, kiu leviĝas en la oriento ore disradiante al la senlima vasto. Tio aludas, ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas la plej plej ruĝa suno en nia koro!

Dum la spektantoj laŭtlegas kune kun la klariganto la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: **"Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj, kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino",** sur la ekrano prezentiĝas unu post alia scenoj de fajre varma batalado: sturmas en la unuaj vicoj ruĝaj gvardianoj, brave antaŭenmarŝas laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ili faras fortegan atakon kontraŭ la plenmano da potenctenantoj en la Partio kiuj iras la kapitalisman vojon, kontraŭ ĉiaj malnovaj ideoj, kulturo, moroj kaj kutimoj, postlasitaj de la malnova socio; la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, firme starante sur siaj laborpostenoj, tenas revolucion kaj stimulas produkton, kaj senĉese venas informoj pri venkoj sur diversaj frontoj. Ĝuste en tia bonega revolucia situacio, 1,500 miloj da junaj revoluciuloj kaj revoluciaj popolanoj de Pekino kaj de diversaj lokoj kaj nacioj en la tuta lando alvenis por ricevi revuadon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Je la unua de oktobro, aŭroro ruĝigas la imponan kaj majestan Tian-anmen-placon en Pekino. Super la placo pendas ruĝaj balonoj portantaj grandegajn rubandojn kun sloganoj en grandaj ideografiaĵoj "VIVU PREZIDANTO MAŬ!" k. a.

Eksonas la impona melodio *Ruĝas la Oriento*, kaj venas la plej feliĉa momento, kiam per fortaj paŝoj suriras Tian-anmen-pordegon nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ. Sur la ekrano, Prezidanto Maŭ, viglanima kaj kun ruĝe brilanta vizaĝo, ridetante salutas per mano al la amasoj! Sur la ekrano, bolas Tian-anmen-placo aspektanta vasta maro el ruĝaj flagoj kaj helruĝaj libretoj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*! Ho, kiom da homoj jubilas kaj saltas, kiom da homoj fervore kantas, kiom da homoj emociiĝas ĝis larmo, kiom da laŭtaj voĉoj kune formas la mondskuan sontondron: "Vivu! Vivu! Longe vivu Prezidanto Maŭ!"

en Nia Koro”

Fondiĝo

Poste, kamarado Lin Biaŭ, la intima batalamiko de Prezidanto Maŭ, faras gravan paroladon en la celebra kunveno, en kiu li alvokas al la popolo pluapaŝe disvolvi en la tuta lando la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ por fari la tutan landon granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, daŭre teni alte la standardojn de marksism-leninismo kaj de la proleta internaciismo, kaj kune kun la diverslandaj popoloj konduki ĝisfine la batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj tiun kontraŭ la moderna reviziismo kun la gvidantaro de KPSU kiel la kerno.

La filmo enhavas ankaŭ bildojn pri reprezentantoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj de nacimalplimultoj kaj eksterlandaj amikoj, inkluzive de Ta Thi-Kiêu, Edward F. Hill, Viriato da Cruz, Kuroda Hisao kaj Robert Williams, kiuj parolas en la celebra kunveno. Kvankam la parolantoj estas diferencaj en profesio, nacieco kaj civitaneco, tamen iliaj paroloj esprimas la komunan senton de la popoloj de la tuta Ĉinio kaj la tuta mondo: Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en nia koro. Ni por ĉiam revolucios kaj ruĝigos la tutan mondon, sekvante Maŭ Zedong!

Komenciĝas la parado. En la fronto iras giganta statuo de Prezidanto Maŭ montranta la direkton al venko, kaj la granda kultura revolucia armeo kun 1,500 miloj da personoj grandpaŝe marŝas tra la Tian-anmen-placo, kiel ruliĝantaj ondoj, ricevante la revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Ho, Prezidanto Maŭ, Vi estas por ni pli kara ol la gepatroj, via amo al ni estas pli profunda ol maro kaj rivero. Sur la brile disradianta Tian-anmen-pordego, Prezidanto Maŭ daŭre staras kelkajn horojn. Kiam li aŭdis la kriojn de la amasoj troviĝantaj sube antaŭ la pordego “Ni volas vidi Prezidanton Maŭ! Ni volas vidi Prezidanton Maŭ!” li, la amata, iras de la centro de la pordego al ĝia orienta ekstremo, kaj poste de tie al la okcidenta por intervidiĝi kun eksterlandaj amikoj kaj revoluciaj amasoj.

Pekino disradias per pompa brilo, kaj Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en la oriento. Sur Tian-anmen-pordego, Prezidanto Maŭ akceptas pli ol 3,000 reprezentantojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de nacimalplimultoj kaj de la ruĝaj gvardianoj, kiuj venis de diversaj lokoj de la tuta lando, kaj li skribas sian nomon sur la libretoj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* de eksterlandaj amikoj.

Estimata kaj amata gvidanto, granda instruanto, Vi senlime amas la popolon, kaj la popolo senlime amas Vin. Post la parado, Prezidanto Maŭ descendas la pordegon, trapasas la Orakvan Ponton, kaj kun vigla humoro rekte iras al la revoluciaj amasoj restantaj antaŭ la pordego. Tiam, la amasoj alfluas kiel tajdo, miloj kaj dekmiloj da homoj, miloj kaj dekmiloj da koroj sin direktas al la plej plej ruĝa suno en nia koro Prezidanto Maŭ, kiel heliantoj al la suno. Ridante, saltante kaj kriante ili deziras el sia korprofundo eternan vivon al Prezidanto Maŭ, la amata.

Venas la festa nokto. Buntaj artfajraĵoj flugas en la aeron aro post aro. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ refoje aperas sur Tian-anmen-placo. Kune kun la revoluciaj amasoj li eksidas sur la pavimo por ĝoje celebri la feston. La gajaj amasoj refoje bolas, entuziasme prikantante Prezidanton Maŭ.

Kantu per la plena voĉo! Apud la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la homoj aŭdigas la plej sonoran kaj plej belan kanton en la mondo.

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, Vi estas la plej plej ruĝa sensubira suno en nia koro!

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, ni elkore deziras al Vi eternan vivon! eternan vivon!

Verkoj de Prezidanto Maŭ Eldoniĝis en Granda Kvanto

En la spirito de lukto pro ĉiu minuto, la revoluciaj gelaboristoj de la Pekina Tria Presejo pretigas la broŝuradon de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong.





Verkoj de Prezidanto Maŭ estas trezoro de la popolo de diversaj naciecoj. La revoluciaj junulinoj en Huhehoto, Interna Mongolio, eklegas tuj post la ricevo de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

KUN senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la proletaj revoluciuloj sur la eldona kaj presa frontoj de nia lando presis en grandega kvanto la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj jam eldoniĝis pli ol 29,000,000 kolektoj da *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en la tuta lando dum la unuaj kvin monatoj ĉijare. Je pli ol 150 procentoj tiu cifero superas la totalan eldonan kvanton dum la 15 jaroj antaŭ la granda proleta kultura revolucio, kaj pli multiĝas je ĉirkaŭ 6,000,000 ol la eldona kvanto dum la pasinta jaro. Samtempe, ankaŭ eldoniĝis pluraj centmilionoj da apartaj ekzempleroj de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*.

La grandkvanta eldono de la verkoj de Prezidanto Maŭ rezultiĝis pro la venko de la proleta revolucia linio super la burĝa reakcia linio. Subtenate de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj de la malnova Propaganda Departemento de CK de KPĈ kaj la malnova Ministerio de Kulturo furioze oponis la propagandon de la penso de Maŭ Zedong. Utiligante la eldonan potencon en iliaj manoj, ili ĉiamaniere bojkotis la eldonon de la verkoj de Prezidanto Maŭ; kontraŭe, ili multege presis la libron *Memkulturo* por sia mastro, kaj kolportis siajn nigrajn varojn. Dum tiu ĉi senprecedenca granda proleta kultura revolucio, la proletaj revoluciuloj leviĝis kaj malkaŝis la damnindajn krimagojn de plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj de la malnova Propaganda Departemento de CK de KPĈ kaj la malnova Ministerio de Kulturo, ribelis kontraŭ ili kaj deprenis la regpotencon de ili. De tiam la proletaj revoluciuloj vere posedas la potencon pri eldono. Tio estas la venko de la granda proleta kultura revolucio.

Por kontentigi la urĝan postulon de la vasta revolucia amaso por studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, la proletaj revoluciuloj de la eldona rondo aktive klopodis por presi kaj eldoni la verkojn de Prezidanto Maŭ en granda kvanto. Tamen, troviĝis multaj malfaciloj en la grandkvanta presado de verkoj de Prezidanto Maŭ dum la mallongaj kvin monatoj. Kunlaborante kun la vastaj revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la paperfabrika, presinka, mekanika kaj transporta frontoj, la proletaj revoluciuloj de la eldona rondo venkis diversajn malfacilojn. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la paperfabrika fronto, precipe tiuj de malgrandaj paperfabrikoj, sub la kondiĉoj de manko de bonaj ekipaĵo kaj tekniko kaj post multfoja eksperimento, sukcese provfabrikis per sukerkanaj rekrementoj bonan paperon por presi la verkojn de Prezidanto Maŭ. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la mekanika sistemo kaj presinkfabrika fronto ankaŭ fabrikis per plej granda rapideco diversajn plej bonajn presmaŝinojn kaj presinkon bezonatajn por presi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Por ĝustatempe transporti paperojn por garantii plenumon de la bezono de preso, la interkomunikaj batalantoj sur la transporta fronto neniel prokrastis la transportadon de paperoj por la presado de verkoj de Prezidanto Maŭ, preferante nemanĝi kaj nedormi. La vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj sur la presa fronto des pli disvolvis la spiriton "kapti eĉ horeton" kaj sin ĵetis en la batalon. Fabrikoj grandaj kaj malgrandaj ĉiuj sinĵetis en la laboron de pretigado de la verkoj de Prezidanto Maŭ. La oficistoj kaj laboristoj subtenis kaj helpis unu la alian, kaj ili montris ĉiam pli grandan revolucian energion. Ili ankaŭ vaste disvolvis teknikan plibonigon, reformis altrapidajn presmaŝinojn, kaj sukcesis en senfadena kunigo de presfolioj sub la kondiĉo de manko de preta projekto kaj kun malbonaj ekipaĵoj. Tiel ili garantiis la kvaliton de pretigado kaj multege rapidigis la pretigadon de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

"Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong" Vendiĝas en Grandaj Nombroj

EN la tempo kiam la tutmonda revolucia popolo eniras kun levita kapo kaj per grandaj paŝoj la tute novan historian epokon kun la penso de Maŭ Zedong kiel granda standardo, kiam sonas la triumfokanto pri granda venko akirita de la mondskua, granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, kaj kiam la ondegoj de la naciaj liberigaj movadoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko bolante puliĝas antaŭen, la fremdlingvaj eldonoj de la ruĝa trezora libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* pretigitaj de Ĉinio vaste disvendiĝas tra la tuta mondo. En la daŭro de nur ok monatoj, pli ol 800,000 ekzempleroj de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas venditaj kaj plej varme akceptataj kaj laŭdataj de centmilionnombra revolucia popolo en pli ol 100 landoj kaj regionoj. La vasta disvendiĝo de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* tra la tuta mondo estas grava evento en la historio de la internacia komunisma movado kaj alia granda venko de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio de Ĉinio.

De oktobro 1966 ĝis majo 1967, laŭ nekompleta statistiko, Guozi Shudian de Ĉinio jam disvendis en 117 landoj kaj regionoj de la tuta mondo pli ol 800,000 ekzemplerojn de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en 14 lingvoj, nome, la angla, franca, hispana, japana, rusa, germana, itala, nepala, vjetnama, indonezia, araba, birma, svahilia kaj persa.

Krome, por kontentigi la deziron de vasta legantaro akiri la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, revoluciaj amasoj kaj progresemaj organizoj en multaj landoj mem komencis la laboron de ĝia traduko kaj eldono. Prenu Japanion kiel ekzemplon, de novembro pasintjare ĝis marto ĉijare, oni jam pretigis 4 tradukojn kun totala eldonnombro de pli ol 300,000 ekzempleroj. Komence de julio, la Orienta Librejo kaj aliaj progresemaj librejoj kaj organizoj en Japanio, laŭ la bezonoj de la popolamasoj en ilia lernado, laboro kaj batalo, eldonis grandnombre *El Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* konsistantan el elektitaj partoj el *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj pli ol 30 specojn da afiŝoj kun eldiroj de Prezidanto Maŭ Zedong.

La revolucia popolo en nombro de centmilionoj entuziasme aklamas la publikigon kaj vastan disvendon de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en diversaj fremdaj lingvoj. Ĉar tio "alportas al miloj kaj dekmiloj da popolanoj marksism-leninismon" kaj "alportas lumon al la tuta homaro de la mondo"! La libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kuraĝigas kaj plifirmigas la fidon kaj decidemon de la revolucia popolo por "pli rapide posedi la penson de Maŭ Zedong". Ili konkure esprimas ke ili "lernos *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* la tutan vivon" kaj "por ĉiam revolucios sekvante Prezidanton Maŭ."



Membroj de la Itala Ligo de Junaj Komunistoj (Marksism-leninisma) studas kolektive verkojn de Prezidanto Maŭ.

Gvineaj virinoj legas la Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.





La revoluciaj gelaboristoj de Ŝanhaja Kvara Presejo faras kontroladon de la eksportotaj pretigitaj ekzempleroj de la libreto Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong *en fremdaj lingvoj.*

Perfido al la Proleta Diktaturo Estas Esenca Elemento de la Libro "Memkulturo"

Redakcioj de *Hongqi* (*Ruĝa Flago*) kaj *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*)

Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo estas por depreni ŝtatpotencon kaj ĝin firmigi. Kaj ankaŭ la viv-morta batalo de kontraŭrevoluciuloj kontraŭ revoluciaj fortoj celas tute al konservo de ilia ŝtatpotenco.

MAŬ ZEDONG

LA libro *Memkulturo* estas la reprezenta verko de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Tiu libro estas venenega herbaĉo kontraŭ marksism-leninismo, kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. Ĝia veneno disvastiĝis tra la tuta lando kaj la mondo. Ĝi nepre devas esti ĝisfunde kritikata.

Kio estas la esenca elemento de la libro *Memkulturo*?

Ĝia esenca elemento estas perfidi la marksism-leninisman doktrinon pri la proleta diktaturo. Kaj perfidi la doktrinon pri la proleta diktaturo signifas komplete kaj ĝisfunde perfidi marksism-lininismon, komplete kaj ĝisfunde perfidi la revolucian aferon de la proletaro.

Antaŭ pli ol 100 jaroj Marks jam montris: "Rilate min, ĉu eltrovi la ekziston de klasoj en moderna socio ĉu eltrovi iliajn batalojn inter si, ĉio ĉi ne estas mia merito. Longe antaŭ mi, burĝaj historiistoj jam formulis la historian disvolviĝon de tiuj klasaj bataloj, kaj burĝaj ekonomikistoj jam faris ekonomian anatomion pri klasoj. Tio nova, kion mi faris, konsistis en la pruvo de jenaj punktoj: 1. La ekzisto de klasoj rilatas nur kun certaj historiaj etapoj de la disvolviĝo de la produktado; 2. La klasa batalo nepre kondukas al la proleta diktaturo; 3. Tiu ĉi diktaturo mem estas nur transiro al elimino de ĉiuj klasoj kaj al senklasa socio." ("Marks al I. Vejdemejer", la 5-an de marto, 1852. Marks kaj Engels, *Elektitaj Verkoj*, vol. 2, p. 425, Dietz-Eldonejo, Berlino, 1960)

Antaŭ 50 jaroj ankaŭ Lenin emfaze montris: "La ĉefa enhavo de la doktrino de Marks estas klasa batalo. Oni tiel parolas kaj skribas tre ofte. Tamen tio estas neprava. El tiu neprava vidpunkto konstante rezultiĝas oportunisma distordado de marksismo, falsigo de ĝi en ion akcepteblan por la burĝaro. Ĉar la doktrino de klasa batalo estas kreita ne de Marks sed de la burĝaro antaŭ Marks kaj, ĝeneraldire, akceptebla por la burĝaro. Kiu agnoskas nur klasan batalon, tiu ankoraŭ ne estas marksisto, tiu povas esti ankoraŭ ne elirintaj el la limoj de la burĝa ideologio kaj burĝa politiko. Limigi marksismon per la doktrino de klasa batalo signifas distranĉi kaj distordi marksismon kaj turni ĝin en ion akcepteblan por la burĝaro. Marksisto estas nur tiu, kiu disvastigas la agnoskon de la klasa batalo ĝis agnosko de la proleta diktaturo. Ĝuste en tio kuŝas la plej profunda diferenco inter marksisto

kaj triviala etburĝo (ankaŭ granda burĝo). Estas necese ekzameni sur tiu provŝtono la veran komprenon kaj agnoskon pri marksismo." ("La Ŝtato kaj Revolucio", aŭgusto-septembro de 1917, Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, 4-a rusa eldono, vol. 25, p. 383.)

Kiel ĉiuj oportunistoj en la historio de la internacia komunisma movado, la aŭtoro de la libro *Memkulturo* distrancas kaj distordas marksismon en ĝiaj fundamentoj. En tiu libro de preskaŭ 50,000 ĉinaj ideografiaĵoj, kvankam li amasigis iujn abstraktajn frazojn pri la klasa batalo, tamen li faris nenian mencion pri la klasa batalo en aktuala vivo kaj pri la proleta diktaturo. Tiaj frazoj pri la klasa batalo sen mencio pri la proleta diktaturo estas, kompreneble, trompaj sensencaĵoj kaj tute akcepteblaj por la burĝaro.

La libro *Memkulturo* estis unuafoje eldonita en julio, 1939, kaj represita multajn fojojn dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito. Ĉiuj tiuj eldonoj faris nenian mencion pri la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la klasbatalo dum la periodo de tiu milito*, pri la Liberiga Milito kaj la klasbatalo dum tiu periodo, aŭ pri la problemo de la depreno de ŝtatpotenco. Tia *Memkulturo* ne povas tuŝi eĉ hareton de la japana imperiismo, de la usona imperiismo kaj ĝia lakeo, Kuomintango de Ĉiang Kajŝek.

En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Prezidanto Maŭ montris: "La centra tasko kaj plej alta formo de revolucio estas kapti ŝtatpotencon per armita forto kaj solvi problemon per milito." ("Problemoj de Milito kaj Strategio") **"La disvolviĝo, firmiĝo kaj bolŝevikiĝo de nia partio iris en revoluciaj militoj; sen armita batalo ne estus tia Komunista Partio kia hodiaŭ ĝi estas."** ("Inaŭguraj Vortoj por *La Komunisto*") Evidente, sen la revolucia milito, sen depreno de ŝtatpotenco per armita forto, absolute ne eblas la disvolviĝo, firmiĝo kaj konstruado de la Partio kaj la ideologia remuldo de la partianoj. Tamen en la jaroj de milito kiam

La heroaj PLA-anoj indigne manifestacias por kondamni la Ĥruŝĉov de Ĉinio kaj elimini la venenajn influojn de lia verko Memkulturo.



la kanonoj estis muĝantaj, en la jaroj de batalo por depreni ŝtatpotencon, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon deziris ke oni sin okupu pri "memkulturo", forgesante la fundamentan taskon de depreno de ŝtatpotenco per armita forto. Ĉu tia "memkulturo" ne "elkulturos" nur filistrojn kiuj ne faras revolucian militon kaj ne volas depreni ŝtatpotencon! La filistroj "elkulturitaj" tiamaniere absolute ne estas komunistoj, sed social-demokratoj de la Dua Internacio.

La libro *Memkulturo*, tiel de la reviziita eldono represita en aŭgusto, 1949, kiel ankaŭ de la nova eldono kun multaj aldonoj kaj forstrekoj en aŭgusto, 1962, restis ankoraŭ tiu sama malnova varo. La reviziita kaj la nova eldonoj de la libro en tiu periodo ne nur diris nenion pri la socialisma revolucio kaj la klasbatalo en la socialisma socio, sed ankaŭ restis komplete muta pri la proleta diktaturo. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon eĉ publike ludis malan melodion kontraŭ serio da gravaj verkoj de Prezidanto Maŭ, kiaj la *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Pri Popoldemokratia Diktaturo* kaj *Pri la Ĝusta Traktado de la Kontraŭdiroj Interne de la Popolo;* li malkaŝe oponis la penson de Maŭ Zedong kaj deziris ke oni sin okupu pri "memkulturo", forgesante pri la socialisma revolucio, pri la klasbatalo en la socialisma socio kaj pri la proleta diktaturo. Ĉu tia "memkulturo"ne postulas ke homoj "kulturu" sin en la Bukĥarintipajn personojn kiuj entreprenas kapitalismon anstataŭ socialismon, en Ĥruŝĉov-tipajn personojn kiuj forĵetis la proletan diktaturon kaj restarigas kapitalismon!

Kvankam la libro *Memkulturo* estas represita kaj reeldonita multajn fojojn, tamen ĝi ĉiam menciis nenion pri la depreno de ŝtatpotenco per armita forto, pri la proleta diktaturo. Ĉu tio estas hazarda neglekto? Ne.

La libro *Memkulturo* parolas pri la problemo de la ŝtato. Marksisto neniel povas paroli pri la problemo de la ŝtato sen mencio de ĝia klasa naturo, sen mencio de la proleta diktaturo. Tamen, la aŭtoro de la libro *Memkulturo* ĝuste forĵetis la proletan diktaturon kaj abstrakte parolas pri la ŝtato kiel dungita instruitulo de la burĝaro.

La aŭtoro de la libro *Memkulturo* diras, ke la proletaro "povas konstrui partion kaj ŝtatan aparaton kun rigoraj organizo kaj disciplino por fari senkompromisan batalon kontraŭ ĉiuj fenomenoj de koruptiĝo, burokratiĝo kaj degenereco, kaj senĉese forlavi el la Partio kaj la ŝtata aparato tiujn elementojn kiuj estis koruptiĝintaj, burokratiĝintaj kaj degenerintaj en sia laboro", "kaj tiel konservi la purecon de la Partio kaj la ŝtata aparato". Ni volus demandi: Kiel la proletaro povas konstrui sian propran ŝtatan aparaton? Ĉu tio povas efektiviĝi sen revolucio perforta? Ĉu tio povas efektiviĝi sen frakaso de la malnova ŝtata maŝino? La libro *Memkulturo* ĝuste forĵetis tiun fundamentan principon de marksism-leninismo. Laŭ la opinio de la aŭtoro de la libro *Memkulturo*, "utopio" descendos de la ĉielo, se nur komunistoj pene klopodas por "memkulturo". Tio, kion li ĉiam revas, estas nenio alia ol burĝa ŝtato.


En la libro *Memkulturo* reeldonita en 1962, al la suprecitita paragrafo estis aparte aldonitaj jenaj vortoj "starigi ŝtatan aparaton centralizitan kaj samtempe demokratian". Tia intenca aldono montras la vidpunkton de la aŭtoro pri la naturo de nia ŝtato. Tamen, nek ĉitie nek aliloke en la tuta libro, li faras ian mencion pri la diktaturo super la klasaj malamikoj. **Prezidanto Maŭ diris: Nia proleta ŝtato praktikas diktaturon super la klasaj malamikoj kaj "praktikas demokratian centralizismon interne de la popolo".** La aŭtoro de la libro *Memkulturo* simple desegnas nian ŝtaton kiel ŝtaton "centralizitan kaj samtempe demokratian" sen diktaturo super la malamikoj. Kio do estas tio, se ne opono kontraŭ la proleta diktaturo, distrumpeto de teorio de Ĥruŝĉov pri "la ŝtato de la tuta popolo" kaj pledo por efektivigo de la burĝa diktaturo?

La libro *Memkulturo* priskribas en longa parto, ke "la afero de komunismo estas la plej granda kaj peniga afero senprecedenca en la homa historio". Marksisto nepre devas mencii ĉi tie, ke komunismo povas esti realigita nur tra la proleta diktaturo. Tamen la aŭtoro ne diris eĉ unu vorton pri la proleta diktaturo.

"Kio estas la afero de komunismo finfine? Kiel ni partianoj devas ĝin entrepreni?" La aŭtoro respondas: "En tia mondo ne ekzistos ekspluatantoj kaj subpremantoj, nek bienuloj kaj kapitalistoj, nek imperiismo kaj faŝismo, ktp. Tie ne ekzistos ankaŭ subpremataj kaj ekspluatataj popolanoj, nek mallumo, malsaĝo, postiĝinteco ktp. En tia socio, ĉiuj homoj fariĝos senegoismaj, inteligentaj komunistoj kun altaj kultura atingo kaj teknika nivelo, inter homoj regos reciprokaj helpo kaj amo kaj ne ekzistos tiaj malraciaj aferoj kiaj reciprokaj suspekto kaj trompo, reciprokaj malutilo kaj buĉado, kaj milito. Tia socio, kompreneble, estas la plej bona, plej bela kaj plej progresa socio en la homa historio." La aŭtoro diras plue: "Ni komunistoj devas havi la plej grandan spiritforton kaj revolucian decidemon. Ĉiu partiano devas ĝoje kaj serioze decidiĝi por ŝultrigi la taskon realigi komunismon, la plej grandan kaj plej penigan taskon senprecedencan en la homa historio." Post serio da tiaj pastromanieraj preĝoj kaj benoj, la aŭtoro faras konkludon dirante: "Tio ĉi estas mia kompreno pri la afero de komunismo." En la respondo de la aŭtoro, ellaborita per altflugaj frazoj, estas forlasita ĝuste la proleta diktaturo. Jen, kiel li komprenas la aferon de komunismo kaj kion li rekomendas por entrepreni ĝin!

Tia priskribo pri komunisma socio estas nenio nova, sed ekzistas jam de la antikva tempo. En Ĉinio troviĝis tiaj priskriboj en *Artikolo pri Granda Harmonio* en la ĉapitro *Lijun* en la *Libro de Ritoj*, en *La Vojaĝo al Persik-flora Lando* de Taŭ Kian kaj la *Libro de Granda Harmonio* de Kang Joŭvej. Eksterlande, ankaŭ troviĝis granda nombro da tiaj verkoj de utopiaj socialistoj de Francio kaj

En la Giangnan-a Ŝipkonstruejo, Ŝanhajo, propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong el la mara armeo faras prezentaĵon For la Potenctenanton N-ro 1 en Ĉinio Irantan la Kapitalisman Vojon.



Britio. Ĉiuj ĉi tiuj estas varoj de la sama speco.

Laŭ la opinio de la aŭtoro, en la komunisma socio ĉio estos perfekta, sen iomete da mallumo kaj kontraŭdiro, ĉio estos bona, ne ekzistos kontraŭaĵoj. La socio ĉesos de tiam disvolviĝi. Neniam ŝanĝiĝos la socio ne nur en kvalito, sed ŝajne ankaŭ en kvanto. Socia disvolviĝo tiam finiĝos kaj la socio restos sama por ĉiam. Ĉi tie la aŭtoro forĵetis la fundamentan leĝon de marksismo, t. e., ke la disvolviĝo de ĉiu ajn afero, de ĉiu ajn homa socio estas antaŭenpuŝata de la batalo de kontraŭaĵoj, de kontraŭdiroj. La aŭtoro ĉi tie distrumpetas metafizikon kaj forĵetis la grandan doktrinon de dialektika materiismo kaj historia materiismo.

Marks diris: "Inter la kapitalisma socio kaj la komunisma socio kuŝas la periodo de revolucia transformado de unu en la alian. Responde al tiu periodo, estas ankaŭ politika transira periodo, en kiu la ŝtato ne povas esti alia ol la revolucia diktaturo de la proletaro." ("Kritiko de la Gotha-programo", Marks kaj Engels, *Kolektitaj Verkoj*, vol. 19, p. 28, Dietz-Eldonejo, Berlino, 1962.)

Lenin diris: "Disvolviĝo antaŭen, t. e. al komunismo, iras tra la proleta diktaturo, kaj alie iri ne povas, ĉar la rezisto de kapitalist-ekspluatantoj ne povas esti frakasita de iu ajn alia kaj tra ia ajn alia vojo." ("La Ŝtato kaj Revolucio", Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, 4-a rusa eld., vol. 25, p. 433.)

En sia libro *Memkulturo*, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon emfaze montras, ke post la politika venko de la proletaro, "oni ankoraŭ devas trairi longan periodon de socialisma reformado por finfine paŝopostpaŝe transiri en la komunisman socion". Ĉu iu ajn kun iomete da marksismo povas ne mencii ĉi tie la proletan diktaturon! Sed li ne, ankaŭ ĉi tie eĉ ne estas unu vorto pri tio! Evidente, lia "longa periodo de reformado" ne estas periodo de la proleta diktaturo, lia vojo de "paŝopostpaŝa transiro en komunisman socion" ne estas la vojo de la proleta diktaturo.

Estas tre klare, ke la aŭtoro de la libro *Memkulturo* havas sian kompletan ideologian sistemon, t. e., "entrepreni la aferon de komunismo sen proleta diktaturo. Tio estas centpocenta perfido al scienca komunismo, centpocenta perfido al marksism-leninismo, la penso de Maŭ Zedong, kaj estas centpocenta reviziismo.

La aŭtoro de la libro *Memkulturo* ne nur mem ne mencias pri la proleta diktaturo, sed ankaŭ forstrekis la vortojn pri la proleta diktaturo, el la du citaĵoj el verkoj de Lenin.

La originalaj vortoj de Lenin estas jenaj:

"La rezisto de la burĝaro fariĝas dekoble furioza pro ĝia renversiĝo (eĉ se nur en unu lando). Ĝia potenco kuŝas ne nur en la forto de internacia kapitalo, en la forto kaj fortikeco de ĝiaj internaciaj kunligoj, sed ankaŭ en la forto de kutimo kaj la forto de malgrandskala produkto. Ĉar, bedaŭrinde, en la mondo ankoraŭ restas tre tre multe da malgrandskala produkto kaj tiu malgrandskala produkto naskas kapitalismon kaj la burĝaron konstante, ĉiutage, ĉiuhore, spontanee kaj grandnombre. Pro ĉiuj ĉi tiuj kaŭzoj **la proleta diktaturo estas nepre necesa,** kaj venko super la burĝaro ne povas esti atingita sen longdaŭra, obstina, viv-morta batalo, tio estas, batalo postulanta persistecon, rigoran disciplinon, firmecon, nesubigeblecon kaj unuecon de volo."

Sed ĉiuj eldonoj de la libro *Memkulturo*, inkluzive la novan eldonon de 1962, citas tiujn ĉi vortojn kiel jene:

"La rezisto de la burĝaro fariĝas dekoble furioza pro ĝia renversiĝo (eĉ se nur en unu lando). Ĝia potenco kuŝas ne nur en la forto de internacia kapitalo, en la forto kaj fortikeco de ĝiaj internaciaj kunligoj, sed ankaŭ en la forto de kutimo kaj la forto de malgrandskala produkto. Ĉar, bedaŭrinde, en la mondo ankoraŭ restas tre tre multe da malgrandskala produkto kaj tiu malgrandskala produkto naskas kapitalismon kaj la burĝaron konstante, ĉiutage, ĉiuhore, spontanee kaj grandnombre. Pro ĉiuj ĉi tiuj kaŭzoj ... venko super la burĝaro ne povas esti atingita sen longdaŭra, obstina, viv-morta batalo, tio estas, batalo postulanta persistecon, rigoran disciplinon, firmecon, nesubigeblecon kaj unuecon de volo."

Ĝuste tiamaniere la aŭtoro de la libro *Memkulturo* malkaŝe kaj aŭdace forhakis la frazon **"la proleta diktaturo estas nepre necesa"** el la mezo de ĉi tiu citaĵo. Ĉu tio estas hazarda neglekto! Estas kristale klare, ke laŭ la opinio de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, la proleta diktaturo estas nenecesa.

La alia citaĵo laŭ la originalaj vortoj de Lenin estas jena:

"Likvidi klasojn signifas ne nur forpeli la bienulojn kaj la kapitalistojn — tion ni jam plenumis kompare facile; tio signifas ankaŭ likvidi malgrandajn komercaĵ-produktistojn, kaj ilin ni **ne povas forpeli,** nek povas subpremi; ni devas pace vivi kun ili; ilin ni povas (kaj devas) transformi kaj reeduki nur tra longdaŭra, malrapida, atentema organiza laboro. De diversaj flankoj per la spontaneaj fortoj de etburĝoj ili ĉirkaŭas, infektas kaj koruptas la proletaron, konstante kaŭzas interne de la proletaro la reaperon de la malsanoj de etburĝaj senspineco, malunueco, individuismo kaj turniĝo de ekzalteco en senkuraĝiĝon. La rigoraj centralismo kaj disciplino estas bezonataj interne de la politika partio de la proletaro por kontraŭstari tion, por ludi la organizan rolon de la proletaro (kaj tio estas ĝia ĉefa rolo) korekte, sukcese kaj triumfe. **La diktaturo de la proletaro estas obstina batalo, sanga kaj nesanga, perforta kaj paca, milita kaj ekonomia, eduka kaj administra, kontraŭ la fortoj kaj la tradicioj de la malnova socio.** La forto de kutimo de milionoj kaj dekmilionoj da homoj estas la plej terura forto. **Sen partio el ŝtalo longtempe hardita en la batalo, sen partio ĝuanta la fidon de ĉiuj honestaj homoj de la propra klaso, sen partio kapabla observi kaj influi la humoron de la amasoj, estas neeble sukcese konduki tian batalon.** Venki la potencan kaj centralizitan burĝaron estas miloble pli facile ol 'venki' milionojn kaj dekmilionojn da malgrandaj posedantoj; tamen ili per sia ĉiutaga, bagatela, nevidebla, nekaptebla, koruptа agado produktas tiujn rezultojn, kiujn bezonas la burĝaro kaj kiuj restarigas la burĝaron."

Sed ĉiuj eldonoj de la libro *Memkulturo*, inkluzive la novan eldonon de 1962, citas tiujn vortojn kiel jene:

"Likvidi klasojn signifas ne nur forpeli la bienulojn kaj la kapitalistojn — tion ni jam plenumis kompare facile; tio signifas ankaŭ likvidi malgrandajn komercaĵ-produktistojn, kaj ilin ni **ne povas forpeli,** nek povas subpremi; ni devas pace vivi kun ili; ilin ni povas (kaj devas) transformi kaj reeduki nur tra longdaŭra, malrapida, atentema organiza laboro. De diversaj flankoj per la spontaneaj fortoj de etburĝoj ili ĉirkaŭas, infektas kaj koruptas la proletaron, konstante kaŭzas interne de la proletaro la reaperon de la malsanoj de etburĝaj senspineco, malunueco, individuismo kaj turniĝo de ekzalteco en senkuraĝiĝon. La rigoraj centralismo kaj disciplino estas bezonataj interne de la politika partio de la proletaro por kontraŭstari tion, por ludi la organizan rolon de la proletaro (kaj tio estas ĝia ĉefa rolo) korekte, sukcese kaj triumfe.... La forto de kutimo de milionoj kaj dekmilionoj da homoj estas la plej terura forto.... Venki la potencan kaj centralizitan burĝaron estas miloble pli facile ol 'venki' milionojn kaj dekmilionojn da malgrandaj posedantoj; tamen ili per sia ĉiutaga, bagatela, nevidebla, nekaptebla, koruptа agado produktas tiujn rezultojn, kiujn bezonas la burĝaro kaj kiuj restarigas la burĝaron."

La aŭtoro de la libro *Memkulturo* ĉi tie refoje senskrupule kaj aŭdace fortranĉis la liniojn **"La diktaturo de la proletaro estas obstina batalo, sanga kaj nesanga, perforta kaj paca, milita kaj ekonomia, eduka kaj administra, kontraŭ la fortoj kaj la tradicioj de la malnova socio." Li eĉ fortranĉis la gvidon de la Komunista Partio.** Ĉu tio ĉi estas plua hazarda neglekto!

Kial estas refoje forstrekitaj la linioj pri la proleta diktaturo en libro *Memkulturo* nove reviziita kaj eldonita en 1962? Povas esti nur unu klarigo, nome: la aŭtoro oponas nian ŝtaton de la proleta diktaturo kaj deziras transformi nian proletan diktaturon en la burĝan.

Ĉio ĉi tio sufiĉe pruvas, ke tiu plej granda potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas ĝismorta malamiko de la proleta diktaturo. La proleta diktaturo estas absolute ne tolerebla por li; kaj vidante la terminon "proleta diktaturo", li nepre ĝin fortranĉas.

Ĝuste tiel la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon senhonte kastras la animon de marksism-leninismo.

Perfidinte la proletan diktaturon, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon priparolis "esti la plej bona lernanto de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin". Tio estas vere granda ofendo al Marks, Engels, Lenin kaj Stalin.

En la refoja eldono de la libro *Memkulturo* en 1962 la aŭtoro ŝanĝis "esti la plej bona lernanto de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin" en "esti bona lernanto de Marks kaj Lenin", kaj forstrekis ĉiujn tri antaŭajn citaĵojn el la kvara ĉapitro de la *Historio de la Komunista Partio de Sovetunio (B) — Konciza Kurso.* Tiuj ĉi tri citaĵoj estas:

"Homoj kondukas batalon kontraŭ la naturo kaj utiligas la naturon por produkto de materiaj valoroj ne en izoliteco unu de la alia, ne kiel apartaj individuoj unu de la alia, sed en komuno, en grupoj kaj en socioj. Tial, en ĉiu ajn tempo kaj ĉiu ajn kondiĉo produkto estas socia produkto. Entreprenante la produkton de materiaj valoroj, homoj inter si starigas tiujn aŭ aliajn reciprokajn rilatojn interne de la produkto, tiujn aŭ aliajn produktajn rilatojn."

"La unua trajto de produkto kuŝas en tio ke ĝi neniam longtempe restas ĉe unu punkto kaj ĝi ĉiam sin trovas en stato de ŝanĝiĝo kaj disvolviĝo, kaj samtempe, ŝanĝo en produkta maniero neeviteble kaŭzas ŝanĝon de la tuta socia sistemo, sociaj ideoj, politikaj vidpunktoj kaj politikaj institucioj, — kaŭzas rekonstruon de la tuta socia kaj politika strukturo."

"Estas nevenkebla nur tio, kio naskiĝas kaj disvolviĝas."

Evidente, en 1962 la aŭtoro de *Memkulturo* forstrekis la nomon de Stalin kaj ĉiujn antaŭajn citaĵojn el la kvara ĉapitro de la *Historio de la Komunista Partio de Sovetunio (B) — Konciza Kurso,* tute por konformi al la bezono de la sovetunia reviziisma kliko, por oponi Stalin, tio estas, oponi leninismon.

Por forstreki la nomon de Stalin, li prenis Engels kiel kunviktimon kaj ankaŭ forstrekis la nomon de Engels.

En plurfojaj represoj kaj reeldonoj de la libro *Memkulturo* nenie estas alvoko esti bona lernanto de Prezidanto Maŭ kaj nenie estas menciita la penso de Maŭ Zedong. Tio ankaŭ montras, ke la aŭtoro de la libro *Memkulturo* estas falsa marksisto kaj vera reviziisto. Ĉar en nia epoko, forlasi la penson de Maŭ Zedong signifas radikale devii de marksism-leninismo, ĝuste kiel, kiam marksismo atingis la stadion de leninismo, forlasi leninismon signifas radikale devii de marksismo.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo estas por depreni ŝtatpotencon kaj ĝin firmigi." ("Elektado en la Kuranta Jaro")

Tion kontraŭas la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Li oponas la proletaron kaj la komunistojn depreni kaj firmigi la ŝtatpotencon, sed reduktas ĉion en la mondo al "memkulturo".

"Memkulturo estas ĉio, la fina celo estas nenio" — tio estas la formulo de la libro *Memkulturo.* Tiu formulo, same kiel la formulo de la malnova renegato Bernstein: La movado estas ĉio, la fina celo estas nenio", estas centpocente reviziisma varo.

Ĉu vere la fina celo estas nenio? Kompreneble ne. Kiel la malnova renegato Bernstein, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon havas sian insideman, kaŝitan celon. Li intencas demoralizi la vicaron de la proletaro, ke homoj ju pli memkulturu, des pli reviziistiĝu, glitante laŭ la vojo de reviziismo. Antaŭ la akiro de la tutlanda venko, li oponis la proletan deprenon de ŝtatpotenco kaj post la venko de la tuta lando, li oponas la proletan diktaturon kaj vane intencas efektivigi kaj restarigi kapitalismon. Tio ja estas la celo de lia reakcia formulo "memkulturo estas ĉio, la fina celo estas nenio."

**En ĉiuj eldonoj de la libro* Memkulturo, *antaŭ la jaro 1962, estis nenio menciita pri la Kontraŭjapana Rezistmilito. En la nova eldono de la jaro 1962, la aŭtoro aldonis, kiel ekzemplon, la paragrafon pri la politiko de la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto en la ĉapitro "Unueco de la Teoria Studo kaj Ideologia Memkulturo".*



Komandantoj kaj batalantoj el trupoj de la Ŝenjang-a Armea Distrikto kunvenas por akuzi indigne la Ĥruŝĉov de Ĉinio kaj unuanime juras ĝismorte defendi Prezidanton Maŭ kaj lian revolucian linion.

Komplete Elimini la Venenan Influon de "Memkulturo"

ROSE SMITH (Anglio)

EN Ĉinio kaj nombro da aliaj landoj de la mondo, multaj homoj studis la libron *Memkulturo* kaj estas certagrade venenitaj de ĝi. Ni ne devas perdi gardemon kontraŭ tiu libro, sed devas firme batali kontraŭ ĝia absurda "teorio", eĉ se ĉiuj ekzempleroj de la libro estus morgaŭ tute detruitaj. Ne nur kiuj legis kaj studis la libron, estas influitaj de ĝia veneno; pere de diversaj kaŝaj formoj, ĝia "teorio" eĉ influis multajn aliajn, kiuj ne legis ĝin.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Batalo kontraŭ erara penso similas al inokulado per kontraŭvariola vakcino. Dank' al la efiko de la vakcino la homa korpo pliigas sian imunecon."

Kiam ni parolas pri la venena influo de la libro kies angl-lingva eldono havas la titolon *Kiel Fariĝi Bona Komunisto*, estas necese konsideri la epokan fonon, sur kiu la libro estis verkata, distribuata, reviziata kaj konscie grandkvante disvendata. Ni ĉiam devas memori tiujn vortojn **"ĉia penso estas senescepte stampita per la brulmarko de klaso".** Laŭ mia opinio, la penso entenata en la libro *Memkulturo* povas esti nur nomata kontraŭrevolucia.

En tiu tempo, duono de la teritorio de Ĉinio estis jam okupita de la japanaj imperiismaj agresantoj, kaj la Komunista Partio de Ĉinio fariĝis jam la gvida forto por rezisti kontraŭ la agreso de la japana imperiismo. Malpli ol unu monaton antaŭ la publikigo de tiu ĉi libro, Prezidanto Maŭ jam faris al la tuta lando alvokon "oponi kontraŭ kapitulaca aktivado". La aŭtoro verkis la libron

en la tempo, kiam la sanga milito daŭris jam du jarojn, ĝuste kiam la kapitulacistoj disvastigis klaĉojn kaj kalumniojn, atakojn kaj insultojn kontraŭ la Komunista Partio, la Oka-voja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo, kiam Ĉiang Kajŝek konspiris kun la imperiistoj por fari kompromison kaj kapitulacon perfide al la patrio, kaj kiam ili intencis lasi Japanion okupi vastan areon de Ĉinio kaj turni sian ĉefan atakdirekton al subpremado de la Komunista Partio. Precize en tia situacio, bonvolu pripensi, la ĉina plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon ja ne parolis en sia lekcio pri la Kontraŭjapana Rezistmilito, klasbatalo dum la periodo de tiu milito, amasa batalo, kapto de regpotenco, precipe tute ne pri la proleta diktaturo. Bonvolu pripensi, kia homo estas tiu homo.

Kompreneble, la aŭtoro de la libro *Memkulturo* preterlasis neniun ŝancon por vendi sian nigran varon. Ĝis 1962, li ankoraŭ konscie malhelpis grandakvantan eldonon de la verkoj de Maŭ Zedong, por ke lia propra libro povu disvendiĝi tra la tuta mondo.

Ĝuste kiam la Komunista Partio de Ĉinio kaj aliaj marksism-leninismaj partioj estis malice atakataj kaj insultataj de la reviziisma kliko kun Ĥruŝĉov ĉe la kapo, la libro *Memkulturo* estis haste reeldonita.

Ĝuste kiam la reviziistoj elprenis la kadavron de Stalin el lia tombo kaj intencis neigi la grandan meriton de Stalin kaj detrui lian altan reputacion, la aŭtoro de *Memkulturo* forstrekis preskaŭ ĉiujn vortojn pri Stalin en sia libro. Kio tio estis, se ne humila surgenuiĝo kaj kontentigo al la bezono de la reviziisma kliko de Sovetunio senbride oponi kontraŭ Stalin, t. e. senbride oponi kontraŭ leninismo?

Ekde la fondiĝo de la Komunista Partio de Granda Britio en 1920, mi ĉiam estas ĝia membro. En la komenco de la kvindekaj jaroj, mi unuafoje kontaktis kun tiu plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon de Ĉinio. Tiutempe la gvidantoj de KPGB laŭdegis tiun libron kiel nepre legendan por la membroj. Ĉar *Memkulturo*, same kiel la deklaracio de KPGB *La Vojo de Britio Kondukanta al Socialismo*, singardeme evitas paroli pri la proleta diktaturo kaj tute respondas al la reviziisma politiko publikigita en la 22-a tutlanda kongreso de KPGB. En tiu kongreso la sekretario de KPGB publike deklaris forlason de proleta revolucio kaj ekpraktikon de reformisma kompromiso.

La libro *Memkulturo* helpis en strangolado de la batalvolo de revoluciaj kamaradoj kaj en kutimigo de sklava obeemo al gvidantoj en tiu tempo.

Mia koro estas tre peza. En tiu tempo mi laboris en la *Laborista Ĵurnalo*, kiu estis fondita laŭ konsilo de Lenin. Ĝi ne havis grandan kapitalon kaj estis funkciigata dank' al la helpo de ekspluatataj laboristaj amasoj ne sufiĉe enspezantaj. Tiuj amasoj rigardis la *Laboristan Ĵurnalon* kiel sian politikan batalilon en la lukto por renversi kapitalismon. Mi estis tre afliktita, kiam mi vidis, ke la *Laborista Ĵurnalo* ne plu povas ludi sian batalan rolon agiti la amason, propagandi al la amaso kaj organizi la amason.

Sed mi ne rezistis kontraŭ tia fenomeno. Mi fidele plenumis la taskojn asignitajn al mi de miaj superuloj kaj mi eĉ estis tre fiera pri tio ke mi estas komunisto. Mi tre timis la organizan punon, kiun la partio povus alpreni sur min, tiel ke mi ricevus la malhonoron esti eksigita el la partio.

Iatempe mi ne povis deteni min de faro de iuj protestoj, sed nenia rezulto estiĝis. Mi konsolis min per tio ke la partio finfine fariĝos pura.

Kompreneble, kiam mi studis *Memkulturon*, mi ankoraŭ ne havis ŝancon ellerni la penson de Prezidanto Maŭ kaj ne mastris efektive liajn principojn de marksism-leninismo: **"Ĉio reakcia ja ne falos, se vi ĝin ne faligas. Tio estas same kiel ĉe balaado: kien ne alvenas la balailo tie la polvo kutime ne foriras per si mem."** Sekve, kvankam mi komprenis en mi ke tiaj aferoj estas eraraj, mi tamen ankoraŭ plu akceptis ilin senreziste.

Sub la reviziisma gvido de KPGB, la *Laborista Ĵurnalo* fariĝis kopiaĵo de kapitalisma ĵurnalo. Por energie pligrandigi la vendkvanton de la ĵurnalo, oni ne hezitis surpresi erotikajn fotojn, ĉevalkonkursajn novaĵojn, modajn fasonojn, receptojn por konservi junecon kaj belon, kaj raportojn pri kriminalaj kazoj.

Mi laboris 20 jarojn en ĵurnalismo, kaj por denove serĉi veron, mi finfine forlasis la ĵurnalisman profesion kaj revenis al minejo por tie vivi kaj labori kune kun miaj klasaj fratoj.

Mi devenis de laborista klaso de Britio, kreskis inter ministoj kaj ŝpinteksistoj kaj, same kiel ili, suferis ĉiutage de mizero kaj humileco. Tiamaniere, mi pli frue ekkomprenis ke la sola elirvojo de la laborista klaso estas renversi kapitalismon per proleta revolucio.

Mi vidis la viglan ribelan spiriton de la proletaro aŭdaci provoki kapitalismajn potenctenantojn kaj publike rezisti kontraŭ reakciaj fortoj,

en longdaŭraj strikaj bataloj, en la tempoj kiam mi servis kiel strika inspekta grupano kaj partoprenis en marŝo kontraŭ malsato kaj en batalo kontraŭ la pelado el loĝejo fare de domposedantoj. La amasa batalo estas la fonto de mia vivo. Ĝuste la amasa batalo instigis min aliĝi al la Komunista Partio de Granda Britio fondita nelonge post la Oktobra Revolucio.


Sed, post preskaŭ 20 jaroj, kiam mi revenis al mia siatempa parti-filio, mi trovis ke ankaŭ tiuj kamaradoj, kiuj iam brave batalis en la jaroj de intensaj klasbataloj, kutimiĝis al blinda obeado. Tiu blinda obeado kreskis en la koroj de miaj malnovaj batalamikoj kvazaŭ kancero. Jam forestas iliaj antaŭaj, proletaj iniciatemo kaj aŭdaca spirito de ĝustatempa alpreno de revoluciaj agadoj. Ili nun preskaŭ tute izoliĝis de la amasoj. Ili faras nenion kaj dependigas sin sole de la instrukcioj donitaj de superaj instancoj. Kiam tiuj "nepre plenumendaj" instrukcioj alvenas, la malmultaj fidelaj sekvantoj ĉiam klopodas ĉiurimede plenumi ilin, senkonsidere pri tio, ĉu ili konvenas al la loka situacio aŭ ne.

Tiel la partia filio degeneris, la nombro de partianoj pli kaj pli reduktiĝis. La enpartia vivo fariĝis bagatela sen ia ajn revolucia enhavo. La partia gvidantaro sekvas la reformisman Laboristan Partion, kaj mankas al ili amasa bazo. Ĝi senskrupule elspezas la monon, kiun la laboristoj perlaboris malfacile, por parlamenta balotado kaj en propagando por atingi socialismon tra la vojo de parlamento. Samtempe, la gvidantaro de KPGB estas obeema al politiko de moskvaj reviziistoj pli ol iam antaŭe. Kiam la moskva reganta kliko de moderna reviziismo svingas sian direktbastonon, ĝi tuj turniĝas laŭ ĝi. Nur ordonu Ĥruŝĉov kaj similaj, ĝi tuj lakee obeas kaj ĉiam agas laŭ la ordono, sen ia malemo.

Mi venis al Ĉinio en 1962. Tiam la sovetia reviziisma gvidanta kliko, perfidinta marksismleninismon principon, estis forvendanta la socialismon Ĉinion kiel oferon. Sed la ĉina popolo firme rifuzis iri la vojon difinitan de la moskva reviziisma kliko. Mi vidis ke centmiliona ĉina popolo firme staras sur siaj propraj piedoj kaj decideme antaŭen marŝas sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, por konstrui prosperan kaj potencan socialismon, sin apogante sur la propraj fortoj, kaj konduki ĝisfine la proletan revolucion de Ĉinio kaj de la tuta mondo.

Mi estas feliĉa ke mi havas ŝanĉon partopreni tiun grandan proletan kulturan revolucion por ĝisfunde forbalai ĉiujn demonojn kaj diablojn kaj malkovri ĉiujn kontraŭrevoluciajn reviziistojn oponantajn kontraŭ la ruĝa flago svingante ruĝan flagon. Sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong, mi komprenas ke ĉiu marksist-leninisto devas tutanime partopreni en la batalo kontraŭ reviziismo kaj elstarigi la proletan politikon. Ni devas konduki senkompromisan batalon kontraŭ tiuj, kiuj obstine iras la kapitalisman vojon, forte kritiki *Memkulturon*, ĝis ĝi falos kaj fariĝos naŭza, kaj elimini ĝian fian internacian influon!

Dum laborado sur kamparo, la komandantoj kaj batalantoj de iuj trupoj de PLA okazigas kunvenon kune kun malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj por severe kritiki la venenegan herbon Memkulturo *de la Ĥruŝĉov de Ĉinio kaj ĝisfunde elimini ĝiajn venenajn influojn.*



La Granda Revolucio de Ĉinio kaj la Granda Tragedio de Sovetunio

Observanto de *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*)

LA granda proleta kultura revolucio de nia lando de sia komenco dolore pikis la centran nervon de la reviziisma renegata kliko de Sovetunio kaj skuis ĝian splitiĝan kaj ŝanceliĝantan "tronon".

Tra la tuta pasinta jaro, la sovetunia reviziisma kliko kun Breĵnev kaj Kosigin ĉe la kapo, preskaŭ en neniu tago ne faris malicajn kalumniojn, atakojn kaj blasfemojn kontraŭ la granda proleta kultura revolucio de nia lando. Ili verŝis sinsekvojn da deliraĵoj, dirante ke la granda kultura revolucio de Ĉinio estas "granda tragedio".

Ĉu stranga estas tia fenomeno? Ne, neniom stranga. De antikveco ĝis nun, ĉiu vere granda revolucio estas ĝojplena festotago en la okuloj de revoluciaj popoloj sed granda tragedio en la okuloj de reakciaj fortoj.

Kiam naskiĝis la granda Pariza Komunumo en 1871, Marks nomis tion "plej grandioza festotago" de la proletaro. Sed la monarĥoj kaj burĝaj regantoj de Eŭropo alarme kriis, ke tio estas "terura katastrofo".

Kiam en 1917, ektondris la kanonaj salvoj de la krozŝipo "Aŭroro" kaj sonis la triumfa kanto de la Granda Oktobra Revolucio en Rusio, kiel stimuliĝis kaj inspiriĝis la proletoj kaj revoluciaj popoloj de la mondo! Sed imperiismo kaj la renegatoj de la Dua Internacio grincis per la dentoj, delirante ke tio estas la "finala sceno" de la rusa revolucio, "arbitro" kaj "aventura ago" de bolŝevikoj.

En kia ekstazo estis la popoloj de la tuta Ĉinio kaj de la tuta mondo, kiam la granda ĉina revolucio triumfis en 1949! Sed la usona imperiismo kriis en paniko, ke "la situacio en Ĉinio" estas "malfeliĉa", "tragedia", kaj ke tio estas la "plej angora periodo"!

La granda proleta kultura revolucio nun disvolviĝanta en nia lando estas revolucia

movado pli profunda, pli granda en skalo ol la Pariza Komunumo, la Oktobra Revolucio kaj ĉiuj pasintaj ĉinaj revolucioj. Ĉu tio ne estas tute leĝkonforma fenomeno, ke tia granda revolucio incitis muĝegon kaj blasfemon de la reviziisma renegata kliko de Sovetunio kaj ĉiuj reakciaj fortoj en la mondo?

Post la Oktobra Revolucio en Rusio Lenin iam montris: Kiuj ja finfine blasfemis kontraŭ la Sovetoj, unuafoje fonditaj de la laboranta klaso de Rusio? — "Ĉiuj kanajloj de la burĝaro, ĉia bando de sangosuĉantoj, kun ilia prikantanto Kaŭckij".

La hodiaŭaj Breĵnev, Kosigin kaj iliaj similaj estas ĝuste la fidisĉiploj de la renegato Kaŭckij kiun indigne riproĉis Lenin. Ili freneze blasfemas ke la granda kultura revolucio de Ĉinio estas "granda tragedio", tio ĝuste estas plena malkaŝiĝo de ilia kontraŭrevolucia fizionomio.

Granda tragedio ja aperis en la nuntempa internacia komunisma movado. Ĝi okazis ne en Ĉinio, sed ĝuste en Sovetunio. Ĝiaj aŭtoroj estas neniu alia ol la kliko de la grandaj renegatoj kaj grandaj laborist-perfiduloj reprezentataj de Ĥruŝĉov kaj liaj heredantoj Breĵnev, Kosigin kaj similaj.

Hodiaŭ, en la hejmlando de leninismo, la standardo de la granda Lenin estas hakfaligita kaj tretita de Ĥruŝĉov-reviziisma kliko, kaj reviziismo okupas tie dominan pozicion.

Hodiaŭ, en Sovetunio, la unua socialisma lando en la mondo, persone fondita de Lenin, la diktaturo de la proletaro turniĝis en tiun de la burĝaro, kapitalismo restariĝis, la socialisma lando ŝanĝis sian koloron.

Hodiaŭ la sovetia popolo kreinta meritoplenajn heroaĵojn sub la instruo de Lenin kaj gvido de Stalin denove troviĝas en pozicio de subpremato kaj ekspluatato. Ili estas senigitaj je la fruktoj de la revolucio, kreskigitaj kaj akiritaj per akvumado per ilia senmezura sango en la longdaŭra batalo.

Hodiaŭ, en Sovetunio, kiu iam estis rigardata de la popoloj de la tuta mondo kiel la bazloko de la monda revolucio kaj al kiu korinklinis milionoj kaj milionoj da revoluciaj popolanoj, la reganta kliko jam fariĝis la kunkrimulo numero unua de la usona imperiismo kaj alia stabo de la mondaj reakciaj fortoj. Estingiĝis la brilo de la ruĝa stelo super Kremlo.

Kiom okulfrapa kaj animskua bildo! Kiom serioza granda regreso en historio!

En la historio de la internacia komunisma movado, preskaŭ neniu proleta regpotenco de socialisma lando estis faligita de la internacia burĝaro per armita atako de ekstere. Tamen fortikaĵo estas plej facile detruebla de interne. Nun, imperiismo, troviĝanta je la fino de sia vivo, farante militan minacon kontraŭ la socialismaj landoj de ekstere, ĉefe utiligas la Ĥruŝĉov-klikon por fari renverson de interne kaj efektivigis "pacan evoluon" en Sovetunio, ne perdinte unu soldaton aŭ peonon nek elspezinte unu pafilon aŭ kuglon. Ĉu tio ne estas grandega historia leciono?

La granda historia regreso okazinta en Sovetunio igis la internacian komunisman movadon alfronti ekstreme gravan novan problemon, nome: Kiel la proletaro povas, depreninte regpotencon, ĝin teni kaj preventi la restariĝon de kapitalismo? Kiel en akra kaj komplika klasbatalo ĝi povas konduki la socialisman revolucion ĝis la fino? Tio ĉi estas granda problemo, kiun aŭ ne renkontis ĉiuj antaŭirintaj marksist-leninistoj, aŭ ne havis tempon por solvi aŭ ne kapablis solvi.

Ĝuste la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko, nia genia gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj la persone gvidata de li senprecedenca granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, solvis tiun problemon teorie kaj respondis tiun problemon tra la mondskua revolucia praktiko de milionoj kaj milionoj da popolanoj.

La plej fundamenta leciono kial la tragedio okazis en Sovetunio estas tio, ke la proleta regpotenco estis uzurpita de la reviziisma kliko de Ĥruŝĉov. Post la forpaso de la granda marksist-leninisto Stalin, trovinte ke venis la ŝanco, Ĥruŝĉov, granda karieristo enŝteliĝinta en la partion kaj longe intrigon kovanta, kaj lia bando tuj lanĉis palacan ŝtatrenverson, uzurpis la partian, armean kaj ŝtatan potencojn de Sovetunio. Ekde tiam, la regpotenco en Sovetunio ŝanĝis sian karakteron, la diktaturo de la burĝaro anstataŭis

tiun de la proletaro, la burĝaro efektivigis kontraŭrevolucian restariĝon pere de siaj agentoj.

Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris: "Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj, ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro."

La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio ĝuste ĉerpis tiun ĉi seriozan historian lecionon de Sovetunio.

Tiu ĉi granda revolucio tre profunde edukas kaj hardas la ĉinan popolon kaj ankaŭ tre profunde edukas kaj influas la revoluciajn popolojn de la tuta mondo. En Ĉinio kaj la tuta mondo, pere de siaj propraj sperto kaj observado al la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, tra komparo kaj analizo milionoj kaj milionoj de revoluciaj amasoj pluapaŝe armas sin per la senlime brila penso de Maŭ Zedong. Apenaŭ posedite de la amaso, la revolucia teorio tuj elŝprucigos neelĉerpeblan grandan materian forton por remuldi la mondon.

Tra tiu ĉi granda revolucio, ĉiuj revoluciaj homoj pli kaj pli klare komprenas, ke dum la tuta historia epoko de la proleta diktaturo, en la socio ekzistas klasoj kaj klasbatalo, ekzistas la batalo inter la du vojoj — la socialisma kaj la kapitalisma. Kaj tial, en longa periodo ekzistas la danĝero de kapitalisma restariĝo.

Tra tiu ĉi granda revolucio, ĉiuj revoluciaj homoj pli kaj pli klare komprenas, ke en la klasbatalo sub la diktaturo de la proletaro, la plej baza el ĉio restas ankoraŭ regpotenco. La proletaro volas firmigi sian regpotencon, dum la burĝaro volas renversi la regpotencon de la proletaro. La proletaro volas firmigi proletan diktaturon dum la burĝaro volas renversi la diktaturon de la proletaro. Tio estas vivmorta batalo. Se ni perdas nian singardemon, la ŝtata potenco povas esti uzurpita de personoj kia Ĥruŝĉov kaj la akirita regpotenco de la proletaro povas esti perdita.

Tra tiu ĉi granda kultura revolucio, ĉiuj revoluciaj homoj pli kaj pli klare komprenas, ke la danĝero de kapitalisma restariĝo ĉefe venas de la reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la instituciojn de la proleta diktaturo, de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. La kontraŭdiro inter la proletaro kaj tiu plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas la ĉefa kontraŭdiro en socialisma socio. Tio estas koncentriĝa esprimo de batalo inter la du klasoj — la proletaro kaj la burĝaro kaj inter la du vojoj — la socialisma kaj la kapitalisma. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas la ĉefa objekto de la revolucio sub la proleta diktaturo.

Tra tiu ĉi granda kultura revolucio, ĉiuj revoluciaj homoj pli kaj pli klare komprenas, ke estas ege grava kaj necesa la klasbatalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro en la ideologia kampo. **Prezidanto Maŭ diras: "Por renversi regpotencon estas ĉiam necese, unue, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso kiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso." Kaj tial, "la klasbatalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭra, zigzaga kaj iam eĉ tre akra."** Se la proletaro ne ĝisfunde venkas la burĝaron en la ideologia kaj kultura revolucio, la burĝaro do atakos la proletaron, antaŭ ĉio, de la pozicioj de ideologio kaj kulturo, kaj la proleta regpotenco ankoraŭ povos esti forkaptita de la burĝaro kaj ĉio kion akiris la laboranta popolo pere de batalo ankoraŭ povos esti detruita en unu tago.

Tra tiu ĉi granda kultura revolucio, ĉiuj revoluciaj homoj pli kaj pli klare komprenas, ke la granda demokratio de la proletaro estas la plej bona formo por mobilizi la amasojn konduki revolucian batalon sub la kondiĉoj de proleta diktaturo. Disvolvante de malsupre ĝis supre amasan movadon de la granda proleta kultura revolucio, la proletaj revoluciuloj kaj vastaj revoluciaj amasoj eltiras ulojn similajn al Ĥruŝĉov, senmaskigas plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ĝisfunde kritikas kaj faligas ilin, deprenas potencon el iliaj manoj kaj tiel garantias ke la proleta regpotenco estu

firme tenata en la manoj de la proletaj revoluciuloj.

Prezidanto Maŭ instruas nin: La nuna kultura revolucio estas nur la unuafoja, kaj en la estonteco ĝi neeviteble okazos plurajn fojojn. La problemo "kiu venkos kiun" en la revolucio povos esti solvita en tre longa historia periodo. Kaj ĉiam eblas la restariĝo de kapitalismo, se aferoj ne estas ĝuste traktataj. Ĉiuj partianoj kaj la tutlanda popolo ne opiniu, ke ĉio jam estos en ordo post unu aŭ du, tri aŭ kvar grandaj kulturaj revolucioj. Nepre, nepre atentu kaj neniel perdu singardemon kaj viglecon.

Unuvorte, tra tiu ĉi granda revolucio, ĉiuj revoluciaj homoj pli kaj pli klare komprenas la disvolvajn leĝojn de la socialisma socio, la leĝojn de klasa batalo en socialisma socio kaj la leĝojn de revolucio sub la kondiĉoj de la proleta diktaturo. Ĉio ĉi estas la granda frukto de tio ke nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ profunde resumis la historian sperton de la internacia proleta revolucio kaj proleta diktaturo, precipe ĉerpis la historian lecionon de la kapitalisma restariĝo en Sovetunio, analizis la kontraŭdirojn de socialisma socio kaj kreive disvolvis marksism-leninismon.

Analizinte kontraŭdirojn de kapitalisma socio, Marks kaj Engels eltrovis la leĝon de neevitebla pereo de kapitalismo kaj fondis la doktrinon de scienca socialismo.

Lenin kaj Stalin disvolvis marksismon, analizis la kontraŭdirojn de imperiismo, solvis serion da problemoj de proleta revolucio en la epoko de imperiismo, solvis teorie kaj praktike la problemon de efektivigo de la proleta diktaturo en unu lando.

Kaj Prezidanto Maŭ disvolvis marksism-leninismon, solvis serion da problemoj de la proleta revolucio en la nuna epoko, solvis teorie kaj praktike la problemon de konduko de revolucio kaj prevento de kapitalisma restariĝo sub la proleta diktaturo. Tio ĉi estas grandega impeto de la revolucia doktrino de marksism-leninismo. Ĝi signas, ke marksism-leninismo jam disvolviĝis en tute novan stadion, t. e. la stadio de la penso de Maŭ Zedong.

Tiamaniere, la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio lanĉita sur la bazo de la scienca teorio eltrovita de Prezidanto Maŭ, ne nur preventis en Ĉinio ripeton de la sovetia tragedio, frakasis la revon de imperiismo kaj reviziismo restarigi kapitalismon en Ĉinio, sed ankaŭ malfermis novan eraon de la internacia komunisma movado, malfermis novan epokon de la socialisma monda revolucio de proletaro.

La ĉina granda kultura revolucio estas grandioza ĝojiga evento, granda espero kaj grandega inspiro al proletoj kaj revoluciaj popoloj tra la tuta mondo, kaj estas plej emociiga triumfa kanto de la internacia proletaro sonoranta tra la universo. Sed ĝi vere estas granda doloro, granda katastrofo kaj granda malĝojo por imperiismo kaj la reviziisma perfidula kliko de Sovetunio. Ĉar eksonis la funebra sonorilo por ili, ilia lasta tago proksimiĝas kaj ilia "trono" estas baldaŭ falonta!

En la historio de la homaro, substituo de unu socia sistemo per alia ĉiam devas trairi zigzagojn kaj repuŝojn. Se tiel statas la burĝa revolucio, kiu substituis unu ekspluatan sistemon per alia ekspluata sistemo, do estas neimageble ke la proleta revolucio, kiu celas ekstermi ĉiujn ekspluatajn sistemojn, ne trairos zigzagojn kaj repuŝojn. Laŭ la vidpunkto de la historia materiismo, la granda historia regreso fabrikita en Sovetunio de bando da grandaj perfiduloj — la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio, estas nur epizodo en la historio. Tio estas granda malbona afero. Sed, resuminte ambaŭ pozitivan kaj negativan historiajn spertojn, Prezidanto Maŭ trovis vojon por preventi la restariĝon de kapitalismo, kaj tiamaniere, tiu ĉi malbonega afero turniĝis en bonegan aferon.

Ni troviĝas ĝuste en nova epoko kun la penso de Maŭ Zedong kiel la granda standardo. Posedante la grandan ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong, la marksist-leninistoj kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo certe komplete disrompos la tutan malnovan mondon kaj forpelos de sur la historia areno ĉi tiujn diablojn kaj monstrojn — imperiismon, modernan reviziismon kaj diverslandajn reakciulojn.

(La 4-a de junio, 1967)




Celebrado de la fondiĝo de la Revolucia Komitato de Ŝanhi-provinco. La revoluciaj amasoj de la Tajjuan-a Ŝpinteksa Fabriko marŝas sur strato kun ruĝaj flagoj kaj grandformata portreto de nia gvidanto.

Nova Fizionomio de la

Tajjuan-a Ŝpinteksa Fabriko

Sekvante la orientilon de revolucia "triflanka kombiniĝo" de Prezidanto Maŭ kaj subtenate de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la proletaj revoluciuloj de la Tajjuan-a Ŝpinteksa Fabriko de Ŝanhi-provinco fondis revolucian reprezentivan provizoran povo-organon kun proleta aŭtoritato, deprenis la potencon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj solide unuigis la vastajn amasoin de revoluciaj laboristoj kaj kadroj.

Post la depreno de la potenco, la revoluciaj ribeluloj de la fabriko tuj levis altan tajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ. La revoluciaj gvidantaj kadroj profundiĝis en la unuan fronton de produkto, unuanime "tenas la revolucion kaj stimulas la produkton" kune kun la laboristoj. Ĉiuj en la diversaj laborprocedoj kunagas kaj lernas reciproke, helpas kaj stimulas unu alian. Alte tenante la grandan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj disvolvante la revolucian spiriton de kuraĝo en pensado kaj agado, la proletaj revoluciaj ribeluloj faris teknikajn renovigojn, ekspluatis latentajn fortojn en produkto kaj plenumis aŭ superplenumis la produktajn taskojn bone kaj rapide. Grandmezure leviĝis la produkto, ĉiam pli kreskis la potaga produktkvanto de kotonŝpinaĵo kaj kotonteksaĵo, kaj la prestinkturado de kotonteksaĵo atingis jam la plej altan nivelon post la fondiĝo de la fabriko.



Respondante al la granda alvoko "teni la revolucion kaj stimuli la produkton", la laboristinoj aktive faris teknikan plibonigon kaj levis la laborefikon.



Jubilado pro la nova venko en produkto



Reprezentanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en la fabriko laboras kune kun la laboristinoj.



Hje Jue (*meze*), membrino de la Revolucia Komitato de la fabriko kaj aktiva lernanto de la verkoj de Prezidanto Maŭ, interŝanĝas ŝpinan sperton kun aliaj laboristinoj.

Reprezentantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en la fabriko kaj gelaboristoj kune lernas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.



La Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

Nia Raportisto

ĜUSTE kiam nia en cent-milionoj nombranta popolo eksvingis sian potencan batalilon de la penso de Maŭ Zedong kaj lanĉis ĝeneralan atakon kontraŭ la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj kiam la granda revolucia armeo sur diversaj frontoj akiradis sinsekvajn grandajn venkojn responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, la Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio 1967 estis solene okazigita de la 15-a de aprilo ĝis la 15-a de majo en Kantono. Tiu ĉi printempa foiro estas tre grandskala kaj havis tute novan fizionomion. La ekspoziciitaj varoj estis tre riĉaj je specoj kaj ilia kvalito ĝenerale plialtiĝis. La plejparto de la pli ol 4,000 ekspoziciitaj novaj produktaĵoj estis fabrikitaj dum la granda proleta kultura revolucio. Tio plene manifestis la riĉan frukton de la granda proleta kultura revolucio de nia lando kaj la grandan venkon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Angulo de la ekspozejo por grenoj, oleoj kaj nutrajoj en la Foiro



FLUGA ANTAŬENSALTADO

"La ĉina popolo estas strebema kaj kapabla kaj volas nepre atingi kaj superi en ne malproksima estonteco la progresintan nivelon de la mondo." "Ĉinio fariĝos potenca socialisma industria lando." Jen estas solena alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la tutlanda popolo. La laborista klaso kaj revoluciaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj ja agas laŭ tiu instruo de Prezidanto Maŭ. Ĉiuj brilaj sukcesoj en fer-ŝtala, maŝinkonstrua, instrumenta, kemia, kurac-instrumenta industrioj kaj tiuj en scienco kaj tekniko flagras per la brilo de la penso de Maŭ Zedong. En la industria halo estis produktaĵoj, el kiuj multaj estis antaŭe opiniataj kiel neprodukteblaj por ni, aliaj estas konsideritaj kiel "atuto" de la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj kaj estas malpermesitaj por vendi al ni, kaj ankoraŭ iuj, kiujn aliaj landoj ankoraŭ ne povas fabriki...

La fer-ŝtala industrio de nia lando havis gigantan disvolviĝon. La ekspoziciitaĵoj en la centro de la halo de metalaĵoj kaj minaĵoj koncentre spegulis la nivelon de la disvolviĝo de nia fer-ŝtala industrio.

Tie estis ekspoziciataj du radoj de trajno kaj unu radringo, kiu estas pli alta ol homo. Ili tiris al si apartan atenton de la vizitantoj. Ili estas gravaj partoj de lokomotivo. Por garantii sekurecon de trajno dum altrapida kurado, ilia kvalito devas esti aparte alta. La fabrikado de tiaj radoj kaj radringoj postulas bonan ekipaĵon kaj altan teknikan nivelon. Antaŭ kelkaj jaroj, la modernaj reviziistoj rompis la kontrakton pri liverado de tiaj radoj kaj radringoj al nia lando kaj blokadis nin pri koncerna teknika materialo, malice intencante paralizi la fervojan trafikon de nia lando. Sed la ĉina popolo ne estis timigita de la malfaciloj. Ĝi firme memoras la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Sub la gvido de la Komunista Partio, se nur troviĝas homoj, ĉia ajn miraklo povas esti kreita."** Dank' al sia klopodado en la alta rapideco de "unu tago egalanta al dudek jaroj", ĝi sukcesis konstrui modernan fabrikon por produkti tiajn radojn kaj radringojn. Nun tiajn radojn kaj radringojn nia lando jam povas mem provizi al si, kaj plene bankrotis la blokado fare de la moderna reviziismo kontraŭ nia lando!

En la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio, la laboristoj de fer-ŝtala industrio puŝis la produktadon de ŝtalo kaj fero al pli alta nivelo. La novaj specoj de ŝtalaĵoj, kiujn nia lando sukcesis fari en la pasinta jaro, nombras pli ol 700. Apud la radringo de trajno, estis montrataj ankaŭ nerustaj ŝtalaĵoj de multaj diversaj normoj, ŝtalaj tuboj de neregulaj formoj kaj produktaĵoj el alojo de aluminio kaj ŝtalo, kiujn embargis al nia lando imperiismo. La t. n. novaj teknikoj de la sesdekaj jaroj, kiaj L. D. procedo de ŝtalfandado kaj vakua fandado, jam estas posedataj de multaj laboristoj de la fer-ŝtala industrio de nia lando.

Enirinte en la mekanika halo, oni povis vidi multajn novajn produktaĵojn fabrikitajn ekde la granda proleta kultura revolucio de nia lando. Ekzemple, sesspindela aŭtomata tornilo, kies efiko atingas pli ol dudekoblon de la ordinara; universala dukolona koordinata alezmaŝino, kies precizeco de koordinata punktdifinado atingas ĝis dekduono de diametro de kapharo k. a. La altpreciza duonaŭtomata universala cilindra frotmaŝino montrata en la halo, estis kune projektita kaj farita de maljunaj laboristoj, junaj teknikistoj kaj revoluciaj gvidantaj kadroj de la Ŝanhaja Tria Il-maŝina Fabriko en unu jaro sub la kondiĉoj de manko de termostato kaj instalaĵoj kontraŭ tremo kaj polvo. Ĝis nun en la mondo nur malmultaj landoj povas fabriki tian frotmaŝinon. La surfaco prilaborita de tia maŝino estas glata kiel spegulo, kaj glateco povas atingi la 14-an gradon — la plej altan normon de la mondo. Nelonge post la komenciĝo de la granda kultura revolucio, la fabriko jam komencis produkti tiajn frotmaŝinojn.

Multaj maŝinoj tie montritaj havas la avantaĝojn de malgranda korpo, vasta uzebleco, ekonomio kaj longa uztempo. Estis ekspoziciataj ankaŭ multaj maŝinoj, bezonataj de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj por disvolvi sian nacian ekonomion, ekzemple, maŝinoj por grena prilaborado, kaŭĉukaĵoj kaj plastaĵoj ktp.

SPEGULO DE LA RIĈA RIKOLTO DE AGRIKULTURO

Se multaj ekspoziciitaĵoj novaj kaj kun monda progresinta nivelo vekis grandan intereson de gastoj en aliaj haloj, tiam en la agrikultura halo, oni ĉiam povis aŭdi laŭdojn diritajn en malsamaj lingvoj, ke alte tenante la grandan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj venkinte diversajn malfacilojn kaj naturajn katastrofojn, la vastaj amasoj de kamparaj komunumanoj de nia lando akiris ĉiuflankan, riĉan rikolton.



La patriotaj ĉinaj elmigrintoj, niaj samlandanoj en Hongkong aŭ Aŭmen kaj eksterlandaj amikoj svarme aĉetas insignojn kun la portreto de Prezidanto Maŭ.

En la pasinta jaro, la granda proleta kultura revolucio envolvis la tutan landon, kaj la en centmilionoj nombranta popolo de nia lando levis altan tajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Ili prenis Daĝaj — la flagon sur la agrokultura fronto — kiel ekzemplon, starigis por si la altan celon de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn kaj agrokulturis teron por la revolucio. En la ebenejo de norda Ĉinio, kie riĉe produktiĝas tritiko kaj sorgo, la vastaj amasoj de komunumanoj levis altan tajdon de grandskala baza konstruado de akvomastrumado kaj reformado de kampoj. En la sudo, komunumanoj konstruas grandskale kontraŭinundajn, kontraŭventajn kaj akvokonservajn kaj akvokondukajn konstruaĵojn kaj entuziasme entreprenas ĝardenan konstruadon. Samtempe, en ĉiuj lokoj, la kamparanoj entreprenis reformadon de produktaj teknikoj kaj kultura sistemo laŭ la lokaj kondiĉoj, tiel ke la fizionomio de la kamparo de nia lando grave ŝanĝiĝis, la produkta kvanto de greno kaj kotono en la pasinta jaro atingis la plej altan nivelon post la Liberiĝo, kaj grandmezure kreskis ankaŭ la produktado de diversaj ekonomiaj plantaĵoj, forstoj kaj bestobredado.

La disvolviĝo de agrikulturo de nia lando liveris al tiu ĉi foiro riĉajn fontojn por eksporto de produktaĵoj de agrikulturo kaj flankaj okupoj. Laborantoj de la foiro diris, ke la nombro de specoj de produktaĵoj de agrikulturo kaj flankaj okupoj kreskis jam de kelkcento en la unua foiro ĝis kelkmilo en la nuna. La pli ol dudek specoj de rizo, kiuj povas esti eksportataj, inkluzivas multajn tre valorajn, ekzemple, la specojn "Silko", "Ĝimej", "Oleo", "Vitra Diamanto", "Kristalo" ktp. Diversaj ladpakitaj manĝaĵoj, fruktaĵoj, bombonoj, ovaĵoj kaj fiŝoj montrataj en vitrinoj kaj sur bretoj estas varispecaj kaj nekalkuleblaj. Troviĝis ankaŭ nemalmultaj novaj specoj de sojo, famaj vinoj kaj teoj, kiuj ĝuas altan reputacion en la monda merkato. Rigardinte tiujn ĉi riĉajn ekspoziciataĵojn, iuj fremdlandaj amikoj laŭdis: "Ĉinaj kamparanoj estas bravaj! El tiuj riĉaj ekspoziciataĵoj, ni povas konkludi, ke via lando akiris grandajn sukcesojn en la agrikulturo."

Ĝis nun en mil nombrantaj negocistoj en la mondo jam komercas pri grenoj, oleoj kaj manĝaĵoj eksportitaj de nia lando. La nombro de novaj negocistoj, kiuj komercas pri tiuj varoj kun nia lando, kaj la kvanto de iliaj mendoj en tiu ĉi foiro ambaŭ kreskis kompare kun tiuj de la pasinta jaro.

NOVAJ PRODUKTAĴOJ DE METIARTOJ

Kun sia aparta nacia stilo kaj altgrada arta tekniko, la metiartaĵoj de Ĉinio jam delonge ĝuas altan reputacion tra la mondo. Tamen, plimulto de metiartaĵoj en la pasinteco estas kun antikvaj temoj kaj eĉ estas heredo aŭ imito de la kortega "arto". Ĝuste kiel la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris en sia letero al Jan-ana Pekin-opera

Teatro post rigardo al la teatraĵo *Premite al Liangŝan por Ribeli:* **"La historio estas kreita de la popolo, sed sur la scenejo de malnova opero (kaj en ĉiuj la popolon forlasintaj malnovaj literaturoj kaj artoj) la popolo ja fariĝis feĉo, kaj la scenejon regas sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj. Tian inversigon de historio vi nun reinversigis, redonante al la historio ties propran fizionomion, kaj de nun la malnova opero akiris novan aspekton; tio ĉi meritas gratulon."** La granda proleta kultura revolucio, kvazaŭ tondro en printempo, alportis novan vivon al metiarto, arto tradicia.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en la koroj de la popoloj de la mondo. Kun senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revoluciaj metiartistoj per sia alta tekniko kreis la kolekton de jadaj skulptaĵoj *Ruĝas la Oriento* montratan en la metiarta halo; per la varma sceno de dekoj da delikate skulptitaj diversnaciecaj popolanoj en naciaj kostumoj kiuj kantas kaj dancas en unuiĝo ĉirkaŭ Prezidanto Maŭ, ĝi esprimas la profundan senton de senlima amo, senlima fideleco, senlima kredo kaj senlima adoro al la granda gvidanto de nia diversnacieca popolo. Krome, la porcelana modlaĵo *Kanto pri Revolucio* kaj la lanfadena brodaĵo *Prezidanto Maŭ sur la Pordego Tian-anmen*, kiuj spegulas la antaŭenmarŝon de nia diversnacieca popolo sur la granda vojo de socialismo, sekvanta Prezidanton Maŭ, kaj aliaj estas ĉiuj sukcesaj verkoj, multe laŭdataj de la rigardantoj.

En la metiarta halo, oni povis vidi ankaŭ grandan nombron da heroaj figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, nutritaj per la penso de Maŭ Zedong, ekzemple, la labormodelo Ĉen Jongguj, la komunismaj batalantoj Lej Feng, Vang Gie, Oŭjang Haj kaj Caj Jonghiang, la modela sekretario de la gubernia komitato de la kompartio Giaŭ Julu kaj ruĝaj gvardianoj, pioniroj en la granda kultura revolucio, ktp. La figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj entute brilegis en la metiarta halo.

La fajenca skulptaĵo *La Ruĝa Signal-lanterno* kaj la kolora modlaĵo *Ŝagiabang* kreitaj de la revoluciaj metiartaj laborantoj laŭ la samnomaj pekinaj operoj kaj argila skulptaĵo *Farmpaga Kolektejo*, miniatura reprodukto de la originala skulptaĵo, atestis alian sukceson de la penso de Maŭ Zedong en revoluciigo de metiarto. Prezidanto Maŭ diris: **"La kreskado de ĉiu ajn novnaskitaĵo trapasas malfacilojn kaj zigzagojn."** Same kiel la kreado de multaj aliaj metiartaĵoj kun revoluciaj temoj, la naskiĝo de la argila skulptaĵo *La Ruĝa Signal-lanterno* tion plene pruvis. La Ŝivan-a

Parto de la ekspozejo por industriaĵoj en la Foiro



Fajenca kaj Porcelana Fabriko de Guangdong-provinco, kiu kreis tiun ĉi verkon spegulantan la revolucian batalon de nia popolo, jam ĉe la komenco renkontis malhelpon de iuj burĝaj akademiaj "aŭtoritatuloj", kiuj diris ke "verkoj en aro difektos la karakterizajn trajtojn de la ŝivan-aj fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj", "fajenca kaj porcelana skulptaĵo ne taŭgas por prezenti teatran scenon" ktp. Sed la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj bone memoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Nia postulo estas unueco de politiko kaj arto, unueco de enhavo kaj formo, unueco de revolucia politika enhavo kaj laŭeble plej perfekta arta formo."** Kun la vorto "kuraĝo" en la kapo dum sia arta praktikado, apogante sin sur la amasoj kaj sub la helpado de koncernaj institucioj, ili venkis multajn malfacilojn kaj sukcese elfaris tiun grandan aron da fajencaj skulptaĵoj kian la fabriko ankoraŭ neniam antaŭe faris, en tempodaŭro duone tiom longa kiom ordinare bezonata. Kaj kiam ĝi estis elmontrita, iu samlandano el Hongkong tuj mendis ĝin.

Bolegas en tumulto la kvar maroj,
Koleras svarme l'akvoj kaj nubaroj.
Sub intensegaj fulmtondrad' kaj ventoj,
Skuiĝas forte la kvin kontinentoj.

La granda batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj la diverslandaj reakciuloj fare de nia popolo kaj la revoluciaj popoloj de la mondo vive speguliĝis ankaŭ en multaj ekspozaĵoj. La argilaj skulptaĵoj, *Antaŭ la Tombo de Lenin* kaj *La Unua Opini-afiŝo ĉe la Strato de Tokio*, la jada skulptaĵo *La Batalanto sur Diplomatia Fronto Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ Defendas la Nacian Standardon* k. a. spegulis ardajn revoluciajn batalojn de diversaj flankoj.

La ĉifoje ekspozataj lakoskulptaĵoj, lignoskulptaĵoj, klozoneaĵoj, lakobjektoj, pajlplektaĵoj, mebloj, puntaj tablotukoj, k. a. ĉiutage uzataj metiartaĵoj ankaŭ rikoltis bonan akcepton ĉe la vizitantoj pro siaj nova projektado, delikateco kaj beleco, bonega kvalito kaj praktika uzebleco.

TRIUMFO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

Dum la Foiro, la fremdlandaj geamikoj el dekoj da landoj kaj regionoj de la mondo, ĉinaj elmigrintoj kaj samlandanoj el Hongkong kaj Aŭmen persone sentis la grandan efikon de la granda proleta kultura revolucio en Ĉinio kaj la senkomparan potencon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, pere de siaj vastaj kontaktoj kaj interparoloj kun la membroj de nia foira delegacio kaj ruĝaj gvardianoj, kaj pere de siaj vizitoj al fabrikoj, komunumoj, lernejoj kaj haveno. Ĉio, kion ili persone vidis, havis nenion komunan kun la mensogoj, kiujn ili legis el la gazetaro de la Okcidento. Direktoro de la Ŝtata Importa kaj Eksporta Kompanio de Kamboĝo refutis sur la bazo de la faktoj kiujn li persone aŭdis kaj vidis, ke la ĵurnaloj de la Okcidento ĉiam mensogas kaj kalumnias, raportante mensogojn kiel "veron". Ili informis ke en la granda kultura revolucio, oni ĉiuj manifestas sur la strato kaj neniu zorgas pri produktado. Sed, ĉi tie mi vidas propraokule la konstruajn laborojn, kiujn la ĉinoj faras kaj la novan fizionomion, kiun ili nun havas.

Prezidanto Maŭ diris: **"La ĉina popolo volas amikiĝi kaj kunlabori kun la popoloj de ĉiuj landoj en la mondo, kaj restarigi kaj disvolvi la komercon inter nacioj por akceli la disvolviĝon de produktado kaj la prosperiĝon de ekonomio."** Kun ĉi tiu brila penso kiel orientilo, nia politiko de eksterlanda komerco estas ĉiam pli vaste bonvenigata de la amikoj de komercaj rondoj de la mondo. La japana amiko Jukisada Muto, kiu partoprenis la Foiron, diris: "La ĉina merkato estas stabila, la ĉina registaro montras sin tre fidinda, negocoj povas esti rapide faritaj, kaj la liverado estas akurata, dume la merkato en aliaj landoj ne estas stabila kaj la prezoj ĉiam varias. Mi volonte preferas komerci kun Ĉinio, sed ne kun la aliaj landoj." Unu amiko el okcidenta Germanio, kiu de pluraj jaroj komercis kun ni, laŭdis: "Kiam mi revendis ĉinajn produktojn al miaj klientoj, ili neniam postulis de mi kompenson pro neatingo de la normo de kvalito, speciale via tetraciklino fariĝas ĉiam pli bona en kvalito kaj pakado, kaj mi ĉiam pli ŝatas Ĉinion!"

Navigon enmaran oni dankas al direktilisto, kaj ĉio vivanta ŝuldas sian kreskon al la suno. Kiam fremdlandaj amikoj parolas pri la grandaj sukcesoj, kiujn nia lando atingis en politiko, ekonomio k. a., ili ĉiuj asertis, ke ĉio ĉi tio estas ebla nur pro la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj estas venkoj de la penso de Maŭ Zedong. Hajjar Hadi Joseph, amiko el Libano, skribis la jenon en la foiran notlibron: "Mi neniam pensis, ke Ĉinio povas atingi tian grandan progreson. Kompreneble, tio rezultis el la penso de Maŭ Zedong. Maŭ Zedong estas la plej granda kaj unika gvidanto de la mondo, kaj tial la Ĉina Popola Respubliko sendube povas akiri siajn sukcesojn." La direktoro de la Elektra Kompanio de Gvineo Mohamed Lamine Toure diris en kunsido kun la membroj de nia foira delegacio: "En dek kelkaj mallongaj jaroj, via industrio jam disvolviĝis al tiel alta nivelo.... La popoloj de la tuta mondo nun direktas siajn okulojn al Ĉinio kaj al Maŭ Zedong. La vojo, kiun trairis la ĉina popolo, estas ankaŭ tiu kiun trairos ĉiuj subpremataj nacioj kaj popoloj."

Subteno al la Industrio per la Penso de Maŭ Zedong

LAŬ la granda instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri tio, ke la Popola Liberiga Armeo devas subteni la vastan amason de maldekstruloj, la propaganda grupo de iu trupo de PLA de la penso de Maŭ Zedong por subteni la Datong-an Karbominejon venis al tiu karbominejo. Kune kun la revoluciaj amasoj de la Datong-a Karbominejo ili kreive studis kaj kreive aplikis la verkojn de Prezidanto Maŭ, firme plenumis la proletan revolucian linion reprezentatan de Prezidanto Maŭ, apogante sin sur propraj fortoj, bone kondukis la grandan proletan kulturan revolucion kaj akcelis produkton en la mineja distrikto. La komandantoj kaj batalantoj de la propaganda grupo prenis la propagandon de la penso de Maŭ Zedong kiel la plej gravan kaj plej gloran taskon.

KOREKTE JUĜI KADROJN PER KLASA ANALIZO, EFEKTIVIGI LA REVOLUCIAN "TRIFLANKAN KOMBINIĜON"

La Datong-a Karbominejo, fame konata kiel karbomaro, estas unu el la gravaj bazoj de karba produktado en nia lando. Sed en la pasintaj multaj jaroj plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon dominis la karbominejan distrikton. Intencante devojigi ĝiajn entreprenojn al kapitalismo, ili ĉiurimede bojkotis la penson de Maŭ Zedong. Dum la granda proleta kultura revolucio, obstine praktikante la burĝan reakcian linion, ili subpremis la revoluciajn amasojn, batis la revoluciajn kadrojn, efektivigante "atakon al multo kaj protekton al plenmano". Ili ankaŭ senbride praktikis kontraŭrevolucian ekonomiismon, intrigis por subpremi la revolucion kaj subfosi produktadon.

Veninte en la minejon, la propaganda grupo tuj organizis la amasojn por lerni la teoriojn de Prezidanto Maŭ pri klasoj kaj klasbatalo, senrezerve mobilizis la amasojn, malkovris la vualon de klasbatalo kaj lanĉis ĝeneralan ofensivon al plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon per plena eldiro de opinioj, per opini-afiŝoj kaj grandaj debatoj. Dank' al la politik-ideologia laboro fare de la grupanoj kune kun la proletaj revoluciuloj al la konservativaj organizoj, vekiĝis la vualigitaj amasoj tiel ke rapide disiĝis tiuj organizoj. Ankaŭ la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj, entreprenantaj subfosan agadon, ricevis pezan rebaton. Tiam, alte tenante la standardon de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la proletaj revoluciuloj sturmis kun pli vigla batalspirito. Ju pli ili batalis, des pli ili fortiĝis, tiel ke ilia vico rapide kreskis kaj fortikiĝis. La trupo kaj la proletaj revoluciuloj starigis inter si profundan klasan amikecon en batalado.

La akra kaj intensa klasbatalo metis rigoran provon al la vico de kadroj. En la vico de kadroj de la Datong-a Karbominejo plimulto estas bona aŭ kompare bona. Tamen, nemalmultaj kadroj, trompitaj de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, en diversa grado plenumis la burĝan reakcian linion dum la granda proleta kultura revolucio kaj la amaso ilin kritikis. Tial, kun "plendo" kelkaj el ili atendis per pasiva sinteno, ne havante kuraĝon elpaŝi por revolucii. Rezulte de la influo de la burĝa reakcia linio malmultaj el la amaso ankaŭ havis malĝustan ideon en trakto al la kadroj. Celante la suprediritajn problemojn, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon ili unuflanke helpis la kadrojn solvi la problemon kiel korekte trakti la opiniojn de la amaso kaj korekte taksi sin mem kaj aliflanke helpis la amason solvi la problemon kiel korekte taksi la kadrojn.

Ili organizis la revolucian amason por studi la instrukcion de Prezidanto Maŭ koncerne al juĝado pri kadroj: **"Ni devas scii bone juĝi kadrojn. Juĝante**

kadron, ni devas konsideri ne nur lian agadon en mallonga periodo aŭ en unu afero, sed ankaŭ lian tutan vivon kaj lian tutan laboron. Tio estas la ĉefa metodo por juĝi kadrojn." Kaj kunlige kun la aktualaj kondiĉoj ili kaj la amaso ankaŭ studis la koncernajn ĉefartikolojn el la gazetaro ĉe la centra nivelo, iom post iom unuigis sian konon.

La grupanoj faris, kune kun la revoluciaj amasaj organizoj de la mineja distrikto, konkretan analizon pri la gvidantaj kadroj de la supera kaj meza rangoj per klasanaliza metodo. Ili ekzamenis la pasintecon de la kadroj en ĝia tuteco kaj samtempe konsideris ilian praktikan agadon en la granda proleta kultura revolucio; analizante la karakteron de iliaj eraroj ili ankaŭ konsideris ilian sintenon al la eraroj; tio, kio plej gravas, estas konsideri ilian sintenon al la penso de Maŭ Zedong kaj al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Post profunda kaj detala analizo oni havis pli klaran konon pri la stato de la vico de kadroj.

Rilate al la kadroj kiuj faris erarojn, ili kune kun la proletaj revoluciuloj agis laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj alprenis la orientilon **"lerni el pasintaj eraroj por eviti la estontajn, kuraci la malsanon por savi la homon"** kaj **"unuigo — kritiko — unuigo"**, faris ideologian edukon al ili, helpis ilin lerni la verkojn de Prezidanto Maŭ por detrui egoismon kaj starigi kolektivismon, por ke ili rompu sian rilaton kun plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj vere staru ĉe la flanko de la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ. Ili decide plenumis la instrukcion de Prezidanto Maŭ: **"Vi devas teni politikon en komando, iri en la amasojn, kaj pli bone konduki la grandan proletan kulturan revolucion kune kun la amasoj".** Multaj revoluciaj kadroj elpaŝis antaŭ la amaso post sinsekvo da politik-ideologiaj laboroj kaj post kritikoj kaj bataloj. Kaj naskiĝis revolucia provizora povohava organizo kun "triflanka kombiniĝo".

PLIALTIGI LA KLASAN KONSCION DE LA LABORISTOJ KAJ OFICISTOJ PERE DE PLENA REVOLUCIA KRITIKO

Plenmano da potenctenantoj en la mineja distrikto irantaj la kapitalisman vojon tutforte oponis la penson de Maŭ Zedong kaj oponis la elstarigon de la politiko de proletaro. Ili praktikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion, metis monon en komandon kaj klopodis pri materia stimulo por korupti la laboristan amason. La krimagado de tiu plenmano da klasaj malamikoj estigis seriozan sekvon en la karbomineja distrikto.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"Preni en manon ideologian edukadon estas la centra ĉenero en unuigo de la tuta Partio por fari grandan politikan batalon. Se tiu ĉi tasko ne estas solvita, ĉiuj politikaj taskoj de la Partio ne povas esti plenumitaj."** Firme kaptante la retlevŝnuron de klasbatalo kaj per la vidpunkto de Prezidanto Maŭ pri la klaso kaj klasbatalo, ili edukis la amason, armis la amason, plialtigis la klasan konscion kaj instigis la revolucian spiriton de la amaso por ke la vasta amaso eduku sin mem kaj liberigu sin mem per propraj fortoj.

Multaj maljunaj laboristoj suferis klasan eksploatadon kaj klasan subpremadon en la malnova socio, kaj sur iliaj korpoj estas cikatroj kiujn postlasis la vipado fare de la feŭdaj tiranaj ĉefoj. Ankaŭ absoluta plimulto de la junaj laboristoj devenis de familioj de laboristoj, malriĉ-kamparanoj, malsuperaj mez-kamparanoj aŭ aliaj laborantaj popolanoj. Ili havas profundan klasan senton al la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj ĝisostan malamon al la klasaj malamikoj. Tio estas tre favora kondiĉo por la klasa edukado fare de la propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong.

La grupanoj kaj la laboristoj fojon post fojo studis la instrukcion de Prezidanto Maŭ: **"Klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado estas la tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencan socialisman landon. Tiuj movadoj estas solida garantio, por ke komunistoj sin liberigu de burokratismo, iĝu imunaj kontraŭ reviziismo kaj dogmismo, kaj restu por ĉiam nevenkeblaj. Ili estas fidinda garantio, por ke la proletaro povu unuiĝi kun la vastaj laborantaj amasoj por realigi demokratian diktaturon. Se, pro manko de tiuj movadoj, la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj diversspecaj demonoj estus permesataj amase elrampi, dum niaj kadroj fermus siajn okulojn al ĉio ĉi tio kaj multaj eĉ ne povus distingi inter la malamikoj kaj ni mem, sed kunlaborus kun la malamikoj kaj fariĝus koruptitaj, senmoraligitaj kaj dispartigitaj de la malamikoj, se niaj kadroj estus tiel eltrenitaj aŭ la malamikoj sukcesus enŝteliĝi, kaj se multaj el niaj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj fariĝus same sendefendaj kontraŭ la samtempe praktikataj molaj kaj malmolaj taktikoj de la malamikoj, do pasos ne tiel multe da tempo, eble nur kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj, maksimume, kelkaj jardekoj, neeviteble okazus kontraŭ-revolucia restariĝo tra la tuta lando, la marksism-leninisma partio sendube fariĝus reviziisma partio, faŝisma partio, kaj la tuta Ĉinio ŝanĝus sian koloron."** Kontrastigante la okazojn en la karbominejo kun la instrukcio de Prezidanto Maŭ, la laboristoj kaj oficistoj estis mirigitaj, kaj ili komprenis, ke la klasa malamiko kun vana klopodo provis renversi



Haŭ Ĝongjun, batalheroo de PLA, kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun la revolucia amaso de la stacidomo de Gujlin.

socialismon kaj restarigi kapitalismon pere de praktikado de materia stimulo kaj komando de mono.

Kamarado Lin Biaŭ diris: "Kiu ne komprenas, kio estas klaso kaj kio estas ekspluatado, tiu ne komprenas revolucion." Laŭ tiu ĉi instrukcio de kamarado Lin Biaŭ ili kondukis inter la laboristoj, kadroj kaj iliaj familianoj edukadon per rememorigo pri la amara pasinteco kaj pripensigo pri la nuna feliĉo. Ili rememoris la klasan suferon en la malnova socio, akuzis pri krimagoj plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝan reakcian linion. Ĉiu labor-brigado kaj ĉiu loĝdomo de la familianoj okazigis kunvenon, ĉe kiu la laboristoj kaj la membroj de la propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong rememoris kaj eldiris sian amaran pasintecon, kune dividis sian klasan suferon kaj kune kriis pri venĝo. Tiamaniere ili konstatis, ke la radiko de ilia mizero kaj subpremiteco kuŝas en tio, ke la potenco de la karbominejo ne estas en la manoj de la laborista klaso. Kiam oni posedas la regpotencon, oni havas ĉion, kaj kiam oni perdas la regpotencon, oni perdas ĉion. Kaj tio plue vokis ilian malamon kontraŭ la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj ili pli bone konsciis la grandiozan signifon de la granda proleta kultura revolucio iniciatita de Prezidanto Maŭ kaj la sagacon kaj grandecon montritajn de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Iu maljuna laboristo diris, ke komparo de la nova socio kun la malnova vidigas, ke la nova socio estas paradizo kaj la malnova estas infero. Hodiaŭ, la klasa malamiko oponas la Partion kaj Prezidanton Maŭ, vane intencante renversi nian ŝtaton de proleta diktaturo kaj restarigi la kapitalismon. Neniam ni ĝin permesos. Ni nepre devas depreni la potencon kaj sekvos Prezidanton Maŭ por fari revolucion dum nia tuta vivo. Iu laboristo emocie rigardis la portreton de Prezidanto Maŭ kaj diris: "Ho Prezidanto Maŭ! Sen vi, nia amata, ni ne povus vivi kiel hodiaŭ!" Ili esprimis sian decidon, ke ili ĉiam sekvos Prezidanton Maŭ por fari revolucion kaj neniam ŝanĝos sian ruĝan koron, eĉ se la maro sekiĝos kaj la ŝtono putros. Ili diris al la kamaradoj el la Liberiga Armeo: Vi bonvolu transdiri al Prezidanto Maŭ, ke li, nia amata, estu trankvila, ni la laboristaro plej decide kaj firme respondos al lia alvoko, plenenergie tenos la revolucion kaj forte stimulos la produkton, decide frakasos ĉiun ajn intrigon de la klasa malamiko, kaj senŝanceliĝe kondukos la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino.

DISVOLVI LA AMASAN MOVADON DE KREIVA STUDO KAJ KREIVA APLIKO DE VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ

La grupanoj heredigis la "kvar unua-ojn" kaj inokulis la "Tri-ok-stilon", forte disvolvis la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ dum batalado, laborado kaj lernado kune kun la laboristoj kaj oficistoj, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **"La avangarda kaj modela rolo de komunistoj estas eksterordinare grava"** kaj la instrukcion de kamarado Lin Biaŭ "Eduko per ekzemplo estas pli grava ol eduko per vortoj".

La propaganda grupo ankaŭ organizis multajn propagandajn grupetojn de la penso de Maŭ Zedong. Uzante diversajn propagandilojn, ili grandskale lekciis, studis, aplikis kaj starigis la penson de Maŭ Zedong enirinte en ĉiun angulon de la karbomineja distrikto.

Batalanto el trupo de PLA subtenanta la maldekstrulojn en iu fabriko de Kinghaj laboras kune kun revolucia laboristo por stimuli la produkton.



Kie troviĝis amaso, tien ili iris kaj faris propagandon. La ŝakto estis la plejfronto por **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, kie troviĝis granda nombro da homoj, la produktado iris plej intense, la laboro estis plej malfacila, ekzistis plej multe da aktualaj pensoj kaj la penso de Maŭ Zedong estis pleje bezonata. Ili eniris en la ŝakton, laboris kune kun la laboristoj, propagandis la penson de Maŭ Zedong, multe vigligis la politikan atmosferon en la ŝakto kaj kreis bonan medion por akceli la ideologian revoluciigon de la laboristoj.

Post starigo de la nova gvidantaro de la minejo, la grava problemo estis, kiel oni povos akceli la revoluciigon de tiu ĉi gvidantaro. La nova gvidantaro devas alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, devas esti ideologie revoluciigita, devas tutkore kaj tutanime servi al la popolo, sed ne devas permesi, ke produktadon komandu mono; ĝi devas posedi laborstilon fulmrapide efektivigi komisiitan taskon kaj enprofundiĝi en la amason, sed ne devas esti prokrastema aŭ burokratisma. Unuvorte, ĝi devas esti la komandejo de politika ideologio sed ne devas esti nur komandejo de produktado. Pro tio, la membroj de la propaganda grupo kaj tiuj de la nova gvidantaro kune studis la "tri malnovajn artikolojn" kaj la instruon de Prezidanto Maŭ: **"La politiko estas la komandanto kaj la animo", "politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro"**, kaj aktive helpis al la nova gvidantaro la trejnadon de kadroj de politika laboro.

Post la publikigo de la letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj kaj revoluciaj kadroj de fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj de la tuta lando, ili kune kun la kamaradoj de la nova gvidantaro iris en la ŝakton, kaj tie ili komunikis al la laborista amaso la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio per plejgranda entuziasmo kaj rapideco, por ke la alvoko fariĝu agadprogramo de la vastaj laboristoj kaj oficistoj kaj potenca movforto por **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**. La laboristoj diris kun



Reprezentanto de la propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong de PLA laboranta en Giangnan-a Ŝipkonstruejo, Ŝanhajo, helpas la revoluciajn laboristojn en stilĝustigado.

emocio: "Tio estas plej granda prizorgo, plej granda subteno kaj plej forta instigo de Prezidanto Maŭ al ni ŝaktistoj." Ili esprimis sian decidon, ke ili "subtenos kaj plenumos la alvokon tute senrezerve kaj per ĉiuj fortoj". La laboro de la propaganda grupo donis profundan edukon al la membroj de la nova gvidantaro. La kamaradoj de la nova gvidantaro esprimis, ke la fulmrapida taskoefektiviga laborstilo de la Liberiga Armeo estas bona ekzemplo, kiun ili devas lerni.

La gvidantoj de la propaganda grupo iris persone al la plejfronto de produktado, ili estis kaj laborantoj kaj propagandantoj de la penso de Maŭ Zedong, kaj ili faris produktlaboron kaj samtempe ankaŭ politikan kaj ideologian laboron. Ankaŭ la gvidantaro forlasis la oficejon kaj iris al la produkta fronto. En tenado de la produktado, ili prizorgis ne nur la aktualan laboron sed ankaŭ la ideologion de la laborista amaso. Ili elmetis la kreivan studon kaj kreivan aplikon de la verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la unuan temon dum diskutado pri la rimedoj de plialtigo de la produkta nivelo. Dum raportado pri produktado, ili unue raportis pri la progreso de studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la stato de la ideologio de la laboristoj.

Enirinte en la ŝakton, la grupanoj ĉiam estis la unuaj en peniga laborado kaj ĉie ŝarĝis sin per pezaj taskoj. Ili iris tien, kie troviĝis danĝero. Dum ripozhoro ili faris koran interparoladon kun la laboristoj aŭ kune studis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Iu maljuna laboristo diris: "Ne gravas, kiom da laboroj vi faras kion ni povos plenumi nur per iom pli da energio. La plej grava estas tio, ke vi donis al ni laboristoj la penson de Maŭ Zedong, tio estas nia vivradiko!"

La tuto de la komandantoj kaj batalantoj de la propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong decidis, kune kun la proletaj revoluciuloj de la karbomineja distrikto, pli alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, forte elstarigi la proletan politikon, forte teni la revolucion kaj plenenergie stimuli la produkton por fari Datong-an Karbominejon novtipa socialisma entrepreno, granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong.

En Konstruado

INAŬGURO DE LA EKSPOZICIO DE JAPANAJ SCIENCAJ INSTRUMENTOJ EN TIANGIN

Antaŭtagmeze de la 4-a de junio de 1967, inaŭgurîgis en Tiangin la Ekspozicio de Japanaj Sciencaj Instrumentoj.

Tiu ĉi estas la unua faka ekspozicio aranĝita en Ĉinio de la Japana Asocio por Akcelado de Internacia Komerco. La ekspozicia surfaco ampleksas 3,200 kvadratajn metrojn, kaj la ekspozaĵoj konsistas ĉefe el elektronaj instrumentoj kaj ankaŭ el aliaj sciencaj instrumentoj por analizo, esploro, mezuro, kalkulo kaj aliaj celoj kaj koncernaj komponaj partoj. La inaŭguro ne okazis je la 1-a de junio, kiel fiksite en la origina plano, kaŭze de malica obstrukcado kaj subfosado de la reakcia Sato-registaro de Japanio.

La inaŭgura soleno havis lokon en la Dua Laborista Kultura Palaco de Tiangin. Sur la fundo de la podio pendis granda portreto de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la mondaj popoloj. En la komenco de la soleno, la japanaj amikoj deziris senlime longan vivon al la granda gvidanto de la mondaj popoloj Prezidanto Maŭ, kaj ĉiaman sanon al lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ. Poste, ili voĉlegis la eldirojn de Prezidanto Maŭ kune kun la ĉinaj gastoj ĉeestantaj la solenon laŭ invito: **"Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. En aspekto la reakciuloj estas timindaj, sed fakte ili ne havas forton eksterordinaran. Rigardate el longperioda vidpunkto, vere potenca forto apartenas ne al la reakciuloj, sed al la popolo." "Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."** Ili ankaŭ ĥore kantis *Ruĝas la Oriento.*

La respondeculoj de la urbo Tiangin kaj de la Tiangina Filio de la Ĉina Komitato por Akcelado de Internacia Komerco kaj aliaj koncernaj institucioj invitite ĉeestis la solenon.

Paroladon faris sinsekve Takamaru Morita, ĝenerala sekretario de la Grupo por Ekspozicio de Japanaj Sciencaj Instrumentoj, Rjuĝi Kobajaŝi, vic-estro de la Grupo kaj Li Ĝoŭhing, respondeculo de la Tiangina Filio de la Ĉina Komitato por Akcelado de Internacia Komerco. Estis legitaj en la soleno gratula telegramo sendita de la Asocio por Amikeco inter Ĉinio kaj Japanio kaj la Ĉina Komitato por Akcelado de Internacia Komerco kaj alia institucio kaj ankaŭ tiu de Tanzan Iŝibaŝi, prezidanto de la Japana Asocio por Akcelado de Komerco kaj Tokuma Ucunomija, ĝia vicprezidanto. La lasta telegramo diris ke la nerompebla amikeco inter la popoloj de Japanio kaj Ĉinio formita en komuna batalo estas ne detruebla por la usona imperiismo, soveta reviziismo, japanaj reakciuloj, japana reviziismo kaj ĉiaj aliaj fortoj. En sia gratula telegramo, Kenzo Nakaĝima, prezidanto de la Konsilantaro de la Asocio por Kultura Interŝanĝo inter Japanio kaj Ĉinio, diris ke la ekspozicio okazanta en la tempo, kiam la ĉina granda proleta kultura revolucio akiris decidan venkon, multe kontribuos por disvolvi la amikan komercon inter Japanio kaj Ĉinio kaj la batalan amikecon inter la popoloj de la du landoj.

En la fino de la soleno, la ĉeestantoj ĥore kantis *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto.*

GRANDMEZURA PLIPRODUKTO DE SOMERAJ GRENOJ EN GUJĜOŬ

La proletaj revoluciuloj de Gujĝoŭ-provinco akiris riĉan rikolton de agrokulturo en la unua somero post sia ekpreno de la potenco. Ĝis la lasta tagdeko de majo, en la tuta provinco, oni jam rikoltis tritikon en 2,160,000 muoj kaj finis plejparte la rikolton de pizo, fabo, hordeo, terpomo k. a. En la plejparto de la provinco, la rikoltaj laboroj iris pli rapide ol en la sama periodo de la pasinta jaro. La komunumanoj diris ke la tritiko kreskas ĉijare tre bone kaj ili rikoltas ĉiam pli fervore.

La ĉijara somergrena rikolto de Gujĝoŭ karakteriziĝis per tio ke la pliprodukto estas universala kaj grandmezura en diversaj regionoj kaj la riĉa rikolto ampleksas ĉiujn somerajn grenojn. La totala produktkvanto de la someraj grenoj en la provinco pliiĝis je 20% ĝis 100% ol tiu en la pasinta jaro kaj multe superis tiun de la rekorda jaro en la historio. Krom tio, altiĝis ankaŭ la pomua produkto.

KRISTALA VITAMINO D_3

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la proletaj revoluciuloj de la Dongfanghong-a Farmacia Fabriko de Ŝanhajo rompis malnovajn rutinojn, kuraĝe reformis teknologion, faris teknikajn renovigojn kaj sukcesis fabriki, post kelkmonata penado, kristalan vitaminon D_3.


La ekspertizo de koncernaj institucioj montras ke ĝi superis la internacian progresintan nivelon tiel en kvalito kiel en produktkvanto ricevita po unuo.

Granda Riĉrikolto de Someraj Grenoj en la Tuta Lando

MEZE de triumfaj kantoj de la granda proleta kultura revolucio, venadas de nia vasta kamparo de sudo ĝis nordo ĝojigaj informoj pri riĉa rikolto de someraj grenoj. Ĉijare, la totala produktkvanto de someraj grenoj en la tuta lando kreskis je ĉirkaŭ unu dekono ol tiu en la pasinta jaro, kaj ankoraŭ pli granda estas la kresko de pomua produktkvanto. Tiu ĉi jaro montriĝas jaro de granda riĉa rikolto. Centmilion-nombra amaso de kamparanoj kaj revoluciaj kamparaj kadroj varme ĝojkriis, ke tio estas alia granda venko de la senlime brilanta penso de Maŭ Zedong kaj nova fruktego de la granda proleta kultura revolucio. Ili decidis antaŭenmarŝi en la venko kaj daŭre batali por akiri riĉegan rikolton de la aŭtunaj grenoj.

La produkta laboro de someraj grenoj en diversaj lokoj de nia lando iris ĉijare dum la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio. Ĉe la semado, la ĉefaj produktaj areoj de someraj grenoj en la regiono de la Flava Rivero kaj la rivero Huajhe suferis seriozan sekecon, kaj tio prokrastis la semadon de tritiko en iuj lokoj, kaj kaŭzis en aliaj nemalmultaj lokoj mankon de akvo al tritikaj kampoj. Kaj aperis ankoraŭ en aliaj lokoj malutilaj insektoj. Ĉio ĉi pliigis malfacilon al la kreskado de someraj grenoj. Sed, sub la gvido de la granda principo de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** kaj la helpado de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiu subtenas la grandan kulturan revolucion en la kamparo kaj la agrikulturan produktadon, la vastaj amasoj de kamparanoj kaj revoluciaj kamparaj kadroj armitaj per la penso de Maŭ Zedong obstine batalis kontraŭ diversaj malfaciloj, kaj fine akiris venkon kaj en revolucio kaj en produkto.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"En la kampoj de la produkta batalo kaj**



En sonado de triumfa kanto de la proleta kultura revolucio, Huangĝuang-komunumo en Denghian, Henan-provinco, akiris ĉijare senprecedence abundan rikolton de tritiko.

scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo. Tial, la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn." Sekvante tiun instruon, la kamparanaj amasoj kaj revoluciaj kamparaj kadroj de diversaj lokoj kondukis la ĝisĉielan laborfervoregon vekitan de la granda kultura revolucio al la batalo por aktive krei kondiĉojn por pliprodukto, sur la bazo de resumo de sperto. Dum la pasintaj vintro kaj printempo, en multaj lokoj oni multon faris en agrikultura akvoutiliga konstruado kaj transformis sekajn kampojn en kampojn irigaciatajn. En diversaj regionoj oni energie disvastigis bonajn speciojn de tritiko, kiuj estas rezistemaj kontraŭ rustmalsano kaj altproduktaj, kaj vaste pliigis la bazan kaj aldonan sterkojn. En tiu ĉi jaro, ne nur en senkatastrofaj regionoj kaj la regionoj de malpeza katastrofo, la produktkvanto ĝenerale kreskis en granda skalo, sed ankaŭ la regionoj trafitaj de serioza katastrofo havas kompare bonan rikolton.

La vasta centmilion-nombra amaso de kamparanoj kaj revoluciaj kamparaj kadroj opinias kun senkompara ĝojekscitiĝo, ke la riĉega rikolto de someraj grenoj en la tuta lando de tiu ĉi jaro estas rezulto de la praktikado de la principo de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**. Ili decidis teni pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kreive studi kaj kreive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ, forte teni la revolucion kaj energie stimuli la produkton, kaj aktive intensigi la surkampan prizorgadon de la aŭtunaj plantaĵoj, en la tempo de klopodado por plenumi la taskon de la somera semado en ĝusta tempo kaj alta kvalito, por akiri plie abundan rikolton de la aŭtunaj grenoj.



Propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong de PLA, kiu helpas en la somera rikolto, instruas al la komunumanoj kanton kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ dum ripozo.

Riĉa rikolto de tritiko en Guanĝong-ebenejo. Komandantoj kaj batalantoj el PLA en Ŝenhi venas al kamparo dum la laborplena sezono de somera rikolto por falĉi tritikon kune kun la komunumanoj.





Senprecedence abundan rikolton de printempa tritiko sur vasta areo havas la dekoj da ŝtataj agrokulturejoj en la Tririvera Ebenaĵo de Hejlonggiang-provinco.

Jangtan-komunumo en Kju-aŭ-gubernio, Ŝanhi-provinco, kiu ricevis riĉan rikolton de tritiko, aktive vendas someran grenon al la ŝtato.



Firme Defendi la Revolucian Literaturan kaj Artan Linion de Prezidanto Maŭ

GIN GINGMAJ

I

Prezidanto Maŭ genie kaj kreive disvolvis la mondkoncepton de marksism-leninismo kaj ĝian teorion pri literaturo kaj arto en la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, en kiu estis elmetita unuafoje la plej kompleta, plej ĝisfunda, plej ĝusta literatura kaj arta linio de marksism-leninismo en la internacia komunisma movado. La 25-jara praktikado de la revolucio ĉiam pli konvinke pruvis ĝian senkompare potencan vivforton.

La apero de la epokfara brila dokumento *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* deklaris la komenciĝon de nova erao de la proleta literatura kaj arta movado. Kvazaŭ lumturo ĝi lumigas al ni la vojon marŝotan antaŭen al venko; kvazaŭ la stelo Venuso ĝi antaŭsciigas, ke la proletaj literaturo kaj arto baldaŭ aperos en la mondo kun tute nova fizionomio; kaj kvazaŭ verdikto ĝi deklaris la proksimiĝon de la lasta tago de ĉiuj reakciaj, putriĝintaj literaturo kaj arto de kapitalismo kaj feŭdismo. Fidele sekvi kaj kuraĝe defendi la literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ aŭ ne, estas la fokuso de luktado inter la proletaj literaturaj kaj artaj batalantoj kaj ĉiuj kontraŭrevoluciaj reviziistoj. De pli ol dek jaroj post la fondiĝo de nia respubliko, la batalo inter la du linioj en la literaturaj kaj artaj rondoj estas batalo pri tio, ĉu sekvi aŭ oponi la *Paroladojn ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.*

La reakciuloj, de la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng ĝis la kontraŭrevolucia reviziisto Ĝoŭ Jang kaj liaj kunuloj, kaj ankaŭ la ĝenerala postkulisa apoganto de la nigra linio de literaturo kaj arto, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ĉiuj direktas siajn lancpintojn kontraŭ la senlime brila verko *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.* Ili malbenis ĝin per ĉiuj venenaj vortoj, distordis ĝin per ĉiuj malnoblaj rimedoj, kaj oponas kontraŭ ĝi, portante diversajn standardojn. Ke la malamikoj tiel energie oponas kontraŭ ĝi, pruvas nur, ke la *Paroladoj* estas senkompare granda.

II

Prezidanto Maŭ diris: "La problemo, por kiuj estas literaturo kaj arto, estas problemo fundamenta, problemo de principo." Ekde la komenco de la

homa historio al literaturo kaj arto de la ekspluatantaj klasoj estas senescepte en la manoj de malmultnombraj regantoj kaj uzataj de ili kiel iloj por subpremi kaj trompi la popolon. Estas Prezidanto Maŭ, kiu unuafoje plej klare deklaris: **"Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio, por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por ili kaj utiligataj de ili."** Estas Prezidanto Maŭ, kiu unuafoje plej ĝuste kaj plej sisteme prezentis kaj solvis la problemon, kiel la literaturo kaj arto povas vere servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La servigo de literaturo kaj arto al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj signifas armi ilin per la penso de Maŭ Zedong, la plej alta kaj plej viva marksism-leninismo en la nuna epoko, pere de diversaj formoj de literaturo kaj arto, kaj konduki la socialisman revolucion — elimini la burĝan ideologion por starigi la proletan kaj detrui egoismon por starigi kolektivismon — al la fina venko. La plej alta misio por la literaturo kaj arto estas propagando de la penso de Maŭ Zedong.

Por ke la literaturo kaj arto pli bone servu al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la proleta politiko, Prezidanto Maŭ prezentis en la *Paroladoj* serion da plej ĝustaj kaj plej bazaj rimedoj. Inter ili, antaŭ ĉiuj aliaj estis la problemo de ĝisfunda remuldo de la mondkoncepto por la literaturaj kaj artaj laborantoj, t. e., transigi sian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la flanko de la proletaro, longtempe, senkondiĉe kaj plenanime profundiĝi inter la amasojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por sin remuldi kaj koni siajn priskribotajn objektojn, kaj fariĝi vere membroj de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj kaj iliaj fidelaj proparolantoj. En la mala okazo, se la mondkoncepto ne estas remuldita, kiel oni povas kompreni la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn armitajn per la penso de Maŭ Zedong? Se la starpunkto ne estas ŝanĝita, kiel oni povas prikanti la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn? Se la literaturaj kaj artaj laborantoj ne faris sin membroj de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, kiel ili povas posedi kaj uzi la lingvon de la lastaj por krei verkojn servantajn al ili? Estas neimageble, ke la literaturistoj kaj artistoj, plene dronintaj en la "fremdlandajn, famajn kaj klasikajn" verkojn, povas kompreni la spiriton de la Daĝajanoj, kiuj ŝanĝis la fizionomion de la naturo, kaj ricevi inspiron por sia kreado, de la sinforgesa laborado de la Daking-anoj kiuj komencis sian sukcesan agadon per la lernado de la du filozofiaj artikoloj de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiroj*, kaj strebis al prospero, sinapogante sur la propraj fortoj. Lej Feng sin vestis per ripetade kaj ripetade flikitaj ŝtrumpoj, sed donacis sian monon ŝparitan dum jaroj al iu popola komunumo trafita de natura katastrofo. Kiuj staras sur la burĝa starpunkto, certe rigardos tion kiel "stultaĵon". Por la burĝaj sinjoroj, estas pli malfacile kompreneble, ke en la momento de eksplodo de dinamito kamarado Vang Gie sekurigis siajn kamaradojn per la propra vivo. Nur transiginte nian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la flanko de la proletaro laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ni povas produkti literaturaĵojn kaj artaĵojn vere por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vere proletajn.

De dek-kelkaj jaroj, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la de li subtenataj kontraŭrevoluciaj reviziistoj Ĝoŭ Jang kaj ties kunuloj direktas sian lancpinton de atako ĝuste al la baza problemo de la *Paroladoj* ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili senkaŝe ŝanĝis la direkton de Prezidanto Maŭ ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, elmetante reakcian programon de "tutpopolaj literaturo kaj arto" por ke la literaturo kaj arto servu al la bienularo kaj burĝaro kaj fariĝu ilo por restarigo de kapitalismo.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj, ĉiuj multpromesaj literaturistoj kaj artistoj en Ĉinio, nepre devas iri en la mezon de la popolamaso, nepre devas iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn. . . ." Agi laŭ tiu instruo de Prezidanto Maŭ estas premiso kaj ŝlosilo por produkti literaturaĵojn kaj artaĵojn servantajn al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La kontraŭrevolucia reviziisto Ĝoŭ Jang kaj similaj tute ne sekvis tiun instrukcion de Prezidanto Maŭ. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon eĉ diris absurde, ke "literaturaj kaj artaj laborantoj povas iri en la kamparon per aŭto kaj eĉ manĝi kaj dormi en ĝi." Tio estas aroganta atako kontraŭ la literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. Respondu: Kiel oni povas, estante en aŭto, profundiĝi por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la amasojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj? Kiel oni povas transigi sian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la flanko de la proletaro, se oni eĉ manĝas kaj dormas en aŭto? Estas klare, ke la celo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kiu pledas por "iri en la kamparon per aŭto", estas malsukcesigi la kombinon de la literaturaj kaj artaj laborantoj kun la laboristoj, kam-

paranoj kaj soldatoj. Tio estas identa kun la celo de la "teorio de tri fama-oj" (fama verkisto, fama reĝisoro kaj fama aktoro) kaj la "politiko de tri alta-oj" (alta salajro, alta honorario kaj alta premio) de tiuj aĉuloj. Ili aktive pledas por la komandanteco de materio kaj la komandanteco de honoro kaj profito, celante nur delogi la literaturajn kaj artajn laborantojn pli kaj pli disiĝi de la amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj fali en la marĉon de reviziismo, por ke la literaturo kaj arto fariĝu iloj por restarigi kapitalismon.

Prezidanto Maŭ diris: "Ĉio ajn estas bona, nur se ĝi povas alporti veran bonon al la popolo." Ni opinias, ke vere bonaj literaturaĵoj kaj artaĵoj, kiuj povas porti al la popolamaso verajn bonojn, estas tiuj kiuj propagandas la penson de Maŭ Zedong, edukas per ĝi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, profunde komprenigas al ili la gravecon de firmigo de la proleta reĝimo kaj akcelas la klasbatalon de eliminado de la burĝa ideologio kaj starigo de la proleta ideologio por puŝi la socialisman revolucion venke marŝi antaŭen. Estas neimageble ke io kiaj la ĉina *Ventumilo de Persikaj Floroj*, la fremdlanda *Sinjorino kun Kamelio* kaj similaĵoj povas stimuli la entuziasmon de la popolo por konstrui socialismon. Sed, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon tute ne parolis pri propagando de la penso de Maŭ Zedong kaj eĉ senkaŝe proponis: "Se oni ne povas prezenti en la opero la modernan vivon, oni do ludigu la historiajn operojn por ke la spektantoj ĝuu ilin kaj bone ripozu; kaj tio estos ankaŭ stimulo de socialisma laborentuziasmo." Li eĉ diris ke "ankaŭ la malbonajn dramojn oni povas ludi post ioma revizio en iuj lokoj". Ĝuste sub la apogo kaj protekto de tiu Ĥruŝĉov de Ĉinio, imperiestroj, princoj, generaloj kaj ministroj, inteligentaj sinjoroj kaj belaj sinjoridinoj povis okupi niajn scenejojn, kaj tiel grandakvante la kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj venenaj herboj povis libere inundiĝi, dum longa tempo. Sub la preteksto de "aprezo" kaj "amuziĝo", ili trudis al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj siajn kontrabandaĵojn propagandantajn kapitalismon kaj feŭdismon, por ilin veneni.

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon ĉie pledis por la reviziismaj absurdaĵoj, nome, "ekspluato estas merito", " 'paciĝo' kun imperiismo, ĉiulandaj reakciuloj kaj moderna reviziismo kaj redukto de subteno al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj", "plivastigo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado". Tiel, en la literatura kaj arta kampoj, li certe volas krei, per la buŝoj de diversaj diabloj kaj demonoj, la publikan opinion por sia kontraŭrevolucia restarigo. Laŭ li, "historiaj dramoj povas esti prezentataj", kaj "ankaŭ la malbonajn dramojn oni povas ludi post ioma revizio en iuj lokoj". Ĉu troviĝas tiam iaj dramoj, kiujn oni ne povas prezenti? En liaj okuloj, eĉ la senkaŝa naciperfida filmo *Sekreta Historio de la Kingkortego* estas "patriotisma", do, la aliaj estas kompreneble ĉiuj "aromaj floroj" por li. Nature, troviĝas ankaŭ dramoj, kiuj ne povas esti ludataj laŭ lia opinio, kaj tiuj estas neniuj aliaj ol tiuj literaturaĵoj kaj artaĵoj, kiuj propagandas la penson de Maŭ Zedong kaj vere servas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la politiko de la proletaro. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon mem elpaŝis por ĉiel malhelpi la surscenigon de la revolucia moderna pekina opero *La Haveno*. Li direktis siajn sekvantojn fari furiozajn persekutojn kontraŭ la revoluciaj maldekstruloj, reprezentataj de kamaradino Giang King, kiuj fidele sekvas la literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, kaj ĉiurimede bagateligi la grandan signifon de la revoluciaj modelaj verkaĵoj produktitaj sub la gvidado de kamaradino Giang King. Ĉar ankaŭ ili sciis ke, se la revoluciaj maldekstruloj el la literaturaj kaj artaj rondoj konkeros sub la gvido de kamaradino Giang King la plej solidan fortikaĵon, la pekinan operon, tio nepre antaŭenpuŝos entute la revolucion en la literaturo kaj arto, kaj tiam ilia tempo fariĝos nepasigebla. Do ili furioziĝis kaj komencis senbridan reatakon, vane provante returni la sorton de definitiva pereo de la literaturo kaj arto de feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Nur kiuj reprezentas la amason, povas eduki la amason, kaj nur kiuj lernas de la amaso kiel lernantoj, povas fariĝi instruantoj de la amaso." Prezidanto Maŭ alvokis la literaturajn kaj artajn laborantojn, ke ili lernu kun sincera koro de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por ŝanĝi kaj remuldi siajn pensojn kaj sentojn. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj liaj sekvantoj, kiujn li subtenis, furioze oponas kontraŭ la lernado de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kaj kontraŭ la penado lerni de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj kun kaŝita intenco koncentras la problemon de lernado de la literaturaj kaj artaj laborantoj en lernadon de tekniko. Ili alte taksis burĝajn "specialistojn" kaj "aŭtoritatulojn" ĝis la ĉielo, kaj klinis kaj obeigis la revoluciajn literaturajn kaj artajn laborantojn antaŭ burĝaj "aŭtoritatuloj", kun la celo "elkulturi" vicojn da literaturaj

kaj artaj laborantoj por servi al la kontraŭrevolucia restarigo. Ni nepre devas travidi la kriman celon de tiu karieristo n-ro 1, absolute ne lasi lian intrigon efektiviĝi nek lasi lin remuldi la vicojn de niaj literaturaj kaj artaj laborantoj per la burĝa ideologio.

En la *Paroladoj* **Prezidanto Maŭ instruas al ni: "En la vivo de la popolo ... troviĝas por ĉiaj literaturo kaj arto la sola kaj neelĉerpebla fonto... povas esti nur tia fonto kaj ne alia."** Tiu ĉi instruo ja estas absoluta vero. La "majstroj" de la tridekaj jaroj sin apartigis tute de la amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sin ferminte en kabinetoj, morte ĉirkaŭprenis la "fremdlandajn, famajn kaj klasikajn", ne volante ilin forlasi, priskribis amaĵojn de kapitalistaj "sinjoridoj" kaj disvendis tiujn kontrabandaĵojn. Nun, ili kapablas ankoraŭ nur transpreni ion el fremdlandaj libroj kaj citi vortojn de siaj feŭdismaj prauloj por timigi kaj veneni homojn. Tio, kion ili povas produkti, estas nur venenaj herboj kia la filmo *Riversudo en la Norda Lando* por kalumnii la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn.

Nur irinte en la solan, plej vastan kaj plej riĉan fonton, la literaturaj kaj artaj laborantoj ekhavos la eblecon komenci kreadi. Dume, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, en la malo, distrumpetis ke "oni ne timu ion reformisman". Li ja morte amegas ĉion reformisman, kio estas tute laŭ lia koro, kaj nature li neniel timas ĝin. La celo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kiu amas la reformismajn afeıojn, estas distordi la instruon de Prezidanto Maŭ pri "fonto" kaj "fluo", por ke niaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj suriru laŭ la piedsignoj de fremduloj kaj mortintoj, paŝon post paŝo, la seneliran vojon de kombino de reviziismo kaj kapitalismo kun la t. n. literaturo kaj arto de la tridekaj jaroj, kaj tiel efektivigi sian kontraŭrevolucian intrigon ŝanĝi la literaturan kaj artan direkton de Prezidanto Maŭ.

III

Antaŭ dudek kvin jaroj nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam klare montris al ni la direkton de niaj literaturo kaj arto servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sed la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj liaj sekvantoj komplete kaj malice atakis kaj misprezentis la esencon de la *Paroladoj*. La reviziisma nigra linio de literaturo kaj arto, kun la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kiel sia postkulisa apoganto, praktikis dum dekkelkaj jaroj diktaturon super ni kaj furioze oponis kontraŭ la literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

De pli ol dek jaroj, la batalo inter la du linioj en literaturaj kaj artaj rondoj estas batalo inter la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj la reviziisma, nigra linio de literaturo kaj arto, kaj batalo inter tiuj, kiuj sekvas la *Paroladojn* kaj tiuj, kiuj oponas kontraŭ la *Paroladoj*. Sekvi la *Paroladojn* celas firmigi la proletan diktaturon; oponi kontraŭ la *Paroladoj* celas malfermi liberan vojon al la restarigo de kapitalismo. Sekvi la *Paroladojn* kaj oponi kontraŭ la *Paroladoj* formas unu el la fokusoj de la batalo inter la du klasoj kaj du vojoj.

En la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, ja estas eltrenita la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kaj lia aĉa vizaĝo estas plene malkaŝita sub la hela sunlumo. Estas li la ĉefkrimulo kiu atakis kaj distordis la *Paroladojn*! Estas li la plej granda postkulisa apoganto de la reviziisma, nigra linio de literaturo kaj arto! Estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong kaj ĝojeginda afero por la tuta popolo, ke li estas eltrenita. Hodiaŭ, kiam ni celebras la 25-an datrevenon de la publikigo de la *Paroladoj*, ni des pli jubilas pro la eltreno de la ĉefkrimulo kiu atakis kaj distordis la *Paroladojn*.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: "La klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj." Post la elsarko de la reviziisma, nigra linio de literaturo kaj arto, novaj nigraj linioj ankoraŭ povos aperi. La spertoj pruvas, ke en la batalo inter la du vojoj en la literatura kaj arta fronto, la malamikoj ĉiam koncentras siajn lancpintojn kontraŭ la *Paroladoj*. Sekvi la *Paroladojn* aŭ kontraŭstari la *Paroladojn* estas la ĉefa signo por diferencigi la du vojojn kaj du liniojn sur la literatura kaj arta batalfronto. Ĉion, kio konformas al la spirito de la *Paroladoj*, ni firme plenumos kaj faros; ĉion, kio estas kontraŭ la spirito de la *Paroladoj*, ni firme bojkotos, oponos kaj kontraŭbatalos. Ni nepre prenos la *Paroladojn* kiel sentencon kaj agados senrezerve laŭ instrukcio donita de Prezidanto Maŭ en la *Paroladoj*. Ni firme defendos kaj fidele sekvos la revolucian literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, kaj alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto, ni venke marŝos antaŭen.

HONGHING:


"La Haveno"—Pekina Opero kun Moderna Revolucia Temo

PER sovaĝe aŭdacaj kaj impone fortikaj penikstrekoj, kun densaj kaj brilaj koloroj kaj en altaj kaj intensaj melodioj, la moderna revolucia pekina opero *La Haveno*, kreita kaj ludita de la Ŝanhaja Pekin-opera Teatro, priskribas la bolantan kaj bunte brilan vivon de aktuala batalo de la portistoj de ŝanhaja haveno en la sesdekaj jaroj kaj kun plena patoso modlis la figurojn de revoluciaj herooj el la nuntempa laboristaro armita per la penso de Maŭ Zedong. Ĝi estas la unua revolucia pekina opero kun moderna temo, kiu spegulas la batalan vivon de la laborista klaso en la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando, priskribas la klasbatalon inter la proletaro kaj burĝaro en socialisma socio, kaj prikantas la noblan internaciisman spiriton de la ĉina laborista klaso en subtenado al la batalo de la revoluciaj popoloj de la mondo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo. La sukcesa prezentado de *La Haveno* malfermis al la pekina opero vastan vojon por prezenti la realan vivon de socialismo.

Tio, kion *La Haveno* priskribas, estas la uragana batalvivo de la haveno de Ŝanhajo en 1963. Pere de la rakonto pri la elstarigo de politiko kaj sukcesa plenumo de tasko de helpo al eksterlando fare de la ŝanhajaj havenaj portistoj, la dramo montras akran klasbatalon en la ideologia sfero dum la periodo de socialisma revolucio, prezentas la ĝisfunde revolucian spiriton de la laborista klaso en la socialisma epoko, kiu kun la penso de Maŭ Zedong kiel armilo lanĉas atakon kontraŭ la burĝa penso kaj ideologioj de ĉiuj ekspluataj klasoj por konduki la proletan revolucion ĝis la fino.

Prezidanto Maŭ instruas al ni ke socialisma socio estas relative longa historia etapo, kaj en tiu historia etapo de socialismo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo. La klasa batalo sub la kondiĉoj de la proleta diktaturo en analizo ĝis la fino estas problemo de regpotenco, t. e., la proletaro volas firmigi sian diktaturon kaj la burĝaro volas renversi la diktaturon de la proletaro. Tia batalo por kaj kontraŭ la restarigo de kapitalismo speguliĝas aparte reliefe en la sfero de ideologio.

Sur la scenejo estas nek pafsonoj, nek interluktado kaj korprema ekzekutejo plena de tintadoj de katenoj, sed ne estas kvieta la haveno de socialismo, kie leviĝas ne nur ondegoj de la naturo, sed ankaŭ ofte furiozas tiuj de klasbatalo. Kian Ŝoŭvej, la postrestinta stapla oficisto, kiu estis nomata "stapla sinjoro" antaŭ la Liberiĝo, ĉiam sopiras pri sia perdita "paradizo". Li disvastigas de tempo al tempo tiajn venenaĵojn de la burĝa ideologio, kiaj "kuliaĉoj estas je tri coloj pli malaltaj antaŭ ĉiuj personoj", "la tempo ekster la ok horoj estas por ĉiu propra" kaj "ĉu la portistoj scipovas administri la dokon?" Venenita de burĝaj ideoj de Kian Ŝoŭvej k. s., juna portisto Han Hiaŭkiang malestimas la laboron de portistoj, tiel ke li faras la eraron porti sakon da rizo anstataŭ tritiko kaj eĉ forĵetas sian laborkarton kaj forlasas la dokon. En la opero, Kian Ŝoŭvej ĉiam kaj



Ekvidinte la portstangon, la emerita laboristo Ma Mangliang rememoras kun granda indigno la suferplenan kaj malfacilan vivon de portistoj en la malnova socio.

ĉie korodas la proletan vicaron per burĝaj ideoj, por krei publikan opinion por la restarigo de kapitalismo, homoj kia li ja estas la socia bazo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon en lia vana klopodo por uzurpi la partian, registaran kaj armean povojn kaj renversi la proletan diktaturon. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj ja estas la reprezentantoj de la klasaj interesoj de tiuj burĝaj elementoj kia Kian Ŝoŭvej. *La Haveno* priskribas profunde klasbatalon okazintan sur la ideologia kampo sub la diktaturo de la proletaro kaj la batalon inter la du klasoj kiuj luktas unu kontraŭ la alia por gajni la junan generacion.


La Haveno ne nur spegulas batalon inter klasoj, sed ankaŭ priskribas kun emfazo la aktivan pozicion de la laborista klaso en la socialisma epoko kaj ĝian nepran venkon en batalo kontraŭ la restarigo de kapitalismo. Lenin diris: **"Marksisto estas nur tiu, kiu disvastigas la agnoskon de la klasa batalo ĝis agnosko de la proleta diktaturo."** Hodiaŭ, nur tiu estas vera marksisto, kiu rekonas la diktaturon de proletaro kaj samtempe rekonas ke sub la historiaj kondiĉoj de la proleta diktaturo ekzistas ankoraŭ la batalo por kaj kontraŭ la restarigo de kapitalismo, batalo inter la proletaro kiu estas por defendi la proletan diktaturon kaj la burĝaro kiu estas por renversi la proletan diktaturon. En *La Haveno* Fang Hajĝen kaj Gaŭ Ĝijang estas tiaj marksistoj. Ili kapablas travidi ĉian demonan venenaĵon de la burĝaro kaj povas elteni ĉiujn provojn de klasbatala ŝtormo. Fang Hajĝen, sekretariino de la partia filio, ĉiam elstarigas la politikon kaj tenas en la memoro la instruon de Prezidanto Maŭ, ke en la socialisma socio ekzistas klasoj kaj klasbatalo; ĉiam kiam ŝi alfrontas ŝtormon

aŭ demonan venenaĵon, ŝi koncentras sian ardan klasan senton kaj altan batalspiriton sur la ĉefan kordon de klasbatalo. Laŭ la vidpunkto de klasbatalo, ŝi observas, analizas kaj solvas ĉiujn problemojn, ĉiam montrante sian apartan akran klasan sentemon. Kiam okazas sur la kajo la incidento de erara miksiĝo de rizpako, tuj ŝi ekpensis: "Eraris la penso tial eraris la pako." Fang Hajĝen akre atentis la agojn de Kian Ŝoŭvej sur la kajo. En la komplika situacio, kiam sinsekve venas al ŝi raportoj pri pakomiksiĝo kaj la peto de Han Hiaŭkiang pri transposteniĝo, Fang Hajĝen kun certeco tenas firme la ĉefan linion: "Kiel oni povas forgesi, ke la politiko devas iri unue en produktaj laboroj!" "Sur la vojo de vivo ĉie estas klasa batalo." Rekte en la vizaĝon de Kian Ŝoŭvej ŝi trafas per la parolo: "La ciferoj jam estas kontrolitaj, tamen devas esti kontrolitaj ankaŭ la pensoj!" Dume ŝi traktas Han Hiaŭkiang kun profunda klasa sento, subtila zorgemo kaj pacienca edukado. Ŝi faras sian ideologian laboron sur la alteco de batalo inter la du klasoj — proleta kaj burĝa — por akiri daŭrigantojn. Per la fortaj amo kaj malamo de klaso, riĉa sperto de klasbatalo kaj la granda idealo de komunismo, ŝi edukas lin, helpas lin ekkoni sian eraron kaj decidigas lin aŭskulti firme la vortojn de Prezidanto Maŭ por fari revolucion ĝis la fino, komplete frakasante la intrigojn de Kian Ŝoŭvej k. s., kiuj koruptas gejunulojn kaj vane intencas restarigon de kapitalismo.

La dramo elokvente pruvas ke la ĉina laborista klaso de la sesdekaj jaroj, kiu sin armis per la penso de Maŭ Zedong, povas ne nur ekpreni la regpotencon el la manoj de la burĝaro, sed ankaŭ firme tenadi la regpotencon de la proletaro kaj batali kontraŭ la ideologioj de la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj, por ke la ruĝa socialisma ŝtato neniam ŝanĝu sian koloron dum la venontaj miloj kaj miloj da generacioj kaj ke la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong flirtu super la tuta mondo. Al la diabloj la sonĝo pri la restarigo de kapitalismo de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kune kun ilia "teorio de estingiĝo de klasbatalo"!

Prezidanto Maŭ asertas ke estas necese praktiki kion Marks diris — nur post la liberigo de la tuta homaro, la proletaro povos finfine liberigi sin mem. La ĉina laborista klaso estas ne nur sturmantoj de la enlandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca ek-

La revolucia spirito de alta devkonscio de ĉinaj laboristoj estas laŭdata en la telegramo alsendita de la fremdlanda varšipo.



sperimentado, sed ankaŭ grandaj internaciistoj. La revolucia popolo de Ĉinio ĉiam unuiĝas, batalas kaj venkas kune kun la revoluciaj popoloj de la mondo, firme subtenas ilin en la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo kaj ĵuras esti ilia forta subtenanto.

La ĉinaj portistoj multe suferis de la subpremado de la "tri grandaj montoj" (t. e., imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo) antaŭ la Liberiĝo. Fang Hajĝen, Gaŭ Ĝijang kaj Ma Hongliang havas malamon kontraŭ imperiismo kaj kuomintang-aj reakciuloj pli profundan ol Huangpu-rivero ĉe Ŝanhajo. Sub la gvido de la Partio, ili liberiĝis, sed ili ne forgesis ke du trionoj el la popoloj de la mondo ankoraŭ vivas en granda mizero kvazaŭ en akvo kaj fajro. Kian profundan klasan senton ili havas por siaj klasfratoj de ĉiuj subpremataj nacioj de la mondo! Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ: **"La popoloj, kiuj jam triumfis en sia propra revolucio, devas helpi tiujn, kiuj ankoraŭ batalas por sia liberiĝo"**, ili rigardas sian ordinaran laboron de transportado kiel internaciisman devon de subteno al la monda revolucio. En iliaj okuloj, "ĉiu sako kaj ĉiu pako ligiĝas strikte kun la mondaj eventoj." Por plenumi pli frue sian taskon, la grupo de Gaŭ Ĝijang kun granda entuziasmo sturmas en la transportado. Kiam ne sufiĉas la maŝinoj, ili portas ĉion per siaj ŝultroj. Malkovrinte la incidenton de la sakomiksiĝo, Gaŭ Ĝijang tuj kolektas la grupanojn por esplori la aferon, flanken lasante sian propran infanon grave malsaniĝantan en la hejmo. Kaj ili senprokraste restaplas en la sama nokto la du mil sakojn da tritiko por kontroli ilin ĉiujn aparte unun post alia. Poste evidentiĝis ke anstataŭ rizpako la tritikpako jam estas misportita sur barĝon veturantan al Vusong. En la urĝa momento, Gaŭ Ĝijang senhezite suriras motorboaton kun sako da rizo por atingi la barĝon, spite la tondropluvego, ondeganta rivero kaj profunda nokto. Fine li sukcesis revenigi interŝanĝe la tritikpakon kaj plenumis la taskon de helpo al alilando. Kun plena pasio, *La Haveno* prikantas la internaciisman spiriton de la ĉina laboristaro vivantan en la socialisma epoko, kiu prenis la patrion en sia sino kaj direktis la okulojn sur la mondon, starigante la piedojn sur la kajo, kaj prezentas la grandiozan realon: "Leviĝas uragane tra la mond' revolucioj. Siajn okulojn la popoloj turnas al Pekino. La vento orienta disportas la penson de Maŭ Zedong kaj ĉie sonas laŭte l' klariono de ekmarŝo." Ĝi montras la brilan perspektivon de nepra plena triumfo de komunismo tra la tuta mondo.

KURANTAJ AFEROJ

En Konstruado

ELEKTRA IRIGACIA KONSTRUAĴO PRETIGITA EN KINGHAJ

En la loĝ-regiono de la salaoj sur Kinghaj-altebenejo estas pretigita elektra irigacia konstruaĵo. Ĝi konsistas el hidroelektrejo kun kapacito de 1,000 kilovatoj kaj 14 pumpstacioj. Nun la elektra stacio jam komencis funkcii kaj duono de la ekipaĵoj de la pumpstacioj estas jam instalita. Kun la turniĝo de la elektraj motoroj la akvo en la Flava Rivero estas pumpita de la malalta riverlito al la altaj lokoj ĉe la riverbordoj por akvumi la olee verdajn printempan tritikon kaj sekalon.

La konstruo estas grava konsistiga parto de la akvoutiliga konstrua projekto, kiu celas radikale forigi la sekecon de la sala-a regiono. Ĝi povas irigacii agrojn de pli ol 37,000 muoj sur la bordoj de la supra parto de la Flava Rivero kaj liveri elektron al tieaj malgrandtipaj industrioj kaj kamparanaj familioj.

SENPRECEDENCA RIĈRIKOLTO DE TRITIKO EN DENGHIAN

La 1,500,000 muoj da tritikokampoj de Denghian, unu el la gravaj produktejoj por komercaj grenoj de Henan-provinco, ricevis senprecedence riĉan rikolton. La pomua produkto de multaj komunumoj kaj produktaj brigadoj kreskis unuoble pli ol tiu en ordinaraj jaroj, kaj la totala produktkvanto de tritiko de la tuta gubernio pliiĝis je 30% kompare kun tiu en la pasinta jaro. La komunumanoj ĝojplene aklamis ke la abunda rikolto estas alportita de la penso de Maŭ Zedong kaj ke ĝi estas venko de la granda proleta kultura revolucio.

La proletaj revoluciuloj kaj malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de Denghian ne kontentiĝis nur pri la jam akiritaj sukcesoj kaj unuvoĉe deklaris ke ili nepre tenos pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, tenos la revolucion kaj stimulos la produkton, ĝustatempe kulturos bone kaj plene, la postajn aŭtunajn grenojn kaj bone flegos la aŭtunajn plantaĵojn por akiri grandan riĉrikolton.


KI HIANGJANG:

La Penso de Maŭ Zedong Donis Novan Vivon al Baledo

EN majo antaŭ 25 jaroj, nia plej plej estimata kaj amata, granda gvidanto Prezidanto Maŭ publikigis sian brilan verkon *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.* Ĝi montris la senlime brilan perspektivon al la revoluciaj literaturo kaj arto.

De 25 jaroj, sur la literatura kaj arta fronto ĉiam furiozas la batalo inter du flankoj, unu por defendi kaj alia por kontraŭi la *Paroladojn.* Tio estas batalo inter du klasoj, du vojoj kaj du linioj. En la literatura kaj arta rondo delonge ekzistas nigra, kontraŭrevolucia, reviziisma linio de literaturo kaj arto, kiu staras kontraŭ la literatura kaj arta penso de Prezidanto Maŭ. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas la ĝenerala postkulisa subtenanto de tiu ĉi nigra linio. Li ĉien etendis siajn nigrajn manojn kaj ankaŭ en nian baledan trupon. Celebrante la 25-an datrevenon de la publikigo de la *Paroladoj,* ni devas entombigi tiun nigran, kontraŭrevolucian, reviziisman linion de literaturo kaj arto kaj komplete faligi kritike ties ĝeneralan postkulisan subtenanton.

La malnovan baledan scenejon regis imperiestroj, reĝoj, generaloj kaj ministroj, dandoj kaj belulinoj, feinoj kaj demonoj. Tie la laboranta popolo, kreanto de la historio, estis malbeligata laŭvole, sed la bienuloj kaj burĝoj fariĝis "herooj". La malnova baledo estas arto reakcia, kiu servas al ekspluataj klasoj. En socialisma lando de proleta diktaturo, tia arto estas netolerebla, kaj ni devas ribeli kontraŭ ĝi, ĝisfunde fari revolucion al ĝi kaj reinversigi la inversigitan historion. Tamen, rilate al artformo, oni ne devas sinteni nihilisme, neante ĉion. Kaj oni devas



En la antaŭvespero de novjaro, la naciperfida, tirana bienulo Huang Ŝiĵen kaj lia lakeo Mu Ĵenĝi venas al la malriĉa kamparano Jang Bajlaŭ por forrabi lian filinon Hi-er sub la preteksto de rericevo de pruntita mono. La patro kaj filino firme rezistas kontraŭ ili.

reformi ĝin kaj labori por krei novaĵojn forpuŝante la arkaikajn, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, por ke ĝi fariĝu arto de la proletaro en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La kontraŭrevoluciaj reviziistoj Ĝoŭ Jang, Hia Jan kaj similaj kaj la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kiu ilin subtenis post la dorso, protektis la malnovan baledon per ĉiuj fortoj. Por ke la baledo fariĝu instrumento por disvendi ilian nigran, burĝan kaj reviziisman varon, ili devigis nin plenenergie lerni de la sovetunia reviziismo kaj prezenti fremdulojn, mortintojn, cignojn kaj feinojn. En 1960, kiam la venena herbo *Sireno* estis prezentata, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon forte laŭdis ĝin post rigardo kaj kuraĝigis la ĉefrolulinon kiel junan multpromesan artistinon. En 1962, kiam la venena baledo *La Fontano de Bahĉisaraja Palaco* sursceniĝis, tiu ĉi plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon denove ĝin aprobis. En 1963, post sia rigardado al la baledo *Cigna Lago* li iris sur la scenejon por speciale esprimi sian dankon al la gedancistoj. En 1964, por malhelpi la torenton de la granda kultura revolucio, li senskrupule kriaĉis, ke baledo ne devas esti reformita, kaj oni devas ĉiam senŝanĝe konservi ĝiajn fremdlandajn trajtojn kaj imiti ilin ĝis la plej lasta detalo.

Prezidanto Maŭ diris: "Multaj komunistoj fervore pledas por la arto de feŭdismo kaj kapitalismo, sed ne por tiu de socialismo. Ĉu tio ne estas afero strangega?" La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas ĝuste tia homo, kiu amas kion amas la burĝaro, kaj revivigas feŭdismon kaj kapitalismon per la korpo de mortintoj kaj fremduloj sur la scenejo en socialisma Ĉinio por krei kontraŭrevolucian publikan opinion por la restarigo de kapitalismo kaj freneze ataki la Partion kaj socialismon.

Kiel la ĉielskua printempa tondro, fine venis la tago, kiun ni jam delonge atendis. En la printempo de 1964, kamaradino Giang King mem gvidis la revolucion en baledo kaj kondukis en nian trupon la ruĝan linion de literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ. La hela lampo kun ora brilo — la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ montris al ni la direkton de antaŭenmarŝo. **Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Ni ja ne rifuzas utiligi la literaturajn kaj artajn formojn de la pasinteco, sed kiam ili venas en niajn manojn kaj estas reformitaj kaj plenigitaj per nova enhavo, ankaŭ ili fariĝas io revolucia kaj servanta al la popolo."** Ni devas decideme aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, reformi la artformon de baledo, kiu devenis el Eŭropo, "utiligi la fremdajn en servo al Ĉinio", kaj fari ĝin proleta arto, **"kreita por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj utiligata de ili".**

Sed, la reakciuloj absolute ne volas forlasi tiun ĉi batalpozicion. Kaj ĉirkaŭ la revolucio de baledo komenciĝis intensa klasa lukto por depreno kaj repreno de potenco inter la proletaro kaj kontraŭrevolucia reviziismo.

Unue, en la elekto de la dramo, la kontraŭrevolucia reviziisto Lin Mohan tuj proponis por tio *Daĝi kaj Ŝia Patro*, kiu propagandas la burĝan homecon, por konduki la reformon de baledo sur eraran vojon. En tiu grava momento, kamaradino Giang King firme tenis la ĝustan direkton de la revolucio kaj decidis neŝanceleble provludi *Ruĝan Virinan Taĉmenton*, kiu prezentas la penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito. Kaj ilia intrigo estis frakasita. Dum la provludado, ili ankoraŭ uzis malnoblajn artifikojn por rezisti kaj subfosi la kreadon de la revolucia baledo. Sed la *Paroladoj* estas nia ideologia armilo, kiu kuraĝigis nin batali kontraŭ la nigra, kontraŭrevolucia, reviziisma linio de literaturo kaj arto. Ĉiam, kiam ni renkontis malfacilojn en la kreado, laŭte sonis al ni la voĉo de Prezidanto Maŭ: iru inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, **"iru en la solan, plej vastan kaj plej riĉan fonton".** Li instruas al ni, ke ni nepre devas lerni de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vere transigi nian starpunkton al ilia flanko en la procezo de nia enprofundiĝo inter ilin. **"Nur tiamaniere ni povos havi literaturon kaj arton vere por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vere proletajn."** En la nelonga tempo, dum kiu nia tuta trupo servis kiel soldatoj en iu roto, ŝanĝiĝis en certa grado niaj ideologio kaj sento. Estis la ora ŝlosilo de la penso de Maŭ Zedong, kiu malfermis la pordon al arta kreado de la *Ruĝa Virina Taĉmento*. Post kelkmonata luktado, la baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* fine trarompis la malhelpadojn kaj subfosadojn fare de la kontraŭrevoluciaj reviziistoj kaj sukcesis sursceniĝi.

Por ni estas ĉiam neforgesebla la 8-a tago de oktobro de 1964, en kiu la ruĝa suno lumigis la baledan scenejon. Nia plej plej estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ rigardis la prezentadon de la *Ruĝa Virina Taĉmento*. Tio ja estas la plej feliĉa momento en nia tuta vivo. Ni je miloj kaj miloj da fojoj kriadis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Longe vivu Prezidanto Maŭ!" Post la rigardo de la prezentado, li varme jesis la revolucian direkton de la baledo kaj alte taksis la baledon *Ruĝa Virina Taĉmento*: **"Ĝia direkto estas ĝusta, la revoluciigo estas sukcesa, kaj ankaŭ ĝia arto estas bona."** Sed en la sekvanta mateno post

la tago, en kiu Prezidanto Maŭ rigardis la baledon, la kontraŭrevolucia reviziisto Lin Mohan urĝeme venis al nia trupo. Li prisilentis la plej altan instrukcion de Prezidanto Maŭ pri la *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj malice kalumniis ke la "*Ruĝa Virina Taĉmento* povas kompari nur kun sucinfano en vindo," ke "malbela bofilino finfine devas veni antaŭ la bopatrinon" ktp, provante nuligi la grandegan politikan influon de la rigardo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la prezentado. Sed la voĉo de Prezidanto Maŭ estas neenfermebla. La pritakso de Prezidanto Maŭ donis pezan baton al la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj liaj sekvantoj. Ja estas Prezidanto Maŭ, kiu liberigis nin el la kateno de la nigra, kontraŭrevolucia, reviziisma linio de literaturo kaj arto. Ja estas Prezidanto Maŭ, kiu donis al ni senliman forton. Ni nepre kondukos la revolucion en baledo ĝis la fino.

La baledo *Ruĝa Virina Taĉmento*, brilanta per la penso de Maŭ Zedong, finfine trarompis ĉiajn barojn de la malamiko kaj montris sin antaŭ la publiko! Laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj varme bonvenigis la prezentadon de la *Ruĝa Virina Taĉmento*. Iu laboristo diris: "Tio estas la unua fojo en la mondo, ke laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj fariĝis mastroj de la baleda scenejo. Ke ni laboristoj povas fariĝi tiaj kiel hodiaŭ, tion ni dankas al la saĝa gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ ne nur liberigis nin en politiko kaj ekonomio, sed nun ankaŭ en literaturo kaj arto. Ni ĉiam krios, ke vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!!" Ankaŭ la revolucia popolo de la tuta mondo alte taksas la *Ruĝan Virinan Taĉmenton*. Ekzemple, rigardinte ĝian prezenton, iu japana amiko diris al ni: "Vi kreis baledon per la penso de Maŭ Zedong, kaj la *Ruĝa Virina Taĉmento* estas kreita laŭ la spirito de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ. Rigardante baledon, oni ne nur aprezas la dancadon, sed ĉefe la ideologian enhavon. La baledo de Ĉinio havas altan ideologian kvaliton, kaj ĝi estas ankaŭ modelo de naciigado. Estonte, por lerni baledon, oni devos veni al Ĉinio. Post reveno al nia hejmlando, ankaŭ ni enprofundiĝos en la mezon de la popolamaso kaj lernos la penson de Maŭ Zedong."

La sukcesa kreado kaj prezentado de *Ruĝa Virina Taĉmento* estas venko de la penso de Maŭ Zedong, venko de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj venko de la revolucia linio de literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ! Ĝi deklaris la okupon de la baleda scenejo fare de la herooj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj la porĉiaman pason de la tempo, en kiu la ekspluataj klasoj regis la baledan scenejon! Ĝi donis baton sur la kapon de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. La intrigo de plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj por vane malhelpi la reformadon de baledo kaj la nigra, kontraŭrevolucia, reviziisma linio de literaturo kaj arto bankrotis!

La Ruĝa Virina Taĉmento en ekzercado



BEJ HIN:

La Revolucia Sturmanto Guo Giahong



La martiro Guo Giahong

SUB la nutrado de la penso de Maŭ Zedong, milionoj kaj milionoj da junaj proletaj revoluciaj sturmantoj en nia lando maturiĝas sane kaj rapide.

Ĉisube ni prezentos al vi unu proletan revolucian sturmanton, homon senegoisman.

LUKTO KONTRAŬ FAJREGO

Je dek minutoj post la kvina, posttagmeze de la 19-a de januaro, 1967, subite brulegis iu konstruejo en Pekino pro malatenteco.

Servi al la popolo estas la plej alta devo por ĉiu en la granda epoko de Maŭ Zedong. La fajrolumo estas ja ordono al batalo. Ekvidinte ĝin, homoj kolektiĝis de ĉiuj direktoj, sturmante al la fajromaro, kaj formis kune kun la armeanoj de PLA tie laborantaj potencan bataltrupon, por arde lukti sinforgeseme kontraŭ la fajrego, surgrimpante suprajojn de la laborbudegoj de la konstruejo kaj sinjetante al fosajoj por fundamentoj.

En la kriza momento por savi la varmtenan budegon, jen alsturmis de sude iu junulo. Lia vatita vesto jam antaŭe estis demetita, kaj li estis nur en blua soltavola vesto plene makulita per fumajo kaj koto. Por fortiri la kovran tukegon n-ro 3 sur la budego disde la brulanta kovra tuko n-ro 2 kaj rompi la fajrovojon, li laŭte kriis: **"faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon"**, kaj samtempe detiris la angulon de la kovrotukego n-ro 3 drate ligitan kun la brulanta kaj ĝin rapide ekvolvis, kion alia fajroestinganto Teng Liangven, vicplotonestro de iu trupo de PLA, intencis sed ne povis de la alia flanko. La vento blovis la flamojn, kaj krakante bruliĝis la ĉarpentajo de la varmtena budego. La flamoj minacis la junulon kaj ruĝe briligis lian vizaĝon plenan de juneco....

Subite, kliniĝis la budĉarpentajo en la fajrego.

"Ve, la budego falos, tuj retiriĝu!" iu kriegis el la fajrestingantoj sur la tero. Sed sonoris super la fajrokampo ankoraŭ laŭte la sono: **"faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon."**

La kovrotukego n-ro 3 fine estis detirita kaj kunvolvita, kaj la fajrovojo estis rompita. Sed

la ĉarpentaĵo de la varmtena budego brulrompiĝis kun bruego, kaj la alta korpo de la heroo kun ekflagro en la fajrolumo falis de la alteco de dek unu metroj. Unu staranta armatura stango de la murbazo puŝiĝis en lian koron. Lia freŝa sango fluadis sur la ĉefurban teron de li senlime amatan.

PLA-ano Su Ginman sagrapide alsaltis por lin tiri, kaj la heroo eklevis sian fortikan korpon kaj ree kuŝiĝis. Li etendis siajn manojn antaŭen kaj rigardis fikse al la fajrokampo, kvazaŭ dirante: "Ne zorgu min, sed rapide estingu la fajron!"

PLA-ano Lju Giaĝang kovris lian vundon per sia mano kaj kune kun la aliaj portis lin en aŭton por akompani lin al hospitalo.

Je kvardek minutoj post la kvina, kiam la nokta krepusko iom post iom falis, kaj la vento fariĝis pli frosta, la fajrego estis finfine estingita kaj la posedaĵo de la ŝtato sekurigita. Tamen, por ĉiam forlasis nin unu brava batalanto, kiu partoprenis la fajroestingadon!

Tiu martiro mortis pro la interesoj de la popolo kaj li mortis ja en ĝusta loko. Lia morto estas pli peza ol la monto Tajŝan.

Sed, kiu estas tiu bona filo de la popolo?

El la poŝoj de lia sangmakulita vatita vesto, oni trovis unu ekzempleron de ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, unu notkajeron, unu familian leteron kaj unu akuzoskribon.

El tiuj postlasitaĵoj oni sciiĝis, ke la martiro, kiu sin oferis pro la interesoj de la popolo, estis nomata Guo Giahong, dudek kvar-jaraĝa ĉijare, labortrupa estro de la laborareo por silkraŭpoj kaj morusarboj de Hiangŝan-a Hortikulturejo, Ĝengiang, Giangsu-provinco, kaj ke li estis ne nur heroo por savi ŝtatan posedaĵon, sed ankaŭ firma batalanto en la granda proleta kultura revolucio.

LA MATURIĜO DE LA STURMANTO

K-do Guo Giahong naskiĝis en familio de urba malriĉulo en Ĝengiang. En la damninda malnova socio, lia patro longe troviĝis en senlaboreco, kaj lia patrino dungiĝis kiel domservistino. La amaraj travivaĵoj de la gepatroj semis en lian koron ĝisostan malamon al la klasa malamiko.

Post la Liberiĝo de la hejmloko en 1949, Guo Giahong eniris en elementan lernejon. En la alta mezlernejo, li komencis atente studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. La penso de Maŭ Zedong lumigis lian koron kaj fariĝis movforto de lia progresado en politiko. Kaj en 1964, aktive respondante al la alvoko de la Partio farita al la junaj intelektuloj iri al montoj kaj kampoj por konstrui novan socialisman kamparon, li venis al la piedo de la monto Hiangŝan ĉe Jangzi-rivero, kune kun aliaj kunlernantoj en la supre menciita hortikulturejo.

K-do Guo Giahong sciis transformi sian ideologion per la penso de Maŭ Zedong kaj estis sturmanto en la laboro, kaj tial elektita kiel labortrupa estro en la laborareo por silkraŭpoj kaj morusarboj. Poste, li estis plie elektita kiel aktivulo de studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj progresinta produktanto de agrikulturo. Dum sia mallonga vivo, k-do Guo Giahong faris multajn kortuŝajn heroaĵojn.



Guo Giahong (la dua de dekstre) studas pri la kulturado de morusarboj kun aliaj gejunuloj de la laborareo de silkraŭpoj kaj morusarboj de Hiangŝan-a Hortikulturejo, Ĝengiang, Giangsu-provinco.

Iufoje k-do Guo Giahong iris al la laborareo por studi la demandon pri divido de la tero kulturebligota el fragmitejo. Por faciligi la administradon, oni dividis ĝin en du partojn orientan kaj okcidentan. La okcidenta parto, plena de sovaĝaj herbaĵoj, estas malfacile prilaborebla kun malbona grundo kaj malalta situo. Kiun parton li do akceptu? Li havis tian intensan batalon en sia kapo. Sed, li memvole akceptis la okcidentan parton, kiam li ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Ni iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj."**

Kiam li revenis al sia labortrupo kun la novaĵo, nemalmultaj kamaradoj grumblis ke li estas "malsaĝulo". Sed li diris: "Ni devas rezigni oportunaĵon favore al la aliaj kaj preni sur nin la pezan taskon. Nur tio estos gloro, se ni bone sukcesos sub malfavoraj kondiĉoj." Nun, tiu ĉi antaŭe virga tero jam fariĝis bone kulturebla, kaj la komunisma spirito de Guo Giahong gravuriĝis profunde en ĉies koro.

DUM LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO

En la 15-a de junio 1966, sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la laborareo por silkraŭpoj kaj morusarboj kaj la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la duonterkultura-duonlerna lernejo aktive sin ĵetis en la movadon de granda proleta kultura revolucio kaj faris firman batalon kontraŭ plenmano da potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, en la Partio de la laborareo por silkraŭpoj kaj morusarboj. Tiun tagon, k-do Guo Giahong elpaŝis sentime por prezidi la kunvenon por batali kontraŭ la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj irigis la kunvenon en bona ordo. Post la kunveno, li telefone raportis pri la farita batalado en la kunveno al la Ĝengiang-a Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la urba policejo.

Sed, plenmano da potenctenantoj en la urba komitato kiuj iras la kapitalisman vojon, inversigante pravon kaj eraron kaj konfuzante blankon kun nigro, eĉ kalumniis la revolucian agon de kunvoko de la kunveno fare de la amaso kiel "ribelecan kunvenon por restarigo de kontraŭrevolucio", kvalifikis Guo Giahong, kiu estis tutkore fidela al la Partio kaj ne timis oferi sian vivon pro la interesoj de la popolo, kiel "kontraŭpartiulon", kaj eĉ kontraŭleĝe tenis lin en mallibereco dum kvar monatoj kaj senigis lin je politikaj rajtoj.

Tamen, k-do Guo Giahong ne estis timigita de la blanka teroro de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj sub la helpado de aliaj revoluciaj kamaradoj, supervenkante obstaklojn post obstakloj, li dufoje veturis al Pekino por informi al la Grupo de Kultura Revolucio de la Centra Komitato pri la stato de la granda proleta kultura revolucio en la urbo Ĝengiang.

Kaj li neniam forgesis la partian laboron eĉ en la tagoj kiam li estis en mallibereco. Iun tagon, kiam li studis verkon de Prezidanto Maŭ sidante en la ĉambreto, en kiu oni lin "malliberigis". Subite iu kriis ekstere: "Fajro en la silkraŭpa ĉambro. La elektra drato likas! Rapide malŝaltu la elektran kurenton!"

K-do Guo Giahong levis la kapon por rigardi tra la fenestro kaj vidis, ke fajro flagras en la silkraŭpa ĉambro kaj fumo eliĝas el ĝi. Kiel la senegoisma batalanto Guo Giahong povus lasi la popolan posedaĵon perdiĝi senfare? Li forgesis ke li estas en "mallibereco", tuj kuris el la ĉambreto al la ŝaltilo instalita en angulo de la silkraŭpa ĉambro kaj malŝaltis la elektran kurenton. Poste, li kuris en la silkraŭpan ĉambron kune kun aliaj por estingi la fajron.

Kaj dum la tagoj, kiam nigraj nuboj portempe kovris la ĉielon, k-do Guo Giahong ja ankoraŭ atenteme tralegis de la komenco ĝis la fino la kvar volumojn de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. Li diris firme: "Ni estas subtenataj de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio.... La venko apartenos al ni!"

Finfine realiĝis la deziro de la revolucia batalanto. Grandan venkon nun jam akiris la proletaj revoluciuloj de la urbo Ĝengiang en la batalo por vaste unuiĝi kaj depreni regpotencon de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. La plenmano da potenctenantoj en la urba komitato de la Partio kiuj iras la kapitalisman vojon jam estis faligita. La nova revolucia urba komitato jam deklaris solene ke la martiro k-do Guo Giahong estas firma proleta revolucia batalanto, kaj akceptas lin postmorte kiel plenrajtan membron de la Komunista Partio de Ĉinio laŭ lia antaŭmorte esprimita deziro kaj faritaj agoj.

Senfine kaj ŝvele torentas la riverakvo, kaj smeralde verdas la morusarbaro. K-do Guo Giahong falis en la fajrokampo, firme farinte sian lastan paŝon de vivmarŝado, sed sub la instigo de lia heroaĵo, sennombraj proletaj revoluciuloj nun kuraĝe antaŭen marŝas!



Ĉen Jongkang selektas rizsemojn.

Ĉen Jongkang—Kamparana Specialisto de Rizkulturado

HINNONG

EN aŭgusto de 1964, kiel ĉina kamparana specialisto de rizkulturado Ĉen Jongkang suriris la katedron de la Pekina Scienca Simpozio, en kiu partoprenis sciencistoj el 44 landoj kaj regionoj. Lia disertacio pri alta kaj stabila produkto de rizo *Tri Nigriĝoj kaj Tri Flaviĝoj* bazita sur la sperto, kiun li akumulis dum kelkdekjara penado kaj esplorado, gajnis varman aplaŭdon de liaj kolegoj-specialistoj. Nun post kelkjara disvastigo, la tekniko de tiu ĉi kamparana specialisto pri alta kaj stabila produkto de rizo spertis novan disvolviĝon kaj progreson dank'

al la praktiko de la amasoj kaj estas disvastigata tra la rizproduktaj regionoj en la tuta lando, elire el Giangsu-provinco, kie li laboras. Li faris grandegan kontribuon al la akcelado de alta kaj stabila produkto de rizo en grandaj areoj.

PERLO EL SUB LA TERO

Ĉen Jongkang devenas de familio de farmanta mezkamparano. Jam antaŭ pli ol tridek jaroj li ekhavis grandan intereson pri selektado de rizsemoj. Laŭ la spertoj de la patra generacio kaj samlokanoj li ĉiujare elektis 4-5 bonajn spikojn por ilin aparte rikolti kaj konservi post ilia maturiĝo. El tiuj li selektis la pli bonajn. Laŭ tiu maniero de "selekto per sola spiko", Ĉen Jongkang elkulturis post multjara praktikado la altproduktan specion de malfrua rizo "Laŭlajĉing". Sed, en la malnova socio, kvazaŭ enterigita perlo tiu spertoriĉa terkulturisto ne nur ricevis nenian atenton kaj subtenon, sed male tiris al si pli pezan ekspluaton. Tiam, la familio de Ĉen Jongkang farmis teron de bienulo. En la unua jaro, t. e. en la jaro, kiam li ekkulturis la specion "Laŭlajĉing", la bienulo loĝanta en urbo venis al la kamparo por pritaksi la rikolton antaŭ falĉado. Vidante, ke la rizplantoj de Ĉen Jongkang kreskas tre bone, li insistis pri plialtigo de la terrento. Ankaŭ lokaj oficistoj kaj kanajloj venis lin ĉantaĝi. Rezulte, la riĉa rikolto fariĝis por li plago!

La Liberiĝo venis! Kiel ĉiuj aliaj kamparanoj de la tuta lando, Ĉen Jongkang suprenturniĝis kaj fariĝis mastro de la tero. En la socialisma socio, li, perlo longe enterigita de la malnova socio, fine elteriĝis kaj pli rapide kreskas sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong. En 1951, Ĉen Jongkang estis honore titolita kiel tutlanda modelo de altprodukto de rizo per sia atingo de pomua produkto de 700 kilogramoj kaj vidis nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ! En 1954, li estis elektita kiel membro de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj, kaj en la sama jaro, en la antaŭvespero de la "Festo de 1-a Julio" li aliĝis al la granda Komunista Partio de Ĉinio. En 1958, la Partio transpostenigis lin, kiel esploriston en la Giangsu-a Filio de la Ĉina Akademio de Agrokulturaj Sciencoj. Ĉen Jongkang ofte diras kun profunda kortuŝo: "Sen la granda Partio, sen la sunbrilo de la penso de Maŭ Zedong, ne estus mi, Ĉen Jongkang, kaj disvastigo de mia sperto de rizkulturado."

KURAĜA ANTAŬENMARŜADO POR REVOLUCIO

Estas la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj faris Ĉen Jongkang, laboreman kaj simplan kamparanon, proleta revolucia batalanto; kaj estas la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj faris Ĉen Jongkang, kotkrurulon, sciencisto. Sed Ĉen Jongkang neniam memkontentiĝis pro sia atingo kaj honoro. La "tri malnovaj artikoloj" de Prezidanto Maŭ direktis lin ĉiam antaŭen. Li ofte diradis al aliaj: "Estante fremdulo, Bethune tutkore kaj plenanime servis al la ĉina popolo; kiel membro de la Komunista Partio de Ĉinio mi devas esti des pli tutkora por la popolo kaj revolucio kaj strebadi ĉiam al pli alta nivelo en tekniko, kiel faris Bethune.

Kion li diris, tion li ankaŭ faris.

"Tri nigriĝoj kaj tri flaviĝoj" estis la ĉefa sperto de Ĉen Jongkang por alta kaj stabila produkto de rizo. Tamen antaŭ ol li alvenis al la Giangsu-a Filio de la Ĉina Akademio de Agrokulturaj Sciencoj, li sciis nur, ke la folia koloro de "Laŭlajĉing" nigriĝas kaj flaviĝas en certaj tempoj, kaj ke post kelkaj tiaj ripetiĝoj oni akiros certe riĉan rikolton. Tamen li ne sciis, kial la rizo travivas tiujn ŝanĝojn en sia kreska periodo. Tial lia sperto ne nur estis malfacile lernebla por aliaj personoj, sed ankaŭ estis malfacile aplikebla por li mem al alia rizspecio aŭ en alia regiono. Pro tio en la daŭro de pli ol kvardek jaroj antaŭ 1958, li nur trifoje akiris rikolton de pli ol 500 kilogramoj po muo. Post kiam li alvenis al Giangsu-a Filio de la Ĉina Akademio de Agrokulturaj Sciencoj, la Partio havigis al li bonegajn kondiĉojn, kaj tie li akiris multajn sciencajn sciojn, kiuj estis nekonataj por li antaŭe, kaj faris diversajn eksperimentojn sub la helpo de agronomoj. Pli grave estis, ke en tiu periodo li sukcesis venki la malfacilon de sia nesufiĉa legoscio kaj ripetade studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*. La brila penso de Prezidanto Maŭ **"eltrovi veron per praktiko kaj plie per praktiko pruvi kaj disvolvi la veron"** donis al li grandan inspiron. Nun, li scias ne nur la signifon de la nigriĝo kaj flaviĝo de rizfolioj, sed ankaŭ scias difini laŭ la nombro de folioj, kian kreskan periodon la plantido atingis, en kia koloro oni devas ĝin teni kaj kian sterkon aldoni. Tiamaniere, lia sperto de altprodukto de rizo disvolviĝis en sisteman sciencon de rizkulturado en la libro *Sperto de Ĉen Jongkang pri Alta Produkto de Rizo*, kiu deesence malkaŝas leĝojn de la kreskado de rizo, pluapaŝe eksplikas la sciencajn argumentojn pri "tri nigriĝoj kaj tri flaviĝoj" kaj ebligis ke la regiono, kie Ĉen Jongkang profundiĝis en konkretajn laborojn kaj kies rizkulturadon li gvidis, daŭre kreis grandareajn kaj altproduktajn rekordojn de pli ol 500 kilogramoj da rizo po muo. Iu fiziologo de plantaĵoj, kiu kulturis kune kun Ĉen Jongkang dum multaj jaroj altproduk-

tajn eksperimentajn kampojn, diris: "Estas nemalofta la pomua rikolto de 500 kilogramoj da rizo tiel en Ĉinio kiel ankaŭ en eksterlando. Tamen malfacila kaj valora estas tio ke Ĉen Jongkang povas esti tiel certa kaj memfida pri rikolto de pli ol 500 kilogramoj da rizo po muo en malsamaj grundoj kaj sub malsamaj kondiĉoj kaj havas tian kompletan kaj perfektan teknikon de rizkulturado!"

Ĉen Jongkang tiel konas la rizplanton, kiel la patrino sian infanon. Oni diras ke Ĉen Jongkang kvazaŭ "povas interparoli" kun la altprodukta rizspecio "Laŭlajĉing", kiun li elkulturis post multjara penado, sed, en 1964, Ĉen Jongkang ĉie propagandis novan rizspecion nomatan "Nongken N-ro 58", kiu estas pli sterkotolerema, nekliniĝema kaj pli adaptiĝema ol "Laŭlajĉing", kaj li persone portis la novan specion al iu brigado en la regiono de la lago Tajhu en Giangsu-provinco por tie kulturi eksperimente. Mirigite iuj demandis lin tiutempe: " 'Laŭlajĉing' estas altprodukta specio elkulturita de vi post penado de multaj jaroj, ĉu vi ne bedaŭras anstataŭigi ĝin nun per nova specio?" Ĉen Jongkang serene respondis: "Krei novan specion ja celas altigi produkton. Por utili al la revolucio, kio persona estas bedaŭrinda?"

Ĝuste ĉar Ĉen Jongkang sin dediĉas tutkore al la revolucio, nur en la daŭro de unu jaro, kune kun aliaj agronomoj li resumis el la spertoj de la amasoj kaj sia propra praktikado kompletan, novan teknikon por alta pomua produkto de 500 kilogramoj de "Nongken N-ro 58". Ekde 1965, tiu nova tekniko floras ĉie en la regiono de Tajhu.

LA KARAKTERIZAĴO DE LABORULO

"Kotkrurulo fariĝis sciencisto, kaj la sciencisto restas ankoraŭ kotkrurulo." Jen per tio oni laŭdas Ĉen Jongkang pro lia nobla virto de ĉiama konservo de amo al laboro kaj simpleco en vivado.

Post kiam Ĉen Jongkang fariĝis esploristo, li same kiel antaŭe faras fizikan laboron kune kun la komunumanoj. Kien ajn li venas, li ĉiam faras sarkadon ĉe vido de herboj kaj ankaŭ ĉiajn laborojn, kiuj atendas plenumon. Li ne nur faras la akvokampajn laborojn, kiaj transplantado, sterkado kaj sarkado, sed ankaŭ helpas en konstruado de kajo kaj vojo kaj riparado de domoj por komunumanoj kaj cetere ofte purigas komunan necesejon en loĝejo. Ĉie ajn li estas, li donas al aliaj profundan impreson. Li ofte diras: "Sen partopreno de fizika laboro kaj izolante sin de produktado, oni fariĝos mallaboremaj kaj apartigos sin de la amasoj kaj de praktiko. Kiel oni povus fari sciencan esploradon fariĝinte tiaj homoj!"

Ĉen Jongkang ĉiam metas sin inter la amasojn. Ankaŭ en vestaĵo li neniom diferencas de ordinaraj kamparanoj. Pro tio ke li simple vestas sin, kutime kun supren falditaj pantalontuboj kaj nudaj piedoj, ofte okazis inter kamparanoj en la regiono de Tajhu tia ridindaĵo: Multaj homoj kolektiĝis antaŭ la vilaĝo por bonvenigi Ĉen Jongkang, kiu estis venonta por konsili ilin en rizkulturado. Kiam vilaĝanoj malpacience diskutis, kial Ĉen Jongkang ankoraŭ ne alvenas, fakte li jam antaŭlonge alvenis kaj trairis la svarmon al la akvokampoj por observi la rizplantojn. Oni ne atendis, ke la kamparano kiu iris antaŭ ili kun nudaj piedoj estas ĝuste la fame konata kamparano-sciencisto Ĉen Jongkang, kiun ili tiom sopire atendis.

ZORGO PRI ŜTATAJ AFEROJ

En 1966 komenciĝis la granda movado de proleta kultura revolucio!

Ĉen Jongkang, kiu tiam laboris super la modela kampo de alta produkto de rizo en Vangting-komunumo, Vuhian, Giangsu-provinco, neniel povis elteni la boladon en sia koro. Firme sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"Vi devas zorgi pri ŝtataj aferoj kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino"**, li aktive partoprenis tiun ĉi grandan revolucian batalon.

En la granda proleta kultura revolucio, Ĉen Jongkang cerbumis pri la pripensinda demando: Kial en la tempo kiam la Partio tiel alte atentas lian sperton pri alta produkto de rizo kaj la vastaj kamparanaj amasoj tiel varme lin bonvenigas, li ne ricevas adekvatan atenton ĉe iuj gvidantoj kaj la burĝaj reakciaj "aŭtoritatuloj" en sia instituco? Ili eĉ senkaŝe diris: "Oni ne devus transpostenigi Ĉen Jongkang en la Giangsu-an Filion de la Ĉina Akademio de Agrokulturaj Sciencoj en jaro 1958."

Kial ili tiel antipatias al Ĉen Jongkang kaj lia sperto pri alta produkto de rizo? Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"En nia lando la ideologia lukto inter socialismo kaj kapitalismo por decidi, kiu venkos kaj kiu malvenkos, bezonas ankoraŭ sufiĉe longan tempon por esti fine solvita. La kialo estas, ke la influo de la burĝaro kaj de la intelektuloj devenintaj de la malnova socio ankoraŭ longe restos en nia lando, ĝi ankoraŭ longe restos en nia lando kiel klasa ideologio."** Ĉen Jongkang profunde eksentis, ke tio, kion ili oponas ne nur estas li sola, sed ankaŭ tio, ke la penso de Maŭ Zedong okupu la pozicion de agronomia esplorado kaj ke la laboruloj servigu agronomian esploradon al la socialisma agrikulturo. Pensante

pri tio, Ĉen Jongkang ne plu povis regi sian indignon en la koro. Per nerefuteblaj faktoj li senkompate malkaŝis iujn gvidantojn de la Giangsu-a Filio de la Ĉina Akademio de Agrokulturaj Sciencoj pri tio, ke ili adoras kaj konfidas burĝajn reakciajn "aŭtoritatulojn", propagandas la burĝajn ideojn pri famo kaj profito kaj praktikas burĝan linion en scienca esplorado; li profunde kritikis la reakciajn eldirojn kaj agojn de iuj burĝaj "aŭtoritatuloj", per kiuj ili malestimis kaj ekskluzivis la laboristajn kaj kamparanajn intelektulojn.

Per sia revolucia agado Ĉen Jongkang peze batis sur la vivgravan lokon de manpleno da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. La lastaj ne kuraĝis rekte rebati Ĉen Jongkang pro lia relative alta prestiĝo en la tuta filio, tamen ili aplikis malrektan kontraŭrimedon, kaŝante ofensivon en defensivo. Ĉen Jongkang havas ok disĉiplojn el kiuj la plejparto estas revoluciuloj kun la vorto "kuraĝo" en la kapo. Kaptinte kelkajn mankojn kaj erarojn de tiuj junuloj, aperintajn sur la vojo de ilia antaŭenmarŝado, ili ekscitis Ĉen Jongkang dirante: "Viaj disĉiploj malboniĝis en la granda kultura revolucio, vi devas helpi ilin por ke ili agu dece kaj ne malhonorigu vin per siaj eraroj!" Ili ja intencis utiligi Ĉen Jongkang por reteni la revoluciajn sturmantojn kaj disigi la revoluciulojn. Sed ekster ilia atendo, Ĉen Jongkang, kiu dekomence estis singardema kontraŭ ilia intrigo, respondis decideme: "Miaj disĉiploj aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj agas laŭ lia instrukcio. Ili estas vere revoluciaj ribeluloj kaj faris nenion malpravan. Mi subtenas ilin!"

La komuna revolucia celo solide unuigis Ĉen Jongkang kaj la revoluciajn laborantojn kaj oficistojn de la tuta filio en kuna batalo. Ili aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, zorgas pri ŝtataj aferoj, decideme protektas la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj ĵuras fari la Akademion de Agrokulturaj Sciencoj granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong kaj dediĉi sian energion dum la tuta vivo por konstrui novan socialisman kamparon.

Dank' al la aplikado de la sperto de Ĉen Jongkang pri rizplantado, oni havas riĉan rikolton sur vasta areo.





Ĝenerala Sekretario Djawoto (meze) faras resuman raporton en la kunveno.

La Kvina Plena Kunveno de la Sekretariejo de la Azi-Afrika Ĵurnalista Asocio Okazis en Pekino

LA Kvina Plena Kunveno de la Sekretariejo de la Azi-Afrika Ĵurnalista Asocio, kiu okazis en Pekino de la 15-a ĝis 17-a de junio, estis kunveno en kiu la aziaj kaj afrikaj ĵurnalistoj alte tenis la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj restis firme ĉe la revolucia linio de opono kontraŭ imperiismo kaj reviziismo kaj por la unuiĝo de Azio kaj Afriko.

La kunvenon ĉeestis la delegitoj de la landoj, kiuj estis la membroj de la sekretariejo, nome: Azanio (Suda Afriko), Cejlono, Ĉinio, Indonezio, Japanio, Malio, Pakistano, Tanzanio k. a. Ĝin ĉeestis ankaŭ Umar Said, direktoro de la Ĝenerala Oficejo de la Sekretariejo.

Djawoto, ĝenerala sekretario de la asocio, faris ĝeneralan raporton en la inaŭguro, kiu estis plena de varma atmosfero de batala unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj ĵurnalistoj. En sia raporto Djawoto diris, ke la mondo nun eniras novan epokon kun historia signifo, epokon de la penso de Maŭ Zedong, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo kaj la monda revolucio al plena venko.


Djawoto diris en la raporto, ke bonega estas la nuna situacio de la batalo de la popoloj de Azio, Afriko kaj la mondo kontraŭ imperiismo, la reakciuloj kaj moderna reviziismo. La popola batalo, precipe la popola armita batalo, flusas. La nuna, nova trajto de la kontraŭimperiisma batalo de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj kaj de la subprematai nacioj estas tio, ke popola milito estas aplikata kiel la sola rimedo por akiri veran sendependecon. Pli kaj pli multe da popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko suriris la vojon de popola milito montritan de Prezidanto Maŭ Zedong. La usona imperiismo jam trovas sin en sieĝo de la popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la ceteraj partoj de la tuta mondo. Menciante multajn faktojn, kiel ekzemplojn, li priparolis la fluson de la batalo de aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo estrata de Usono. Li diris, ke la revoluciaj popoloj en la nuna tempo pli akre sentas la bezonon starigi kaj firmigi vastan internacian unuecan fronton kontraŭ imperiismo estrata de Usono. Ĉi tiu unueca fronto devas ekskludi la sovetunian reviziismon, la komplicon n-ro 1 de la usona imperiismo.

Djawoto diris, ke jam malkaŝiĝis la naturo de reviziistaro estrata de la reviziisma gvida kliko de Sovetunio. Pli bone ol iam ajn antaŭe, la popoloj de Azio, Afriko kaj la ceteraj partoj de la tuta mondo konas nun la perfidulan naturon de la sovetuniaj reviziistoj. Ĉi tiuj perfidis marksismleninismon, kaj sekve perfidis ankaŭ la batalojn de la popoloj tra la mondo por nacia kaj socia liberiĝo. Pli kaj pli multe da homoj jam komprenas, ke por oponi imperiismon, oni nepre devas oponi reviziismon.

Djawoto varme laŭdis en sia raporto la penson de Maŭ Zedong kaj la grandan proletan kulturan revolucion de Ĉinio. Li diris ke Prezidanto Maŭ Zedong genie, kreive kaj komplete heredis, defendis kaj disvolvis la doktrinon de Marks kaj Lenin, kaj levis ĝin al tute nova stadio. Prezidanto Maŭ estas ne nur la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj la ĉina revolucio, sed ankaŭ la granda gvidanto de la monda popolo kaj la monda revolucio. La penso de Maŭ Zedong lumigas la vojon por la revoluciaj popoloj de la tuta mondo, precipe por la popoloj en la koloniaj, duonkoloniaj kaj duonfeŭdaj landoj. Ĝi estas la gvida principo kaj la plej akra armilo por opono kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj por konduko de batalo por naciliberigo kaj nacisavado, tial alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kaj ĝin studi, apliki kaj defendi estas absolute plenumenda tasko por la revoluciuloj kaj revoluciaj ĵurnalistoj. Li diris, ke la ĉefa celo de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, kiun Prezidanto Maŭ iniciatis kaj gvidas, estas garantii ke Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron. Ĝi akcelos la progreson de nia historio kaj malfermos novan epokon por la internacia proleta revolucia batalo. La venko de la granda proleta kultura revolucio, la venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong, pliapaŝe firmigis la pozicion de Ĉinio kiel la bastionon de la monda revolucio, kaj kuraĝigis kaj plifortigis la revoluciajn liberigajn movadojn en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

En la ĝenerala raporto Djawoto diris, ke A.A.Ĵ.A. estas revolucia organizo de aziaj kaj afrikaj ĵurnalistoj, kaj ĝia agado devas esti konforma al la revolucia linio de A.A.Ĵ.A. kaj servi al ĝi. Parolante pri la laboro kaj estontaj batalaj taskoj de A.A.Ĵ.A., li diris, ke A.A.Ĵ.A. devas organizi la aziajn kaj afrikajn ĵurnalistojn studi, apliki kaj propagandi la penson de Maŭ Zedong poi ĝin disvastigi inter la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj instigi ilin kuraĝi batali, kuraĝi venki kaj ribeli kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj.

Post studo pri la aktuala politika situacio kaj plena diskuto, la ĉeestantaj delegitoj unuanime aprobis la Ĝeneralan Raporton de la Ĝenerala Sekretario kaj unuanime adoptis la "Ĝeneralan Rezolucion pri la Aktuala Internacia Politika Situacio", "Rezolucion pri Vjetnamio", "Rezolu-



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj akceptas la reprezentantojn de diversaj landoj.

cion pri la Batalo de Araba Popolo", "Rezolucion pri Afriko" kaj "Rezolucion pri la Dua Konferenco de Aziaj kaj Afrikaj Ĵurnalistoj".

La Ĝenerala Rezolucio akceptita de la kunveno montras, ke la nuna estas tute nova epoko kun la penso de Maŭ Zedong kiel sia granda standardo. En tiu ĉi nova historia epoko, ĉiam pli alte tajdas la batalo de la tutmonda popolo kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj, kaj prospere disvolviĝas la popolaj armitaj bataloj en diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Bonega estas la situacio en la nuna tempo, kaj la monda revolucio estas sur la vojo al mondskala venko!

La Ĝenerala Rezolucio diras, ke Prezidanto Maŭ Zedong gvidas ĉiujn subprematajn popolojn kaj naciojn de la mondo marŝi antaŭen. Prezidanto Maŭ estas la estimata kaj amata granda gvidanto de la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo. La granda penso de Maŭ Zedong jam fariĝis potenca ideologia armilo kaj gvida principo por la popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la ceteraj partoj de la mondo en ilia batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj. La penso de Maŭ Zedong estas revolucia scienco kaj universala vero ĉie aplikebla.

La Ĝenerala Rezolucio diras, ke la granda proleta kultura revolucio iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ mem estas mondskua evento kun granda historia signifo kaj internacia graveco. Prezidanto Maŭ disvolvis kaj riĉigis la teorion de monda revolucio. La Ĝenerala Rezolucio montras, ke la potenca proleta kultura revolucio de Ĉinio akcelos la progreson de la homa historio kaj alkondukos novan epokon de monda popola revolucio. La Ĝenerala Rezolucio diras, ke la Plena Kunveno de la Sekretariejo de A.A.Ĵ.A. laŭdas kaj firme subtenas la grandan proletan kulturan revolucion de Ĉinio kaj konsideras ĝin kiel la sian.

Forte kondamnante la usonan imperiismon kaj la sovetunian modernan reviziismon pro ilia subpremado al la revoluciaj bataloj de la monda popolo, la Ĝenerala Rezolucio montras, ke la usona imperiismo estas la plej kruela malamiko de la aziaj, afrikaj kaj tutmondaj popoloj,


kaj la sovetunia moderna reviziismo estas la komplico n-ro 1 de la usona imperiismo kaj perfidulo de la revoluciaj popoloj de la mondo. Por batali kontraŭ imperiismo, estas nepre necese batali kontraŭ reviziismo.

La Ĝenerala Rezolucio esprimas, ke A.A.Ĵ.A. tutforte subtenas la vjetnaman popolon en ĝia batalo kontraŭ Usono, subtenas la batalon de la arabaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝia instrumento, Izraelo, kaj kontraŭ la komplico n-ro 1 de la usona imperiismo, la sovetunia moderna reviziismo, kaj subtenas la armitajn batalojn kondukatajn de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj la revoluciajn batalojn de la popoloj en ĉiuj landoj de la mondo.

La Ĝenerala Rezolucio diras, ke A.A.Ĵ.A. daŭre tenos alte la grandan standardon de oponado kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj, la moderna reviziismo de Sovetunio kaj ĉiuj reakciuloj. La Ĝenerala Rezolucio alvokas la aziajn kaj afrikajn ĵurnalistojn studi kaj apliki la penson de Maŭ Zedong, propagandi ĝin kaj helpi al la aziaj kaj afrikaj popoloj mastri ĝin por akceli la revolucian aferon en Azio kaj Afriko. La Ĝenerala Rezolucio alvokas al la aziaj kaj afrikaj revoluciaj ĵurnalistoj, ke ili staru en la unuaj vicoj en la revolucia batalo, uzu sian plumon kiel armilon por malkaŝi la krimagojn de imperiismo, reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj kaj kuraĝigi la popolojn de Azio kaj Afriko konduki revolucian batalon.

La kunveno proklamis ke la Dua Konferenco de Aziaj kaj Afrikaj Ĵurnalistoj okazos en la Ĉina Popola Respubliko en 1968.

La kunveno fermiĝis en varma manklakado kaj kriado de la sloganoj: Vivu la batala unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj popoloj! Vivu la batala unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj ĵurnalistoj! Vivu la revolucia unuiĝo de la monda popolo! For imperiismon! For reviziismon! Vivu la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio! Vivu la penso de Maŭ Zedong! Vivu Prezidanto Maŭ!



KULTURAJ OBJEKTOJ KAJ LIBROJ ESTAS ZORGE PROTEKTATAJ

Dum la granda proleta kultura revolucio, la revoluciaj amasoj de la institucioj, kiuj respondecas pri konservado de kulturaj objektoj kaj libroj en Ŝanhajo, pli bone laboras pri la protektado kaj prizorgado de la kulturaj objektoj, libroj, revoluciaj sanktaĵoj kaj restaĵoj.

La vastaj amasoj de revoluciuloj kaj junaj ruĝaj gvardianoj tre zorgas pri la kulturaj heredaĵoj, kiujn kreis la laboranta popolo de diversaj pasintaj generacioj. Kiam ili trovas antikvajn kulturajn restaĵojn, antikvajn arkitekturaĵojn aŭ ŝtonplatajn gravuraĵojn, ili tuj petas meminiciate la koncernajn instituciojn por ekspertizi kaj akcepti la trovaĵojn. Kiam popolkomunumanoj elterigas kulturajn objektojn dum konstruado aŭ ebenigado de grundo, ili propravole sendas ilin al la Muzeo de Ŝanhajo. La metalfandejoj kaj paperfabrikoj en Ŝanhajo ankaŭ intense kunlaboras proksime kun la institucioj kiuj zorgas pri konservado de kulturaj objektoj. Ĉiufoje kiam ili ricevas malnovajn bronzaĵojn kaj malnovajn librojn ili invitas koncernajn ekspertojn por ekspertizi, kaj tiel evitas senintencan detruon de granda kvanto da bronzaj objektoj kaj antikvaj libroj.

La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la institucioj kiuj zorgas pri konservado de kulturaj objektoj kaj libroj en Ŝanhajo profundiĝas en diversajn fabrikojn en la ĉirkaŭurbaj gubernioj kaj distriktoj de Ŝanhajo, por fari propagandon pri protekto de kulturaj restaĵoj kaj samtempe enketi pri la jam trovitaj antikvaj kulturaj objektoj kaj altvaloraj libroj. Multaj el iliaj kolektaĵoj estas revoluciaj dokumentoj kaj altvaloraj bronzaĵoj. Kelkaj valoraj bronzaĵoj kaj revoluciaj dokumentoj kaj libroj el Ming- kaj King-dinastioj estas trovitaj en metalfandejoj kaj paperfabrikoj. Inter ili troviĝas grenprunta atestilo (1934) de la Ĉina Soveta Respubliko, lernolibroj uzitaj de popolaj lernejoj en la soveta regiono de Fugian-, Ĝegiang- kaj Gianghiprovincoj, k. a. Ili ĉiuj estas signifoplena revolucia historia materialo.

En la tempo de kolektado de novye trovitaj antikvaj kulturaj objektoj kaj altvaloraj libroj, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la institucioj, kiuj zorgas pri konservado de kulturaj objektoj kaj libroj en Ŝanhajo, tenante la revolucion kaj stimulante la laboron, plibonigis ankaŭ la administran kaj konservan laboron de la kolektoj en siaj propraj institucioj por garantii ilian bonan staton.



Granda manifestacio de la patriotaj ĉinoj en Hongkong por protesti kontraŭ la perfortaĵoj de la brita imperiismo.

Niaj Samlandanoj en Hongkong Batalas kontraŭ la Perfortaĵo de Brita Imperiismo

GILIU

EKSPLODIS en Hongkong granda amasa movado por batali kontraŭ la sanga persekutado de la brita imperiismo. La britaj aŭtoritatuloj en Hongkong morte timas kaj malamas la progresadon de la granda proleta kultura revolucio de nia lando kaj la grandan influon de la penso de Maŭ Zedong kaj vane provas malhelpi ĉiurimede la propagandon de la penso de Maŭ Zedong. De majo ĉijare, en koluzio kun la usona imperiismo kaj Ĉiang-Kajŝek-aj banditoj, la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong pliintensigas sian frenezan kontraŭ-ĉinan agadon, grandskale subpremas kaj persekutas niajn samlandanojn en Hongkong per armita forto kaŭzante sangverŝojn. Sub la sanga persekuto fare de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong, miloj da laboristoj, junaj studentoj kaj lernantoj, ordinaraj loĝantoj kaj diversrondaj personoj estis kruele torturitaj (jam

estas pruvite ke 19 personoj estis mortigitaj pafe aŭ bate), pli ol du mil personoj estis arestitaj maljuste, inter kiuj pli ol mil estis kontraŭleĝe enketitaj, kondamnitaj kaj enkarcerigitaj. Tio estas nova sanga ŝuldo de la brita registaro al niaj 4 milionoj da hongkongaj patriotaj samlandanoj kaj 700 milionoj da ĉinoj kaj freneza provoko al la granda ĉina popolo. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj estas kuraĝaj kaj neflekseblaj en sia batalo kontraŭ la perfortaĵo de la brita imperiismo kaj decidis konduki ĝin ĝis la fina venko.

Nia ĉefministro Ĝoŭ Enlaj severe kondamnis la britan registaron kaj la britajn aŭtoritatulojn en Hongkong kaj firme subtenas la hongkongajn patriotajn samlandanojn en ilia heroa batalo kontraŭ perfortaĵo. Li diris: Hongkong kaj Giulong estas de ĉiam ĉina teritorio. Estas absolute nepermeseble al ĉiu ajn atenci la justajn rajtojn de niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj, precipe ilian sanktan rajton de studo kaj propagando de la penso de Maŭ Zedong. La ĉina popolo, kiu akiris grandan venkon en la mondskua movado de la granda proleta kultura revolucio, absolute ne povas toleri la britan imperiismon kruele persekuti ĝiajn hongkongajn patriotajn samlandanojn. La ĉina popolo decidis doni ĉiujn subtenojn al siaj hongkongaj samlandanoj laŭ la bezonoj de la situacio, ĝis ili akiros la finan venkon.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj diris plie, ke la sorton de Hongkong decidos niaj tieaj patriotaj samlandanoj kaj 700-miliona ĉina popolo, sed absolute ne manpleno da britaj imperiistoj. La brita registaro kaj la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong devas fariĝi pli klarmensaj. Se ili obstine ignoros la averton de la ĉina popolo kaj ĉina registaro, daŭrigos sian kruelan subpremadon kontraŭ niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj kaj obstine tenos sin malamike kontraŭ la ĉina popolo ĝis la fino, ili nepre ricevos pli grandajn punojn kaj devos respondeci pri ĉiuj el tio rezultontaj gravaj konsekvencoj.

PLENA MALKAŜIĜO DE LA KONSPIRO KONTRAŬ ĈINIO

La fabrikado de la nunaj grandskalaj faŝismaj sangaj perfortaĵoj estas delonge planita de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong. Ĝi estas konsistiga parto de la konspiro kontraŭ la ĉina popolo fare de la brita imperiismo en koluzio kun la usona imperiismo kaj la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek. En la pasintaj kelkaj jaroj, por subteni la usonan imperiismon kaj kunagi kun ĝi en ĝia agresa milito kontraŭ Vjetnamio, la brita registaro ĉiam metas Hongkong en servo al Usono kiel bazlokon por ĝiaj mar- kaj aer-armeoj en agresado kontraŭ Vjetnamio, spite al la forta opono de la hongkonga loĝantaro kaj la multfoja severa averto de la ĉina registaro. Ĝi permesis al la usona armeo kolekti en Hongkong materialojn kaj provizaĵojn bezonatajn en sia agresmilito kaj postfronta servo, fondi en Hongkong fabrikojn kaj entreprenojn koncernantajn militajn necesaĵojn kaj starigi en Hongkong grandan informan sistemon kaj spionajn institucionjn. La brita registaro cetere aktive sekvas Usonon por efektivigi la intrigon milite sieĝi Ĉinion kaj vane provas fondi kune kun la usona imperiismo kaj sovetia moderna reviziismo novan "Sanktan Aliancon" kontraŭ Ĉinio. Ĉiuj ĝiaj krimaj aktivadoj plene montras ĝian hontindan rolon de kunkrimulo de la usona imperiismo.

Precipe depost la komenciĝo de la granda proleta kultura revolucio de nia lando, same kiel ĉiuj aliaj imperiismoj, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, la brita imperiismo estas ege timigita de nia revo-

Laboristoj en Hongkong riproĉas la oficiston de la "Marafera Buroo", pro ŝtela deŝiro de sloganoj kontraŭ la britaj perfortaĵoj.





La laboristaro en Hongkong armita per la penso de Maŭ Zedong estas neterurebla. Jen laboristo maljuste arestata krias surstrate "Vivu Prezidanto Maŭ!"

lucio. Ĝi provas ĉiurimede limigi kaj bari la grandan influon de la granda proleta kultura revolucio de nia lando kaj subpremi la ĉiam pli leviĝantan kontraŭimperiismon kaj patriotan batalspiriton de niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj. Ĝi arbitre kaj maljuste limigas kaj malhelpas la vigle disvolviĝantan amasan movadon de studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj propagando de la penso de Maŭ Zedong, fare de niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj, vane provante estingi la flamojn de vero de la penso de Maŭ Zedong ekbruligitajn de la ĉina loĝantaro en Hongkong. En koluzio kun la reakciaj fortoj de Usono kaj Ĉiang Kaj-ŝek, ĝi plene funkciigas ĉiujn propagandajn maŝinojn kaj mobilizas ĉiujn hongkongajn reakciajn ĵurnalojn por venene priklaĉi kaj kalumnii nian grandan proletan kulturan revolucion. Ĝi rigardas la ĉinajn loĝantojn en Hongkong, kiuj portas kun si la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiel damnindajn herezulojn, kaj sovaĝe sendas policanojn kaj detektivojn por fari korpo-traserĉojn al la ĉinaj loĝantoj. Se estas trovata ĉe ili la libreto, ili estas tuj arestataj, enkarcerigataj kaj torturataj. La britaj aŭtoritatuloj en Hongkong persekutas eĉ la lernantojn en elementaj lernejoj, kiuj havas sur sia brusto insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ aŭ kun liaj vortoj, kaj ankaŭ la infanojn, kiuj kantas la kanton *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*. Ĉio ĉi tio montras ke la brita imperiismo tiel timas la penson de Maŭ Zedong, ĝuste kiel muso timas la sunan brilon. La britaj aŭtoritatuloj en Hongkong ankaŭ multfoje okazigis kontraŭĉinajn ekzercajn operaciojn de militaj kaj policaj fortoj, vane provante rezisti kontraŭ la granda influo de la granda proleta kultura revolucio de nia lando per subpremaj rimedoj. La fojo-post-foja fabrikado de grandskalaj sangaj subpremoj kaj persekutoj estas plena malkaŝiĝo de ilia krima plano.

FAŜISMAJ PERFORTAĴOJ ANTAŬE PLANITAJ KAJ ORGANIZITAJ

La sangaj eventoj fabrikitaj de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong por grandskale subpremi kaj persekuti niajn patriotajn samlandanojn per armita forto estas centpocentaj faŝismaj perfortaĵoj antaŭe planitaj kaj organizitaj. Tiuj eventoj frue komenciĝis per la senpera interveno de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong je la 6-a de majo en la disputon inter la laboristoj kaj

kapitalistoj de la Hinpugang-a Filio de Hongkonga Fabriko de Artefaritaj Floroj en la urbo Giulong. La administracio de tiu fabriko proklamis en aprilo severan regularon por intensigi sian ekspluatadon kaj subpremadon al la laboristoj kaj poste eksigis maljuste centojn da laboristoj el la ĉeffabriko kaj la filio. Por protekti siajn profesion kaj minimumajn vivkondiĉojn, la laboristoj sendis reprezentantojn por fari intertraktadon kun la administracio de la fabriko, sed ili estis rifuzitaj. Ili do povis fari nenion alian ol proteste manifestacii antaŭ la filio de la fabriko en sinsekvaj tagoj. Dum la manifestacio ili portis sur la brusto insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, alte tenis la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj laŭte kantis la kanton *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto.*

Vidinte tion, la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong estis tre teruritaj kaj sentis malamegon kontraŭ tio. En koluzio kun la administracio de la fabriko kaj post zorga planado kaj detala antaŭaranĝado, ili prenis la disputon inter la laboristoj kaj kapitalistoj de la fabriko kiel sian pretekston por elsendi pli ol 200 plene armitajn soldatojn, policanojn kaj perfortulojn kaj grandskale ĉirkaŭataki la laboristojn. Preskaŭ cent laboristoj estis vunditaj kaj 21 estis arestitaj. Vespere de tiu tago, ili plie arestis nemotiveble tri delegitojn de la Federacio de Kaŭĉukaj kaj Plastaj Sindikatoj de Hongkong kaj Giulong, kiuj alvenis al la polica oficejo por fari intertraktadon kaj proteston. Tion sekvis daŭre aliaj grandskalaj subpremoj kaj persekutoj kontraŭ la laboristoj. La 11-an de majo, la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong refoje subpremis freneze la laboristojn de la nomita fabriko en Hinpugang kaj personojn el diversaj rondoj en Hongkong kaj Giulong venintajn tien por subteni kaj konsoli la laboristojn. Pli ol cent estis arestitaj, kaj kiuj ricevis kruelajn batojn, estis nekalkuleblaj. Je la 12-a, 13-a kaj 17-a, la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong daŭre arestis senbride kaj batis kruele niajn patriotajn samlandanojn per la rimedoj de surprizatako, sieĝo k. a. fare de iliaj soldatoj, policanoj kaj perfortuloj. La 22-an de majo, ili eĉ sendis pli ol mil armitajn soldatojn, policanojn kaj perfortulojn por publike ĉirkaŭataki en la centra kvartalo de Hongkong la delegitojn el diversaj rondoj de Hongkong kaj Giulong, kiuj iris al la domo de la brita "Gubernatoro de Hongkong" por fari proteston. En la 8-a kaj 9-a de junio, ili sendis grandajn nombrojn da soldatoj, policanoj kaj perfortuloj de la "Kontraŭtumulta Polico" kaj faris novan subpremon al niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj. En tiu evento, estis mortigitaj Hju Tianpo, laboristo de la Inĝeniera Sekcio pri Elektraj Maŝinoj kaj Aparatoj de la Departemento por Publikaj Laboroj de Hongkong, Li Song kaj Zeng Ming, laboristoj de la Ĉina Gas-Kampanio Limigita de Hongkong. Krome kelkdek estis grave vunditaj kaj pli ol 500 arestitaj.

La 23-an de junio, la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong atakis armite la Federacion de Kaŭĉukaj kaj

"Ami la patrolandon ne estas kulpo, kaj estas prava la rezisto kontraŭ perforto." La tramistoj en Hongkong heroe batalis kontraŭ la malamiko pinto kontraŭ pinto kaj fine forpelis la "Kontraŭtumultan Trupon".



Plastaj Sindikatoj de Giulong kaj mortigis laboriston Deng Zikiang kaj du aliajn personojn. Je la 24-a ili plie armite subpremis la manifestaciantajn amasojn en Ŝatoŭgiaŭ de la "Nova Kvartalo", vundis kaj arestis pli ol dek personojn kaj senbride ĵetis larmobombojn en nian teritorion. La 8-an de julio, ili pliafoje fabrikis intence landliman eventon ĉe Ŝatoŭgiaŭ, en kiu ili mortigis unu manifestacianton kaj vundis ok aliajn. Ili eĉ pafis al nia teritorio trans la landlimo. Pro tio niaj gvardianoj repafis kontraŭ iliaj policanoj kaj membroj de la "Kontraŭtumulta Polico". Poste, ili des pli freneze pafmortigis niajn patriotajn samlandanojn, armite atakis, traserĉis kaj detruis pli ol dek institucioĵn inkluzive de sindikatoj, lernejoj kaj magazenoj de ĉinaj varoj, detruis la havaĵojn de niaj patriotaj organizoj, arestis strikantajn laboristojn, forkaptis raportistojn de Hinhua-a Novaĵagentejo kaj aliaj patriotaj ĵurnaloj, instruistojn kaj kinajn laborantojn kaj eĉ sendis plene armitajn soldatojn el siaj regulaj trupoj por sange subpremi niajn hongkongajn samlandanojn. Dum la pasintaj pli ol du monatoj, iliaj armitaj policanoj ankaŭ multfoje difektis senbride statuojn kaj portretojn de nia plej plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ, deŝiris bildojn kaj sloganojn propagandantajn penson de Maŭ Zedong. La brita imperiismo, fojon post fojo, pliigis siajn sangajn ŝuldojn kaj faris krimojn al la ĉinaj loĝantoj en Hongkong kaj al la 700-miliona ĉina popolo. Sango devas esti pagita per sango! Ju pli multe da ŝuldo, des pli multe da pago. Estas absolute neebla la provo eskapi de tio.

LA GRANDA ĈINA POPOLO NE ESTAS OFENDEBLA

La brita imperiismo estas malicega kolonia reganto de Hongkong kaj malamiko de niaj 4 milionoj da hongkongaj samlandanoj kaj de la 700-miliona ĉina popolo. De pli ol cent jaroj, tiu de la kapo ĝis la piedoj putriĝinta imperiismo kruele subpremas niajn samlandanojn en Hongkong kaj Giulong per armeo, polico, spionoj, tribunalo, malliberejo kaj aliaj rimedoj ĉiuj en ilia plej granda mezuro. Ĝi krome ĝisoste ekspluatas kaj prirabas niajn tieajn samlandanojn, tiel ke la vastaj amasoj de niaj samlandanoj tieaj falis en mizeron. Ĝi ankaŭ venenas kaj koruptas niajn tieajn samlandanojn per la plej putra kaj dekadenca okcidenta civilizacio. Unuvorte, ĝi faris en Hongkong ĉian malbonaĵon kaj havas sennombrajn sangajn ŝuldojn. Estas neeble elskribi ĉion.

Sed, la granda ĉina popolo ne estas ofendebla. **Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: "Ni ĉina popolo ja havas spinon." "Ni, la ĉina nacio, havas la spiriton sange batali kontraŭ la malamiko ĝis la fino."** Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj faras de pli ol du monatoj bravan, malcedeman kaj pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la nature kruela brita imperiismo. Por protekti sian nacian dignon kaj defendi la penson de Maŭ Zedong, ili faris firman decidon, timas nenian oferon kaj superos ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon. Ili estas bonaj idoj de nia patrolando, indaj je la nomo de bonaj batalantoj fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong.

Kun grandaj ondegoj, grandskale leviĝas en Hongkong amasa movado batalanta kontraŭ la sanga persekutado de la brita imperiismo. La 16-an de majo, por konduki la batalojn kontraŭ la persekutado sub unuigita gvido, niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj oficiale fondis la "Komitaton de Samlandanoj el Diversaj Rondoj en Hongkong kaj Giulong por Batali kontraŭ Persekutado de Britaj Aŭtoritatuloj en Hongkong". Poste, stariĝis unu post alia komitatoj por batali kontraŭ persekutado inter diversaj profesiuloj en Hongkong kaj Giulong, inkluzive tiujn de patriotaj laboristoj, studentoj kaj lernantoj, kolportistoj, kamparanoj, fiŝistoj kaj industriistoj kaj komercistoj. La indignaj kriadoj — "Patriotismo estas senkulpa! Batalo kontraŭ perfortaĵo estas prava!" — sonas tra la tuta Hongkong. Interligiĝis kaj unuiĝis la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, fiŝistoj, lernantoj, studentoj, instruistoj, kolportistoj, industriistoj kaj komercistoj. Grandskalaj protestmitingoj kaj manifestacioj leviĝis ŝtorme kaj disvolviĝas kiel amasiĝantaj nuboj. La opini-afiŝoj malkaŝantaj la kriman regadon kaj faŝismajn armitajn subpremojn faritajn de la brita imperiismo estas ĉie surgluitaj sur la stratoj kaj stratetoj, en urbocentro kaj ĉirkaŭurbo; eĉ la pordego kaj ĉirkaŭmuro de la domo de la brita "Gubernatoro de Hongkong" estas plene kovritaj per opini-afiŝoj. Aperis situacio de lavange kreskanta batalo. La 10-an de junio, la ĉinaj laboristoj de britaj institucioj kaj entreprenoj en Hongkong okazigis grandan aliancan strikon post rompo de diversaj obstakloj malnoble faritaj de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong. La 24-an de junio, 50,000 laboristoj de martrafiko, akvo- kaj ter-komuniko, publikaj servoj, dokoj kaj ĉefaj ŝpinejoj okazigis alian aliancan strikon, kiel donante novan fortan rebaton al la krima brita imperiismo. Sub la kuraĝigo de la heroa batalo de laboristoj, la industriistaj kaj komercistaj rondoj en Hongkong okazigis je la 29-a de junio protestan aliancan komercoĉesigon kontraŭ la brita imperiismo kaj ĝiaj perfortaĵoj, kaj en multaj lernejoj okazis lernostriko. Formiĝis grandioza revolucia armeo kun vasta unuiĝo kun ĉiuj kontraŭimperiismaj patriotaj fortoj kaj kun laborista klaso kiel sia ĉefa forto. Ĝi forte skuis la reakcian regadon de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong kaj donis ĉiam pli pezan baton al la brita imperiismo politike kaj ekonomie. Kaŭze de tiuj strikoj kaj komercoĉesigo la martrafiko de la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong preskaŭ kolapsiĝis, la surtera komuniko duonmortis, la ekonomio malordiĝis, la prezo de akcioj abrupte falis, kapitalo eksteren fluas, mono deponita en bankoj estas grandsume reprenata, la nombro de turistoj reduktiĝis kaj ekonomia krizo pliapaŝe disvolviĝas. Politike, la "aroganteco" de brita kolonia reĝimo en Hongkong estas plene frakasita kaj ĝia vera fizionomio de papera tigro estas ĝisfunde malkaŝita.

La britaj aŭtoritatuloj en Hongkong ne volas akcepti sian malvenkon kaj eĉ pli intensigis sian frenezan

subpremadon, kvazaŭ persekutata hundo provanta transsalti muron. Malgraŭ tio, la batalo kontraŭ persekutado de la brita imperiismo en Hongkong estas ne nur ne subpremita, sed fariĝis ĉiam pli impeta. La vicaro de batalantoj pli kaj pli vastiĝas kaj ĝia skalo pli kaj pli grandiĝas. Vizaĝe al la brita imperiismo en Hongkong armita ĝis la dentoj, niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj estas devigitaj disvolvi heroan memdefendan rebaton, okulo kontraŭ okulo kaj dento kontraŭ dento. Ili mobilizos pli vaste la amasojn kaj organizos ilin pli bone, por ĉiam pli firme daŭrigi la batalon kaj doni mortan baton al la brita imperiismo ĝis la fina venko.


La grandskala armita sanga subpremado kaj freneza persekutado fare de la brita registaro kaj la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong kontraŭ niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj vekis senkomparan indignon ĉe la 700-miliona ĉina popolo. La 15-an de majo, la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj de nia registaro sendis plej fortan proteston al la brita registaro kaj solene deklaris ke la ĉina registaro kaj la 700-miliona ĉina popolo decideme subtenas la heroan kaj justan batalon de la hongkongaj samlandanoj kaj ĵuras esti iliaj fortaj apogantoj. Ĝi severe postulis ke la brita registaro ordonu la britajn aŭtoritatulojn en Hongkong tuj akcepti ĉiujn justajn postulojn de la ĉinaj laboristoj kaj loĝantoj en Hongkong, ĉesigi ĉiujn siajn fašismajn arangojn, liberigi ĉiujn arestitojn, puni krimulojn, peti pardonon de suferintojn kaj kompensi iliajn perdojn kaj garantii ke similaj aferoj neniam reokazos. La 26-an de junio, nia registaro sendis noton al la brita registaro por fari al ĝi seriozan averton. La noto montras, ke la serioza situacio en Hongkong estas fabrikita centpocente de la brita registaro kaj la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong. Se la britaj aŭtoritatuloj en Hongkong ne volas aŭskulti la averton de la ĉina registaro kaj la ĉina popolo kaj daŭre persekutos niajn hongkongajn samlandanojn, ĝi povos nur pliseriozigi sian krimon. La sangaj ŝuldoj de la brita registaro al la ĉinaj loĝantoj en Hongkong devas esti pagitaj. Estas absolute neeble eskapi de tio.

De du monatoj, nia popolo en urboj kaj vilaĝoj okazigis grandiozajn mitingojn kaj manifestaciojn tra la tuta lando por protesti kun indigno kontraŭ la fašismaj kruelaĵoj de la brita aŭtoritato en persekutado al niaj hongkongaj patriotaj samlandanoj. La revoluciaj laboristoj, kamparanoj, junaj ruĝaj gvardianoj kaj aliaj revoluciaj amasoj en Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj grandaj urboj, ĉiuj montris ke la sangaj ŝuldoj de la brita imperiismo al niaj samlandanoj en Hongkong kaj Giulong nepre devas esti pagitaj. La 700-miliona ĉina popolo, armita per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, absolute ne timas la britan imperiismon, tiun paperan tigron, putran kaj dekadencan, aspekte fortan sed interne sensukan. Ni estas plene pretaj por subteni per efektivaj agadoj niajn hongkongajn patriotajn samlandanojn en ilia batalo kontraŭ la perfortaĵo de la brita imperiismo.

La sorton de Hongkong decidos niaj tieaj patriotaj samlandanoj kaj 700-miliona ĉina popolo, sed absolute ne la brita imperiismo putra kaj dekadenca.

Nepre venkos la granda ĉina popolo! Nepre malvenkos la brita imperiismo!

Granda armeo el patriotaj ĉinoj de laboristaj, kamparanaj, komercistaj, lernantaj k. a. rondoj en Hongkong manifestacias en sinsekvaj tagoj kontraŭ la fašismaj krimagoj de la brita imperiismo en Hongkong.




Giaŭ Julu


La multfoja fluej-ŝanĝiĝo kaj superakvegoj de la Flava Rivero en la historio postlasis en Lankaŭ-gubernio de Henan-provinco tri malutilaĵojn, nome grandan spacon da sablejo, salalkalecon kaj facilan pluvinundeblecon de la tero. En 1962, serioza natura katastrofo denove minacis Lankaŭ. Ĝuste en tiu tempo la Partio sendis kamaradon Giaŭ Julu al Lankaŭ kiel sekretarion de la Gubernia Partia Komitato, por gvidi la popolon de la tuta gubernio transformi la naturon kaj konstrui novan Lankaŭ.



1. Kamarado Giaŭ Julu venis al Lankaŭ kun la trezoraj verkoj de Prezidanto Maŭ.



2. "Sengusta estas pano jam maĉita de alia", diris Giaŭ Julu, kaj li volis persone pesi, kiom pezaj estas efektive la "tri malutilaĵoj" de Lankaŭ (pluvinundo, sablovento kaj salalkaleco).



3. Li suferis de serioza malsano en hepato. Tamen, trempante sin en inunda fluo, li desegnis pecon post peco mapon pri la fludirekto de la inundo.




4. Jam estis profunda nokto. Giaŭ Julu ankoraŭ studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj cerbumis, kiel mobilizi la amasojn por lukti kontraŭ la katastrofoj.



5. Giaŭ Julu kune laboris kaj veršis sian koron unu al la alia kun la amaso.



6. Giaŭ Julu havis profundan klasan amon por malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj. Li sincere amikiĝis kun la maljuna bredisto, kiu estis malriĉ-kamparano.



7. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, Giaŭ Julu starigis modelon de avangarda laboranto por antaŭenpuŝi diversajn laborojn.



8. En neĝventego Giaŭ Julu iris viziti maljunajn malriĉ-kamparanojn kaj malsuperajn mez-kamparanojn. Li diris al ili: "Prezidanto Maŭ sendis min por vin rigardi!" "Mi estas via filo."



9. Giaŭ Julu intime interparolis kun studentoj. Li kuraĝigis ilin enradikiĝi inter la amasojn kaj ŝanĝi la fizionomion de Lankaŭ.



10. Ne eblas fermi la okulojn post la morto, sen subjugigi la "tri malutilajojn". Malsane kuŝante sur la lito, Giaŭ Julu ankoraŭ tutkore pensis pri la tero kaj popolo de Lankaŭ.



Batalboato de Surakvaj Gerilanoj


Ĉi tiu bildo montras unu el la batalboatoj, kiujn la surakvaj milicanoj de Bajjangdian, Hebej-provinco, uzis en la tempo de Kontraŭjapana Rezistmilito por ataki la japanajn agresantojn.

Bajjangdian estas granda lago situanta ĉe la suda fino de la triangula areo de Pekino, Tiangin kaj Baŭding kaj estas fama regiono de rizo kaj fiŝoj en Hebej-provinco. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, la japana agresa armeo okupis ĉi tiun riĉan lokon. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la tiea popolo establis surakvan gerilan taĉmenton, kiu komence konsistis nur el ses anoj kun ses malnovtipaj pafiloj kaj post nelonge kreskis ĝis pli ol tri cent personoj. Ili konstante veturis sur fiŝboatoj kaj embuskis malamikojn, sin kaŝante en lotusejoj aŭ fragmitejoj. En 1941, la surakva gerila taĉmento uzis ĉi tiun malgrandan boaton kaj subakvigis en batalo unu malamikan motorŝipeton. En 1942, la japanaj agresantoj rabis de la loka popolo pli ol cent boatojn da fragmitaj matoj. Kiam la malamikoj venis kun la rabaĵo ĝis la centro de Bajjangdian, eksonis de sur ĉi tiu boato la batalordono, kaj la surakvaj gerilanoj sur cento da boatoj subite alpafiĝis el la fragmitejoj. Kvazaŭ pluvogutoj grenadoj falis sur la malamikojn, en malpli ol dek minutoj jam solviĝis la batalo, kaj la matoj estis rekaptitaj de la surakvaj gerilanoj.

En 1938, Prezidanto Maŭ diris en sia verko *Problemoj de Strategio en Gerila Milito kontraŭ Japanio*:

> **Kiel unu flankon de la disvolvado de nia landskala gerila milito, ni devas bone organizi gerilan militon en la regionoj de Hongze-lago kaj de la lago Tajhu, en la nordo kaj sudo de Jangzirivero respektive, kaj en ĉiuj golfaj kaj estuaraj regionoj ĉe riveroj kaj maroj, en la areoj okupitaj de la malamiko, kaj krei konstantajn bazlokojn en tiaj riveroj, lagoj kaj estuaroj kaj en ilia apudeco. Neglekti ĉi tiun flankon signifus provizi la malamikon per surakvaj transportaj faciligoj kaj formus en nia strategia plano por la Kontraŭjapana Rezistmilito breĉon, kiu devas esti ŝtopita ĝustatempe.**

La gerilado sur la akvo de Bajjangdian disvolviĝis kaj triumfis laŭ la direktivo de Prezidanto Maŭ. Tio pliafoje pruvas la grandecon de la gerilado en la fama Kontraŭjapana Rezistmilito, kiun Prezidanto Maŭ gvidis. Ĝi liveras valoran sperton al la subprematai kaj sklavigataj nacioj kaj popoloj de la tuta mondo por fari popolan militon.



EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 9 (111) 1967

Ĉefa Enhavo

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo

Prezidanto Maŭ Intervidiĝis kun Kamarado N. Sanmugathasan

"Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro" — Celebro de la 17-a Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Verkoj de Prezidanto Maŭ Eldoniĝis en Granda Kvanto

"Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong" Vendiĝas en Grandaj Nombroj

Perfido al la Proleta Diktaturo Estas Esenca Elemento de la Libro "Memkulturo"

Komplete Elimini la Venenan Influon de "Memkulturo"

La Granda Revolucio de Ĉinio kaj la Granda Tragedio de Sovetunio

La Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

Subteno al la Industrio per la Penso de Maŭ Zedong

Granda Riĉrikolto de Someraj Grenoj en la Tuta Lando

Firme Defendi la Revolucian Literaturan kaj Artan Linion de Prezidanto Maŭ

"La Haveno" — Pekina Opero kun Moderna Revolucia Temo

La Penso de Maŭ Zedong Donis Novan Vivon al Baledo

La Revolucia Sturmanto Guo Giahong

Ĉen Jongkang — Kamparana Specialisto de Rizkulturado

La Kvina Plena Kunveno de la Sekretariejo de la Azi-Afrika Ĵurnalista Asocio Okazis en Pekino

Niaj Samlandanoj en Hongkong Batalas kontraŭ la Perfortaĵo de Brita Imperiismo

Giaŭ Julu (*bildoj*)

Sur la kovrilo — Ĉen Jonguj, la Heroo de Daĝaj, Kune kun Junaj Revoluciuloj

Sur la dorskovrilo — Propagandantoj de la Penso de Maŭ Zedong



Ĉa rikolto de tritiko en suda Ŝanhi-provinco. Jen armeanoj falĉas ŝultron ĉe ŝultro kun la kamparanoj.



Kun abundo da semoj maturiĝis la kolzoj de la popolaj komunumoj en la antaŭurbo de Ŝanhajo. Jen la komunumanoj atenteme okupiĝas pri rikoltado, por ke ĉiu grajno estu transportita en la grentenejon.

